LAKSHMISWAR SINHA

JAROJ SUR TERO

ELDONA SOCIETO ESPERANTO

BER

L. SINHA en ĉi tiu libro rakontas pri siaj infanjaroj en Hindujo tiam ankoraŭ preskaŭ netuŝita de eŭropa kulturo, pri siaj junaĝaj jaroj kaj kontaktoj kun Esperanto en Svedlando kaj fine pri longa vivo en hejmlando iom post iom tute ŝanĝita. La streboj de la aŭtoro al modernigo de Hindujo sur la eduka kaj kultura kampoj klare montriĝas kaj en ĉi tiu libro kaj en liaj antaŭaj verkoj en Esperanto kaj la angla kaj bengala lingvoj.

Ni citas el du prijuĝoj pri la libro:

Prof. BJÖRN COLLINDER: Kiam nia amiko L. Sinha nun rigardas malantaŭen al longa kaj riĉa vivago, mi volas esprimi la esperon ke lia libro trovos legantojn ĉie kie la internacia lingvo estas uzata.

BERTIL NILSSON: La vivo de Sinha ricevis apartan karakteron pro tio, ke la riĉa kultura tradicio de Hindujo kaj modernaj kulturaj impulsoj de Norda Eŭropa renkontiĝis kaj kunfandiĝis en lia persono. Ni havas kaŭzon esti dankaj al la aŭtoro, ke li kolektis siajn rememorojn en memorlibro, kiu sendube estas unu el la plej valoraj en la internacia lingvo.

ELDONA SOCIETO ESPERANTO
MALMÖ — SVEDLANDO

1.08

Enkonduka noto.

Lakshmiswar Sinha portas mesaĝon de unu el al plej malnovaj kulturlandoj de la mondo. Kiam li rakontas pri sia ŝanĝoplena vivo, li prezentas ion gravan kaj valoran al ni ĉiuj.

Ni eŭropanoj kaj amerikanoj heredis la unuajn fundamentojn de nia kulturo kaj scienco de la grekaj koloniaj urboj ĉe la orienta Mediteraneo, kaj la ekstermonda vivlumiĝo, kiun okcidentanoj ĉiam ankoraŭ klopodas disvastigi ĉie en la mondo ankaŭ havas siajn radikojn ĉe la orienta marbordo de la Mediteraneo. La lumo venas de sudoriento.

Kiam la grekaj erudiciuloj renkontis la saĝan hindon Ĉhandragupta en la valo de la rivero Indus antaŭ 2290 jaroj, renkontiĝis du egalvaloraj kulturoj. Hindujo naskis unu el la grandaj mondreligioj, la plej profunde pensitan inter ili: la buddhismon. La dua granda hinda religio, la brahmanismo, estas ŝoso el tiu dikredo, kiun la arjoj kunportis al Hindujo de sia hindeŭropa prahejmo. Ĉirkaŭ la sanktaj dokumentoj de la brahmanismo aperis longe antaŭ la komenco de la kristana kronologio riĉe branĉita scienca kaj filozofia esplorado, kiu finfine — pli ol du mil jarojn post la militiro de Alexander al Hindujo — fruktis ankaŭ en Europo. La vivdeturnita pesimisto Arthur Schopenhauer ĉiam citis siajn prahindajn instruintojn. La nuna priskriba lingvistiko staras sur hinda fundamento.

La hinda pensado estas abunda kiel subtropa pluva arbaro. La hindoj havas senkomparan inklinon meti ĉion en sistemo. Ili amas grandajn nombrojn: kie la greko faras tri subdividojn, la hindo ne povas kontentiĝi per malpli ol naŭ; kiam la greko diras unu miriado,

la hindo diras cent milionoj. La hinda penso frue aspiris al la senlima kaj en la eta kaj en la granda. La signo de nul estas hinda invento: ĝi estas klara simbolo por la malpleno. La hinda pensado sin movas hejmece ĉe la limo al la nesciebla — jes, eble trans la limo. Por la hindo la mistiko estas io racia.

Lakshmiswar Sinha estas plenvalora reprezentanto pri la kulturo de sia lando. En ĉiuj rilatoj li apartenas al la elito de Bengalujo. Li ricevis sian literaturan kaj sciencan edukiĝon en la rondo ĉirkaŭ la nacia poeto Rabindranath Tagore kaj agis jam en junaj jaroj kiel helpanto de la glorfama nobelpremiito ĉe la altlernejo de Santiniketan en Bengalujo. Tagore sendis lin je studvojaĝo al la praktike direktita popolaltlernejo en Nääs de la sveda pedagogia pioniro Salomon — lernejo kiu donis al la sveda vorto *slöjd* (slojdo) preskaŭ universalan disvastiĝon. En Svedlando Sinha lernis Esperanton, kaj tio kaŭzis, ke li senpere venis en kontakto kun popolo en lando, kiu el hinda vidpunkto situas sur la alia ekstremo de la plej granda kontinento. Okazis, ke Sinha restas en Svedlando dum multaj jaroj. Lia verko "Hindo rigardas Svedlandon" estas atesto pri la fakto, ke la genio de la koro povas fari vojojn kaj detrui murojn. Pli bonan senditon Hindujo neniam povus trovi.

Kiam nia amiko Lakshmiswar Sinha nun rigardas malantaŭen al longa kaj riĉa vivago, mi volas esprimi la esperon, ke lia libro trovos legantojn ĉie kie la internacia lingvo estas uzata.

Björn Collinder.

Forssells Boktryckeri AB, Malmö 1966

Lingve kontrolita de

BERTIL NILSSON

Memore al mia kara amiko

STELLAN ENGHOLM

JAROJ SUR TERO

Memoroj
de
LAKSHMISWAR SINHA

ELDONA SOCIETO ESPERANTO
MALMÖ

Enhavo

Infanjaroj en gepatra hejmo 5
La avo kaj mi 11
Eduko en la vilaĝo 15
Mia hejmo 20
Mia patro 30
La onkloj kaj la patro 33
Memoro de boatkonkurso 38
Konkurso de "Palhar" kaj "Majur-panki" 42
Ŝanĝo en socia vivo 46
Unua Mondmilito kaj malsato 49
Familia katastrofo kaj mia studado 52
Krucvojo en la vivo 55
Santiniketan kaj Sriniketan 61
En Svedlando 69
En Stockholm 74
Intereso pri Esperanto 76
Prelegvojaĝo 80
Ree al Hindujo 83
Ree al Svedlando 88
Rekomenco de vivo en Hindujo 96
Post edziĝo 100
Dua mondmilito 106
Sendependiĝo de Hindujo kaj poste 109
Glosoj kaj biografiaj notoj 117

Infanjaroj en gepatra hejmo

Mi naskiĝis en Hindujo. Kiam mi rigardas malantaŭen per miaj okuloj internaj trans la tempo, kiun mi pasigis sur la tero, mi mire trovas preskaŭ nekredeblan ŝanĝon en la mondo kaj kompreneble ankaŭ en la lando, kie mi naskiĝis. Ŝajne la homa vivo evoluas simile al tiu de rivero, kiu kutime estiĝas sur teraltaĵoj kaj fine fluas malsupren trans nekonata tereno laŭ leĝo de naturo kaj finfine renkontas maron. La homa vivo simile evoluas laŭ varia influo de klimato, eduksistemo, ekonomio, socia kutimo kaj politiko kaj fine eble ĉiu celas al io, kion oni povas nomi perfektan vivarton kaj atingon de tia stato, kie la morto ne povas influi la vivon. Eble vera homa feliĉo povas eliĝi nur el pure feliĉa stato de animo, kaj atingi tiun nivelon de animo estas la sola celo de ĉiu klopodo de homo. Riveroj ne similas unu al la alia, tamen ĉiuj celas unuiĝon kun maro. Tiel ankaŭ la homoj en diversaj landoj malsimilas unu al la alia, tamen konscie kaj nekonscie emas unuiĝi unu kun la alia kaj penadas atingi perfektan kaj harmonian vivmanieron kaj homecon.

Nu, eble neniu povas memori laŭorde okazintaĵojn de siaj infanjaroj. Kutime ni retenas en la memoro nur tiajn okazintaĵojn, kiuj iel influis nian vivon. Cetere vivrakonto similas al pentraĵo de malproksima pejzaĝo, kaj pentristo pentras tion laŭ sia rigardmaniero kaj kompreno. Tiel estas ankaŭ pri mia vivrakonto.

Laŭ mia hinda horoskopo, mi naskiĝis la unuan de junio 1905 en Sinha familio en vilaĝo Rarhisal en la distrikto Sylhet en tiama provinco Aŝam, la plej orienta provinco de tiutempa Brita Hindujo. Laŭdire nia familia horoskopisto estis en mia gepatra hejmo, kiam oni anoncis mian alvenon sur la teron. Mi imagas, ke li notis la precizan tempon de mia naskiĝo, konsultis hindan kalendaron kaj, studinte la stelkombinacion, preparis mian vivhoroskopon. Hinda kalendaro Panĉango ĉiam estis, kaj ankoraŭ restas al la plej granda parto de la loĝantaro, la gvidlibro de ĉiutaga vivarto ortodoksa. Ĝi enhavas ĉiutagan instrukcion pri ĉio, kion oni devas fari kaj ne fari, kion manĝi kaj ne manĝi k.t.p. Hinda kalendaro malfermas pli da faktoj kaj informoj pri hinda vivmaniero ol bonaj historiaj verkoj. La bengala kalendaro Panĝika estas ĉirkaŭ tricent-paĝa, granda libro, kiu verŝajne havas pli da aĉetantoj ol la plej populara novelo aŭ romano bengala.

Antaŭ mia naskiĝo, Bengalujo — unu el la provincoj aŭ ŝtatoj en la unuiĝo de Hindujo — travivis kulturrenesancon. La instruado kaj agado de Raĝa Rammohan Raj, fondinto de Brahmasamaĝ, kune kun Mahariŝi Devendranath Tagore (la patro de Rabindranath Tagore), Pandit Iŝvar Ĉandra Vidjasagar, Kesab Ĉandra Sen kaj aliaj dum la lasta jarcento estis iluminintaj la kulturvivon de Bengalujo. Antaŭ tiu tempo la socio-religia vivo pro diversaj kaŭzoj restis stagnita dum longa periodo, kaj rezulte de tio oni nur sekvis malnovajn kutimojn — bonajn kaj malbonajn — ofte nekomprenante la kialojn.

En 1905, la jaro de mia naskiĝo, estiĝis ankaŭ anarkista movado en Bengalujo. Tiu organizo celis libe-

rigi la popolon el fremda regado. Sed verŝajne la nevidebla gvidanto de la destino de hinda popolo ridetis je tia agado, ĉar la antikva animkulturo evidente estis pli forta, ol tiu de terorismo, por akiri sendependecon. Anarkismo finfine montriĝis vana kopio de kulturo fremda al la hinda popolo. Komence la anarkista movado vekis politikan konscion de la popolo. La jaro 1905 cetere estis politike signifoplena por la moderna Hindujo — kaj por Azio. Rus-japana milito okazis en la sama jaro. Patriotismo komencis flori en Hindujo.

Mi klare memoras fruan matenon, kiam mi ankoraŭ kutimis dormi apud mia avino. Matena, bela melodio vekis min. Bando da kantistoj laŭ akompano de *khol* kaj *karatal* (muzikinstrumentoj) kantante marŝis tra la vilaĝo. Ili kantadis fervore, plenvoĉe kaj emocie la saman kanton:

> "Tagiĝas! Dion memoru! Vekiĝu! Ho civitano, vekiĝu! Ellitiĝu! Al Kreinto preĝu! Por bono de l'Patro-lando agu!"

La voko estis forta, eĉ kortuŝa, kaj ĝi postulis agon de ĉiu civitano por bono de la patrolando. Ni infanoj scivoleme rigardis la farojn de la plenaĝuloj. Tiutempe aperis kiel popol-gvidantoj personoj, kiuj poste fariĝis famaj preskaŭ internacie. Eĉ ni, malgranduloj, bone ekkonis la nomojn de triularo, nome Lal, Bal kaj Pal. Lal signifis Lala Lajpat Raj el Punjab, Bal — Balabanta Rao Gangadhar Tilak el Maharaŝtra kaj Pal — Bipinĉandra Pal el Bengalujo. La bildoj de tiu ĉi triularo troviĝis en multaj hejmoj de novkonsciaj patriotoj. Post pli ol cent jaroj de angla superrego la hinda popolo konsciis pri hinda nacieco; tio estis la paradoksa rezulto de fremda regado. Krome aperis

sur la nacia sceno Aŭrobindo Ghose, kiu direktis nacian movadon. Li flustris al la oreloj de la hindoj, ke sendependeco de Hindujo estas necesa, ne nur por la hindoj mem, sed ankaŭ por la harmonia progreso kaj bono de la tuta homaro. Kaj la hindoj ĉirkaŭ la jaro 1905 plenvoĉe kantis jene:

"Venu Vi, tenanto de l'*Sudarŝana-ĉakra,*
atendas vian gvidadon la mizera hindaro"

Denove la popolo hinda fervore preĝis, ke superhomo kiel Krišna — la tenanto de *Sudarŝana-ĉakra,* la speciala batalilo, kiun Krišna uzis dum la batalo sur Kurukŝetra en la epopeo Mahabharato — reaperu kaj gvidu hindaron kune kun homaro.

Antaŭ mia naskiĝo, Ramkrišna Paramhamsa en Bengalujo per sia vivago edukis sian popolon, ke ekzistas en la homa mondo tiom da vojoj, kiom da dideoj troviĝas ĉe la homaro, por realigi diecon en si mem. Li instruis, ke ĉiu preĝmaniero gvidas la homaron fine al unu sama celo, al la sola celo de la homa vivo, al unuiĝo kun dieco, same kiel fluanta akvo de ĉiu rivero fine celas unuiĝon kun maro. Vivekananda — la ĉefdisĉiplo de Ramkrišna — predikis denove la mesaĝon de advaitismo laŭ la Vedanta-filozofio, kiel faris Ŝankara antaŭ multaj jarcentoj. Vivekananda portis la mesaĝon al Ameriko kaj Eŭropo, kaj li aperis kiel vekanto de la dormanta popolo hinda. Al sia popolo li parolis tondre: "Ho hindaro! Ne forgesu, ke laboristoj, ŝuistoj, balaistoj — la homoj de malaltaj kastoj — estas viaj fratoj; sama sango fluas en vejnoj viaj kaj iliaj. Ho heroo, havu kuraĝon kaj fiere eldiru, ke vi estas hindo, ke ĉiu hindo estas via frato, kaj ke hinda socio estas via infanaĝa lulilo, laborkampo de via vivo, Banarasi de via maljunaĝo; eldiru,

frato; bono de Hindujo estas via bono." Vivekananda tiel ankaŭ agis kontraŭ kastsistemo.

Vivekananda vivis nur tridekok jarojn, kaj dum sia mallonga vivo li fondis grandan monaĥan ordenon en Belur apud Kalikato. La granda personeco de Vivekananda altiris plurajn eŭropanojn al laboro por emancipado de virina eduko en Hindujo. Li bone sukcesis en tiu agado. Inter liaj adeptoj speciale menciinda estas la nomo de f-ino Margaret Noble, kiu en Hindujo nomiĝis Nivedita. Hindujo neniam povas forgesi ŝin kaj ŝian laboron por bono de la hinda popolo.

Tiaj estis la cirkonstancoj en la lando, kiam mi naskiĝis en granda familio, kiu loĝis kiel zamindaroj (grandbienuloj) en sama loko dum dekses generacioj. Tiun hejmon de patro kaj prapatroj mi tamen devis forlasi por ĉiam en la jaro 1947, kiam Hindujo sendependiĝis, sed mia hejmdistrikto Sylhet fariĝis parto de fremda lando pro politika kaŭzo. Hindujo dividiĝis en la jaro 1947!

Kelkiuj de miaj parencoj antaŭaj estis konataj bonfaruloj. Laŭ familia kroniko mia unua prapatro antaŭ dekses generacioj migris el Bengalujo. Tiu parto de Bengalujo tiam nomiĝis Rarh. Oni supozas, ke politika kaj ekonomia cirkonstancoj tiutempaj devigis la familion formigri orienten. Estas tamen klare, ke mia migranta prapatro estis estro de sia socio kaj kun amaso da sekvantoj formigris laŭ rivervojo orienten al la distrikto Sylhet. Tie la prapatro akiris grandan terenon, kaj finfine oni fariĝis zamindaroj. Inter la popolamaso, kiu sekvis mian prapatron, troviĝis familioj de ĉiuj metioj: brahmanoj, ŝudroj, teksistoj, ĉarpentistoj, razistoj, vestolavistoj, terkulturistoj, metallaboristoj, komer-

cistoj kaj aliaj. Laŭdire malbonŝanco trafis la migrulojn survoje sur la granda rivero Padma. Pro ŝtormo la boatoj, per kiuj oni veturis, dronis. La lokaj, malriĉaj fiŝistoj savis la homojn el katastrofo. Kaj fine ankaŭ la savantoj sekvis la migrulojn, ĝis oni atingis la destinon en la distrikto Sylhet. Mi havas kaŭzon supozi, laŭ diversaj kolektitaj informoj, ke la migranta prapatro jam antaŭ la migrado akiris bonan kaj fidindan informon pri tiu senhoma tereno de Sylhet. La Sinha familio estas la sola en tiu distrikto. Laŭ klaraj postsignoj, tiuj bravaj migruloj loĝadis en diversaj lokoj. Fine oni fondis vilaĝon tute laŭ plano. Oni nomis la vilaĝon Rarhisal. La vorto signifas loko, kie loĝas homoj alvenintaj al Rarh el Bengalujo.

La ĉefmigranto donacis terenon al la savintaj fiŝistoj ĉe proksima riverbordo, por ke oni povu generacion post generacio loĝadi tie senpage kaj gajni vivrimedon per fiŝkaptado. Dum miaj infanjaroj, ĉiujare je memoro de la granda aventuro, la fiŝistoj de tiu vilaĝo unu tagon donacis grandan kvanton da fiŝo al nia hejmo. Tiel la memoro de migrado kaj pasinta historio ankoraŭ vivis.

La avo kaj mi

La propra avo de mi mortis jam multajn jarojn antaŭ mia naskiĝo. Sed mia avo havis pli junan fraton, kaj ni infanoj konis lin kiel avon. Post la naskiĝo de pli juna frato al mi, la geavoj elportis min el la loĝejo de mia patrino. Tia estis la tiama kutimo en la grandfamilia sistemo de Bengalujo. Oni loĝadis kun geonkloj kaj gekuzoj, kaj ĉiu manĝis kune en sama hejmo el sama kuirejo.

Dum infanjaroj mia rilato kun avo estis plej intima kaj dolĉa. Mi kreskis sub zorgo de miaj geavoj ĝis mia sepa jaro, kiam mia pli juna frato ellokigis min. Tiom intima estis mia rilato kun avo, ke mi eĉ ne povis trankvile elteni lian foreston el la hejmo. La avo bone sciis tion, kaj tial, se li devis veturi aliloken, li tion faris dum tempo, kiam mi dormis. Cetere mi ĉiam dormis ĉe li sur sama lito; mi manĝis kun li el sama plado. Mi poste aŭdis de mia patrino, ke ankaŭ la avo ne povis bone manĝi ĉe mia foresto.

La avino ŝatis bele vesti min. Ŝia kesto estis plenplena de kostumoj por mi. Mi estis tre ludema dum infanjaroj; mi ŝatis ludi kiel aliaj kun sablo, akvo, grimpi arbetojn kaj ankaŭ ludi kun samaĝuloj. Pro tio miaj vestoj ofte difektiĝis, kaj la avino ĉiam plendis pri tio.

Mia avo zorgis — plej bone dirite estris — nian zamindarion kaj familian aferon. Li vivis kiel grandsinjoro. Dum tago li sidis en la granda halo oficeja, kaj lin vizitis kaj salutis aro da homoj ĉiutage. Inter la vizitantoj troviĝis plejparte vilaĝanoj — niaj terluantoj, brahmanoj kaj ankaŭ aliaj. La vilaĝanoj ofte vizitis lin por akiri konsilon pri solvo de problemoj

— sociaj kaj materiaj. Kelkfoje alvenis gastoj — neinvititaj — por pasigi nokton en nia hejmo. La gastama avo rifuzis neniun, sed bone gastigis ilin. Ne malofte, kaj speciale dum vintro, alvenis ekzotikaj gastoj, kiuj estas konataj kiel *sadhu* — tiel nomataj sanktaj viroj. La avo respektplene bonvenigis ilin kaj regalis ilin per ĉiuj necesaĵoj. La sanktaj viroj apartenis al diversaj sektoj. Kelkiuj estis *sannjasi,* kiuj ne eniris domon kaj eĉ dum malvarma vintra nokto restis ekstere en *asana* (sidpozicio kun kruciĝintaj piedoj) sur la korto. Kutime ili ekhavis *dhuni*-fajron antaŭ si. Alia speco estis *ramajat,* t.e. adorantoj de Ram-Sita, pri kiuj oni legas en Ramajano. Kelkiuj posedis *zota* — longajn harojn, kunplektiĝintajn kiel dikaj snuroj. Ili estis ege amindaj personoj kaj kutime kantis gloron de Dio. Estis kaj ankoraŭ estas tiel en Hindujo, ke miliono da religiemuloj, kaj inter ili ankaŭ sanktuloj, unufoje en certa dato en la jaro vizitas insulon, kiu situas ĉe la renkontejo de la sankta rivero Ganga kun la maro — en la golfo de Bengalujo. La antikva rakonto pri la deveno de Ganga ankoraŭ influas la penson de multegaj hinduoj. Tiuokaze la sanktaj viroj stariĝis kaj vagadis tra la tuta lando kaj venis en kontakto kun socia vivo. Nuntempe troviĝas modernaj hinduoj, kiuj konsideras la sanktajn virojn preskaŭ kiel parasitojn. Oni tamen plej ofte erare pensas tion pri tiaj homoj; ĉar anime puraj personoj, kiuj serĉas veron de la homa vivo, ankaŭ radias purecon al la socio, kaj tial la influo morala de sanktaj viroj en moderna Hindujo tamen estas sentebla spite de progresanta eduko kaj ekonomio. En tiu kutimo la malnova Hindujo renkontas la modernan Hindujon en stranga maniero.

Dum infanjaroj, antaŭ mia vizito al lernejo, mi kutimis sidi apud mia avo en lia oficejo. Kaj estis tiel, ke mi aŭdis pri ege variaj homaj aferoj. Ne ĉion mi tiam komprenis, ĉar mi estis tro juna por penetri aferojn de plenkreskuloj, sed tamen laŭ mia aĝo iam kaj tiam penadis kompreni problemojn de plenkreskuloj. Estis ofte tiel, ke, dum lunĉo kun avo, mi petis klarigon de certaj homaj problemoj. La avo, siaparte, ĉiam kontentigis min per klarigo kaj trankviligis mian scivolemon pri homaj aferoj. Ofte li ege amusiĝis pro miaj kuriozaj demandoj kaj ridetis.

Iam kaj tiam niaj lutenantoj de najbaraj vilaĝoj — kverelintaj inter si, aŭ pri iu disputo aŭ pri landlimo, aŭ pri dubinda posedo de arbo aŭ io simila — vizitis mian avon por trovi justan solvon de tiuj problemoj. La zamindaroj ĝuis tian rajton tiutempe. En tiaj disputoj la avo ordonis al ambaŭ partioj reaperi kun atestantoj. Tiuokaze la halo fariĝis juĝejo. Dum la tempo daŭris la aferoj. Tiam mi ofte cerbumis, kial plenkreskuloj tiom kverelas inter si. Al mi ŝajnis, ke plimulto da plenkreskuloj kverelas nur pri bagatelaĵoj en siaj vivoj!

En tiu granda halo troviĝis multspecaj sidlokoj, nome seĝoj, benkoj, *piri* (planksidejo), kana tapiŝo k.t.p. La avo sidis sur granda, litosimila konstruaĵo, kiun oni kovris per bela tapiŝo kaj freŝblankaj tukoj; apogkusenoj ornamis lian sidlokon. La avo, kiel centra figuro, sidis sur sia loko, kaj antaŭ li estis bela ligna kesto, kiun li uzis kiel skribtablon. En la kesto troviĝis liaj paperoj, kalkullibro kaj mono. La eminentaj vizitantoj sidis sur seĝo, kaj laŭ socia kutimo la aliaj sidis aliloke — ĉiu laŭ socia rango. La ordo estis kvazaŭ fiksita kaj ŝajnis natura en tiama vilaĝsocio.

En angulo de la halo sidis *sarkar* — nia afergvidanto aŭ sekretario de mia avo — kun dokumentoj kaj laboris trankvile per plumo kaj inko. Iam kaj tiam li petis konsilon de mia avo.

Laŭ tiutempa vilaĝkutimo iu servisto staris apud avo. La servisto de tempo al tempo oferis preparitan fumaĵon al ĉiu. Kvar aŭ kvin specoj de *hukka* — akvopipoj — troviĝis en la halo. Oni oferis tabakon en arĝentkovrita *hukka* al brahmanoj kaj respektindaj edukitaj personoj. La kutimaj akvopipoj konsistis el kokosoŝelo kaj longa ligna (ronda) tenilo por argila tabakujo, kiun oni nomis *kalki*. En *kalki* oni metis preparitan tabakon kaj sur ĝi brulantan lignokarbon. En la kokosoŝelo troviĝis truo, kaj oni metis sian buŝon al tiu truo kaj ripozeme fumis. La fumilo de mia avo estis alie konstruita. Anstataŭ kokosoŝelo la *hukka* estis konstruita el belmetalo; bele ornamita tenilo de *kalki* estis fiksita al la belmetalujo; plue longa tubo, bele ellaborita el metalfadenoj kaj herboj, estis fiksita al la akvujo. La fleksa tubo estis longa. La avo kutimis ripozeme fumi valoran aromitan tabakon dum sufiĉe longa tempo. Tiuspeca fumilo nomiĝis *farŝi-hukka* kaj kelkloke *gargara*. La argila tabakujo de tia akvopipo estis neordinare granda. Unu servisto preskaŭ dum tuta tago nur servis tabakon al avo kaj al oftaj ĉeestantoj. Por bruligi lignan karbon oni ne uzis alumeton. En grandan argilan ujon oni ĉiumatene enmetis freŝan ŝelaron de rizo kaj aldonis fajron. La rizoŝeloj malrapide brulis dum la tuta tago. Oni nomis la fajrujon *hailla*. Por bruligi tabakon oni ne uzis lignokarbon en kruda formo, sed pulvoro de nigra lignokarbo estis miksita kun iom da bovinsterko, kaj el tia miksaĵo oni preparis ron-

dan objekton, kiu malrapide brulis kaj varmigis la tabakon. Malrapide brulanta tabako ebligis fumadon dum longa tempo per akvopipo. Tia fumsistemo komencis malaperi en la urboj, ĉar ĝi postulis grandan preparon. Nuntempe oni anstataŭas akvopipon per cigaredo kaj cigaro. Sed en la vilaĝoj la uzo de akvopipo ankoraŭ ne formortis.

Eduko en la vilaĝo

Ne malproksime de nia hejmo situis sesklasa "angla" mezlernejo. Sed ni infanoj de nia hejmo ĉiam komencis la studvivon ĉe hejma instruisto, kiu regule instruis nin matene kaj post vesperiĝo. Mi ne klare memoras, kiam mi komencis la leg- kaj skribarton. Sed certe mi sekvis la pliaĝulojn en mia kvina jaro. La matena studo estis interesa, sed postvespera deviga studo estis ege enuiga kaj laciga. Mi preskaŭ ĉiam sentis dormemon, kiam mi sidis kun la gefratoj ĉe la instruisto. Ofte okazis, ke la bonkora instruisto permesis min foriri kaj dormi. Sed kio okazis poste? Kiam mi forlasis studĉambron, ankaŭ mia dormemo forkuris. Sed mi neniam en tia okazo reiris al la hejma instruisto.

Regule mia avo en sia ĉambro ĉiuvespere kutimis laŭtlegi epopeajn verkojn — Mahabharaton de Kasiramdas aŭ Ramajanon de Kirtibas. Ambaŭ aŭtoroj

estas famaj en Bengalujo, ĉar ili poezie reverkis la epopeojn en simpla lingvo. La avo kun muzika melodio ĉiuvespere laŭtlegis epopeajn verkojn. Avino kaj kelkfoje mi estis la aŭskultantoj. Mi ege ŝatis la rakontojn de la epopeoj. Ĉiu rakonto de Mahabharato finiĝis tiel:

"Eldiraĵo de Mahabharato egalas al nektaro,
Kasiramdas diras: Vi aŭdu, ho bonulo."

Dum legado la avo iam kaj tiam haltis, kaj la servisto dume oferis aromitan tabakon. La avo ekfumis, kaj la tuta ĉambro kaj ĉirkaŭaĵo fariĝis plenplena de bonodoro de aromita tabako. Kompreneble la malgranduloj neniel rajtis fumi, sed la odoro tiom plaĉis al mi, ke decido fumi tabakon, kiam mi estos plenkreskulo, estis enradikita en mi dum tiu aĝo. Kaj, kompreneble, tiun decidon mi plenumis en mia posta vivo post la reveno el vizitoj al landoj de Eŭropo.

Dum paŭzo mi ofte petis klarigon de legaĵo, kaj la avo afable donis ĝin. Tago post tago, monato post monato, la vespera legado de avo daŭris, ĝis li finis unu el tiuj grandaj verkoj. Mahabharato enhavas centojn da instruoriĉaj rakontoj por klarigi agon de la ĉefkarakteroj. Tiel, dum infanjaroj, mi aŭdis kaj lernis laŭ mia tiama komprenkapablo el la epopeoj de Mahabharato kaj Ramajano. Nun, preskaŭ pli ol kvindek jarojn poste, mi kiel maljunulo devas konfesi, ke la karakteroj de Mahabharato troviĝas ĉie en la mondo; ankoraŭ la batalo inter bono kaj malbono, trovebla en homa vivo, daŭras. Kaj mi ne antaŭvidas, kiom longe daŭros tiu homa konflikto. Eterne ĝi ne povos daŭri. Kredeble la homa evoluo fine povos montri la grandan sekreton de amoplena eterna vivarto.



Lakshmiswar Sinha en hinda kostumo.



Baneswar Sinha (1865—1954), la patro de la aŭtoro, en preĝa pozicio.

Kutime la avo finis legadon, kiam oni anoncis pri pretiĝo de la nokta manĝaĵo. Ankaŭ la hejma kato tion anoncis. Tuj post la pretiĝo de la manĝoloko la kato kuris al avo kaj per sia vosto mole batis piedon de la avo kaj miaŭis. Kompreneble la kato multe ĝuis fiŝostojn kaj ĝi abunde ricevis ostojn de ni.

Ĉe la manĝoloko mi kaj avo sidis angule sur *piri* — ligna sidloko malalta — tiel ke ni ambaŭ povis manĝi el sama plado. Kutime mia patrino servis manĝaĵon al ni. Dume la avino eksidis ĉe la pordo de la manĝejo. Tiutempe en bengala hejmo geedzoj neniam manĝis kune en sama tempo. Edzino manĝis post la finmanĝo de edzo. Feliĉe tiu kutimo rapide komencis malaperi sub moderna vivkondiĉo kaj ankaŭ klerigo. La avino kutimis servi al ni laktaĵon kaj fruktojn. Inter fruktoj bananojn ni ricevis preskaŭ ĉiutage. Krome, oni dum somero manĝis mangojn kaj dum vintro oranĝojn de Sylhet. Aliajn fruktojn, kiel ekzemple ananason, oni manĝis posttagmeze.

La avo estis ege interesa rakontisto. Dum manĝado li ofte rakontis al mi aventurojn kaj farojn de sia junaĝo. Tiuj rakontoj estis ege vivaj kaj nature interesaj. Kiam la avo estis juna, nia vilaĝa regiono kaj ĉirkaŭaĵo estis plenplena de ĝangaloj, kaj iam kaj tiam aperis tigroj, kies loĝloko estis en apuda montaro — Raghunandan. Li rakontis, kiel oni mortigis tigron kun helpo de elefanto. La kontribuo de avo — intenca aŭ neintenca — al mia junaĝa eduko kaj fantazio estis ege granda. Fakte la avo estis la heroo de mia junaĝo.

Mi ankaŭ menciu la fakton, ke mia avo plej verŝajne estis la lasta reprezentanto de la pasinta generacio de nia familio. La tuta popolo en nia regiono

alte respektis tiun blankharan maljunulon. Li vivis kiel mezepoka grandsinjoro. Li estis bela homo kun ege gracia figuro. Li vivis kaj agis kiel patro de la ĉirkaŭa loĝantaro. Certe li estis bonkora. Kiam vilaĝanoj malsaniĝis, li senpage akiris medikamenton kaj helpon al ili. Fakte li malavare helpis mizerulojn. Li amis muzikon kaj *jatra* — hindan dramon. Ne malofte li okazigis en nia hejmo muzikon kaj popolkantadon de famaj muzikistoj kaj kantistoj. Dum tiaj okazoj li invitis la tutan loĝantaron de la vilaĝo kaj ilin regalis per bongusta kaj abunda manĝaĵo. Por ke la vilaĝanoj havu kaj trinku puran akvon, li konstruis plurajn akvujojn en ĉirkaŭaj vilaĝoj. Li ankaŭ baris la ĉirkaŭaĵojn de tiuj akvujoj, por ke oni ne povu malpurigi akvon per sin bani. Li fakte posedis denaskan econ fari bonon al aliaj. Memkompreneble mia avo estis mia heroo dum miaj infanjaroj.

La lernejo de nia vilaĝo ĝuis bonan reputacion en la tuta distrikto. Estis evidente, ke miaj prapatroj bone komprenis la neceson de popolkleriĝo. Nia vilaĝo havis ĉirkaŭ du mil loĝantojn. Iu ege klera brahmano, kiu estis nia familia *purohit* — pastro — posedis *tol* — tipe hindan lernejon — kie la lernantoj studis sanskritan gramatikon, literaturon, logikon kaj diversajn hindajn filozofiajn sistemojn. La estro de *tol* posedis la titolon Vidjavinoda, kio signifas "saĝulo inter kleruloj". En *tol* oni akceptis lernantojn nur el brahmana kasto. La lernantoj loĝis en la hejmo de instruisto kvazaŭ familianoj. Mia prapatro donacis sufiĉe grandan bienon al la pastra familio, por ke ili ne bezonu alie pripensi pri vivtenado. En *tol* la lernantoj ne pagis por instruo, manĝo kaj loĝo, sed ili devis ĝuste kiel hejmanoj kunhelpi

je mastrumado en la intruista familio. Ekzemple, la lernantoj devis flegi la hejmajn bovinojn kaj iri al bazaro por aĉeti manĝovarojn k.t.p. Tia estis la eduksistemo en Bengalujo antaŭ la alveno de moderna eduko. Tiu malnova sistemo nutris la klerigon kaj kulturon de la lando dum multaj jarcentoj. Kutime instruistoj ankaŭ alimaniere enspezis. Ĉiu vilaĝano pagis *dokŝina* — honorarion — kiam li alvokis lin hejmen por fari *puĝa* aŭ preĝadon por dia beno.

Mia propra avo tamen komprenis la neceson de moderna eduko por popolamaso. Li fondis antaŭ cent kvindek jaroj mezgradan lernejon, kie oni regule instruis gepatran lingvon, geografion, matematikon, historion, sansciencon kaj krome la anglan lingvon. La lernejo funkciis jam de 1820. Ĝi havis ses klasojn kaj oni nomis ĝin "Meza angla lernejo". Krome ekzistis en la vilaĝo kvarklasa lernejo nur por knabinoj de ortodoksaj familioj. En la jaro 1922, mia pli aĝa frato Kshitiswar Sinha fondis infanlernejon en nia vilaĝo. La vilaĝo tiel fariĝis fama, kiel progresema kulturvilaĝo en la tuta distrikto. Tiuj lernejoj multe helpis al la disvastiĝo de klereco en la tuta regiono. Multaj lernantoj alvenis el malproksimaj lokoj. La vilaĝanoj volonte gastigis ilin. Tia gastemeco estis tiutempe konsiderata preskaŭ kiel socia devo. Tial ne necesis tiam starigi apartan loĝejon por lernantoj el malproksimaj lokoj.

Mia patro kaj miaj onkloj jam de sia junaĝo agadis por popolklerigado laŭ la tiutempa inspira movado de Brahma-samaĝ. Patro kaj onkloj materie helpis la lernejon kreski interne kaj ekstere. Mia patro donace konstruis la belan kaj grandan brikdomon de la lernejo sur alta kaj aparta loko en la vilaĝo. Tia

konstruaĵo estis tiutempe maloftaĵo. Dum miaj infanjaroj mi ofte vidis anglajn oficirojn elekti nian lernejon kiel noktejon dum vizito ofica.

La konstruado de la lernejo estis komencita la 1-an de junio 1905, do en mia naskiĝtago. Pri tio maljunuloj ofte parolis kaj al mi ŝajnis, ke mi venis sur la teron en aŭspicia momento, kaj ke ankaŭ mi devas dediĉi mian vivon al bonfaro; ankaŭ mi devis servi la popolon tiel, kiel faris miaj antaŭuloj.

Mia hejmo

La memoro de mia gepatra hejmo, kie mi, post mia naskiĝo, daŭre pasigis dekkvar jarojn, estas neniel forgesebla. En la mezo de la vilaĝo sur la plej alta loko staris mia hejmo. Ekzistis granda artefarita lago en la oriento de nia hejmo. Fakte la lago estis parto de nia hejmo. La granda lago estis plena de fiŝoj; ĉiujare oni metis fiŝovojn en ĝian akvon. La hejmanoj kaj ankaŭ vilaĝanoj loĝantaj ĉirkaŭ la lago kutimis kolektiĝi ĉe la ŝtuparo kaj por sin bani kaj por elporti akvon en tipaj hindaj potoj. Granda kaj larĝa brikŝtuparo kondukis nin al ĝia akvo. Sur la okcidenta bordo de la lago staris laŭvice domoj de

nia hejmo. En la unua vico staris kokosarboj, mangoj kaj aliaj fruktarboj kaj ankaŭ bonodoraj florarboj. Apude staris bovinejo kaj loĝejo de servistaro — nome paŝtisto kaj du aŭ tri laboristoj de nia bieno; oni kulturis rizon kaj aliajn necesajn grenojn.

En dua vico staris norde Durga-mandap — la templo de Durga, la patrina diino, kreintino de la universo. Neniu povas klare diri, kiam tiu konstruaĵo estis farita. Ĝi estis konstruita el etaj, ruĝegaj brikoj, versajne antaŭ kvarcent jaroj. En ĉiu aŭtuno oni pompe preĝis al la Patrindiino. Sude de Durga-mandap, en la sama vico, staris granda halo, kiun oni nomis Nat-mandir — laŭvorte La halo de danco. Fakte la halo estis uzata ĉefe dum festoj, festenoj kaj kunvenoj. Sed dum la tempo de mia avo li uzis ĝin kiel ĉiutagan sidĉambron. Kelkfoje dum la pluvsezono oni uzis la halon kiel grensekigejon. En la sudo de Nat-mandir, en sama vico, staris la oficejo de nia tiama zamindario. En tiu oficejo nia hejma *sarkar* — afergvidanto — ĉiutage laboris regule.

Kvar konstruaĵoj staris en la tria vico. La domo en la nordo estis gastigejo, kie oni gastigis parencojn; plie en tiu dometo, ni — la infanoj de la hejmo — studis ĉe hejma instruisto. La posta konstruaĵo estis la plej granda el brikoj. Ĝi havis du grandajn ĉambrojn kaj ege longan verandon. Ĝi estis alta konstruaĵo. En la granda halo de tiu ĉefkonstruaĵo estis nia biblioteko, kaj en la dua ĉambro staris malnovaj lignaj kestoj, kiuj enhavis dokumentaron de nia familia posedaĵo. Mi iam kun intereso trarigardis ege malnovan dokumenton — nome la zamindaran rajtigilon de Mugal-imperiestro en Delhi. En la sama ĉambro, en malnovegaj grandaj kestoj, troviĝis grandaj kui-

riloj, kiujn oni uzis dum festenoj, kaj en unu angulo loĝis maljuna fratino de nia avo — do, mia avino.

Tiu maljunulino en junaĝo edziniĝis al iu grandbienulo. Ŝi ne havis infanon. Post morto de ŝia edzo, ŝi preferis loĝi prejparte en sia gepatra hejmo. Iam kaj tiam ŝi vizitis propran hejmon por zorgi materiajn posedaĵojn. Tiu avino ege amis mian pli junan fraton. Tia estis tiutempe la kutimo en kuniĝinta familio. Sed tiu sistemo daŭre malfortiĝis sub influo de moderna ekonomia cirkonstanco kaj ŝanĝo de leĝo pri landposedaĵo. La hinda registaro, post sendependiĝo, laŭleĝe likvidis zamindarian sistemon.

Apud la granda domo kaj sude de ĝi, staris nia familia templo de Lakŝmi-narajan. *Puĝari* — (kiu preĝas) — brahmano zorgis la aferon de templo de mateno ĝis vespero ĉiutage. Oni ĉiumonate pagis lin por lia laboro en templo. La avino (fratino de avo) kaj aliaj inoj de la familio helpis al la *puĝari* en la plenumado de lia devo en la templo.

La hindua maniero preĝi, flegi kaj zorgi diidolon estas sendube interesa. Oni evidente povas supozi, ke la hinduoj estas idolemaj. Sed tiam oni memoru, ke en Hindujo floris la filozofio de advaitismo kaj Vedanta — koncepto de nevidebla kaj neperceptebla universala forto, nome Brahma. Tamen oni kreis simbolon — idolon, en kiu oni povu koncentri kaj fine mediti la supran Dion. Tia koncepto apartenas al dvaitadvaitismo (''duec-neduecismo'' - noto de la eld.) La vaiŝnavoj preĝas al Dio kiel amantoj, servistoj k. t. p. Ĉiu preĝanto oferas ĉion bonan — ĉu floron, ĉu frukton aŭ alian manĝaĵon unue al Dio. Poste oni mem ĝuas la oferaĵon, kiun oni nomas *prasada*. Ĉiutaga deviga laboro por preĝado konstante memorigas

la hejmanojn pri ekzisto de la kreinto de la universo. Alilandaj vizitantoj en Hindujo certe trovos multmilojn da temploj tra la tuta lando. Al mi ŝajnas, ke oni devas naskiĝi kiel hinduo por plene kompreni la religian percepton de la hinduoj. Tamen, la fakto restas, ke religiaj perceptoj estas kunmiksitaj kun tradiciaj kutimoj, kaj tial la ŝanĝoj sub influo de modernismo ankaŭ estas senteblaj. Ĉitie mi tamen nur rakontas mian travivaĵon dum infanjaroj en mia hejmo kaj vilaĝo.

Apud nia hejma templo, en sama vico, staris malgranda kuirejo, kie la *puĝari* ĉiutage preparis puran vegetaranan manĝaĵon kaj ĝin oferis en plej bela maniero en la templo antaŭ diidolo. Oni regule kulturis florojn en nia hejma ĝardeno por la templo. En ĉiu frumateno antaŭ sunleviĝo, oni kolektis florojn el la ĝardeno. Kiam mi fariĝis sepjara la devo kolekti florojn fariĝis mia, kaj mi tion faris ĝis mia dektria jaro. Kompreneble mi tion faris kun plenplena amo kaj zorgo. Mi devis frue ellitiĝi kaj ŝanĝi kostumon kaj kutimis forpreni el la templo *ŝaĝi*-ujon konstruitan el bambuaj kaj kanaj fadenoj kaj mi kolektis florojn. La laboro plaĉis al mi, ĉar bonodora delikata floraro hinda aromis mian estaĵon, tiel ke dum longa tempo mi tion ĝuis. Certe la floroj estas la plej indaj kreaĵoj sur la tero, kaj tio memorigas pri ekzisto de la Kreinto. Mi mem spertis en la ĝardeno, kiel la burĝonoj de la floroj ekfloris je sunleviĝo!

La inoj en la granda familio purigis la metalajn ujojn de la templo matene. *Puĝari* post sinbano jam en mateno aperis en la templo. Li ellitigis la di-idolojn kaj ŝanĝis la kostumojn kaj plej bele ornamis ilin per santala pasto kaj floroj. Li bruligis aromaĵojn kaj

medite eldiris preĝvortojn kaj fine preĝis per iluminilaro. La viroj, virinoj, infanoj, geservistoj — ĉiuj plej respektplene salutis al Lakŝmi-narajan. Kutime la hinduoj ne parolas pri siaj religiaj pensoj al eksterlandanoj, kaj tial tiu flanko de la hindua vivo restas kiel sekretoj al eksterlandanoj.

Nu, post preĝado la *puĝari* kutimis eniri kuirejon kaj preparis puran vegetaran manĝaĵon kaj fine dum tagmezo oferis tion en la templo kaj fermis la pordon. Post kelka tempo — tempo por manĝo de Dio — li sonorigis per granda konko. Fine li malfermis pordon de la templo. Li dividis la *prasada* en du partojn — unu por si mem, kiun li manĝis, kaj alia parto, kiun li lasis en nia hejmo. Dum la infanjaroj mi ege ŝatis ricevi *prasada.*

Ĉiuvespere la *puĝari* iluminis la templon. Li preĝis per iluminilaro — speciale konstruita por tiu ago. Ĉiu en nia hejmo kaj ankaŭ la najbaroj kolektiĝis sur la korto de la templo kaj respektplene observis la iluminatan preĝadon. La preĝkantistoj alvenis kun *khol* kaj *karatal* kaj kun granda ĝojo emocie kantis digloron. Jen estas la enhavo de unu el tiuj kantoj, esperantigita el sanskrita originalo:

"Tago kaj nokto, vintro, printempo
ree kaj ree aperas. Tempo pasadas.
Vivforto eluziĝas. Tamen deziro
neniam forlasas.

Kiom longe oni enspezas,
tiom longe ĉiu vin amas.
Kiam korpo malfortiĝas,
kaj oni al morto nevole promenas,
tiam pri vi neniu interesiĝas.

Sed tiun la morto ne terurigas,
kiu Bhagavad-Giton regule legas,
kaj al Lordo de l'universo preĝas,
kaj akvoguton de l'Ganga trinkas.

Dum infanjaroj oni ludas
kaj en junaĝo altiriĝas
al junulino. Pensema fariĝas
dum maljuneco; sed enamiĝas
neniu kun la Kreinto.

Naskiĝo kaj morto ree kaj ree okazas,
Ĉiu naskito laŭ karmo renaskiĝas.
Ho Lordo, afable savu min el la
netrankvila kaj terura vivmaro.

Kiu estas vi? De kiu loko
vi alvenis? Kiu via patro
estas? Kiu estas via patrino?
Pri sonĝo-simila vivo pensu,
kaj ĉion sensencan forlasu."

Laŭdire la granda filozofo Ŝankara verkis ĉisupran preĝkanton en lingvo sanskrito. Mi preskaŭ ĉiutage kantadis la preĝkanton sur la korto de nia hejma templo. La influo de ĉiuvespera preĝkanto en mia vivo, mi devas konfesi, ne estis sensignifa. Simile ankaŭ la reakcio kontraŭ tia vivfilozofio iam estis granda en mia vivo. Skribante tamen pri miaj infanjaroj, eble sufiĉas diri, ke la fondinto de la Vedanta-filozofio plej verŝajne verkis la preĝkanton nur por la sanktuloj aŭ *sannjasi,* kiuj kredis aŭ eble spertis ke la tuta kreaĵo, la universo, estas nur iluzio, kaj ke renaskiĝo estas la sola kaŭzo de vivsufero. Post mia maturiĝo mi ofte cerbumis kaj pri Vedanta kaj pri la

teorio de renaskiĝo. Al mi ŝajnis, ke tia filozofio de la vivo povas esti taŭga nur por sendeziremaj saĝuloj, kiuj volas eviti renaskiĝon sur la tero, sed tio neniel estas taŭga por la hinda popolamaso, kiu volas, penadas kaj sopiras vivi pli plene kaj pli komforte, sed tamen vivas mizere. Mi ankaŭ alvenis al konkludo, ke tia melankolia vivpercepto estas rezulto de senesperiĝo pri materia vivo multcentjara, kaj ne ĉiam pro saĝeco — almenaŭ por la plimulto de la popolo.

La hinda jaro komenciĝas kutime en la mezo de aprilo. La nomo de la unua monato estas Baiŝak. Dum tiu monato oni ĉiutage oferis rizkaĉon kun dudek funtoj da lakto al nia hejma dio — Lakŝmi-narajan. Ĉiuvespere post la preĝkanto la *puĝari* oferis *prasada* al ĉiuj ĉeestantoj. Kompreneble ni infanoj ege amis tian *prasada*.

Mi bone memoras avinon — la fratinon de mia avo. Ŝi estis tiam okdek-jarulino, sed ŝi posedis ege dignan figuron. Ŝi profunde amis infanojn. Dum sia restado en nia hejmo ŝi tutanime laboris por ordigi la aferon en la templo.

Dum la pluvperiodo, kiam la akvonivelo de la riveroj altiĝis kaj subigis la vastegan agrikulturan kampon de la tuta regiono, kaj kiam la vilaĝoj aspektis kiel insuloj kaj samtempe, kiam la abundaj somerfruktoj variaj maturiĝis, tiam la avino skribis al sia afergvidisto kolekti maturajn fruktojn el la ĝardeno kaj sendi ilin per boato al nia hejmo. Fakte alvenis abundaj bongustaj fruktoj kaj la tuta familio — speciale la infanoj — multe ĝuis bongustajn fruktojn dum sufiĉe longa tempo.

Tiu avino mia kelkfoje rakontis al mi pri sia plej aĝa frato — nome pri mia propra avo, kies granda

portreto troviĝis sur la muro de la granda biblioteka ĉambro. Laŭ ŝia diro mi eksciis, ke li — la avo — lerte gvidis la aferon de nia granda bieno, kaj samtempe li profunde vivis spiritan vivon. Li kutimis mediti. Dumtage li traktis la hejman aferon, sed de vespero ĝis meznokto li meditis kaj preĝis. Kiam li subite mortis en dormo, oni supozis, ke oni trovos grandan trezoron en lia persona ŝranko. Sed imagu! Kiam oni ĝin malfermis, oni estis surprizita. Tie kuŝis filozofiaj kaj religiaj libroj kiel Gita, Joga-sutra de Patanĝali, la Upaniŝadoj, Korano k. t. p. Mia avo krom la gepatra lingvo bone posedis la persan kaj sanskritan lingvojn.

La angloj okupis la distrikton Sylhet, kiam mia avo estris nian zamindarion. Dum tiu tempo fervojo ne ekzistis, sed la avo kun kleraj brahmanoj kaj servistoj per granda boato veturis rivervoje al la sankta urbo Banarasi por preĝi en la sankta templo de Viŝvanath — la lordo de l'universo. Survoje en la boato la brahmanoj laŭtlegis el Ĉandi kiu estas same grava verko kiel Gita. En tiu verko oni legas priskribon pri batalo inter *devas* (bonuloj) kaj *asuras* (malbonuloj); la lastaj ĉiam estis pli fortaj ol *devas*. Tial la *devas* preĝis al la kreinto — Durga — por detrui *asuras*. Mia avino klarigis, kial la hinduoj ĉiuaŭtune pompe kaj amase preĝas al la diino Durga. Dum la infanjaroj tiuj rakontoj ege allogis min. Malgraŭ moderna eduko la Durga-preĝceremonio ankoraŭ vivas en Bengalujo, kaj kiom longe tio daŭros en la vivo de la hinduaro estas malfacile diri.

Sur la muroj de la granda loĝejo en mia hejmo troviĝis bildoj de famaj hindaj sanktuloj — nome Troilonga Svami kaj Vaskarananda. La unua naski-

ĝis en decembro 1607 kaj vivis du cent okdek jarojn. Ambaŭ posedis preskaŭ nekredeblan superfizikan kapablon. Mia avo, vizitante Troilonga Svami, verŝis en lian buŝon okdek funtojn da lakto. Tia estis lia kapablo! Li neniam manĝis per sia propra mano! Nu, iel, dum multaj jarcentoj, la hindaj sanktuloj penadis solvi la misteron de la homa vivo, kaj tiel naskiĝis tia profunda verkaro kiel la Upaniŝadoj, Brahmasutra, Gita kaj tiel plu. Ĉu la homoj naskiĝas nur por ĝui vivon kaj fine morti, aŭ ĉu vere ekzistas senmorta vivo dieca — tiuj demandoj iam en antikva tempo okupis la pensojn de la grandaj hindaj saĝuloj.

Mia maljuna avino iam sonĝis pri Viŝvanath, kies templo troviĝas sur la bordo de Ganga en Banarasi. La Lordo ordonis al ŝi en sonĝo, ke ŝi veturu al la malnova sankta urbo Banarasi. Mi bone memoras, kiel ŝi maltrankviliĝis pro la sonĝo. Ŝi kredis, ke ŝia tera vivo baldaŭ finiĝos kaj por atingi al *mukŝa* — liberiĝo de renaskiĝo — ŝi nepre devas pasigi siajn lastajn tagojn de la tera vivo en Banarasi, kaj la hejmanoj devas aranĝi ŝian vojaĝon tien. Tiu avino ege amis mian patrinon kaj antaŭ sia forveturo ŝi donacis siajn orajn ornamaĵojn al mia patrino.

En Banarasi la avino vivis ankoraŭ sep jarojn, kaj fine ŝi mortis. Tiutempe kaj kredeble ankoraŭ, malgraŭ la influo de moderna tempo, la ortodoksaj hinduaj gemaljunuloj deziras pasigi la lastajn jarojn de siaj vivoj tie kaj ankaŭ morti tie. Tiel forta estas la deziro akiri *mukŝa* aŭ nirvanon. Al mi ŝajnas, ke la teorio pri liberiĝo de renaskiĝo estis kaj ankoraŭ restas la centra punkto de hindua kulturo malnova. Sed oni ankaŭ devas diri, ke la influo de Brahmasamaĝ samtempe ne estas sensignifa.

En la kvara vico de nia hejmo staris du domoj, kie la hejmaninoj mastrumis. Manĝo-provizo troviĝis en tiuj domoj. Malgranda kuirarangĝo troviĝis en unu ĉambro, kie oni varmigis lakton, preparis teon kaj ankaŭ puran vegetaran manĝaĵon, ĉar miaj gepatroj, avinoj kaj aliaj vidvinoj kutimis manĝi nur vegetaran manĝaĵon. Kontraŭ la deziro de la hejmanoj ankaŭ mi dum la infanjaroj preferis manĝi kun la vegetaranoj, ĉar fiŝo kaj viando neniam plaĉis al mi, kaj fakto estas, ke mi eklernis manĝi fiŝon kaj viandon en Svedlando en 1928 en Nääs.

Inter la tria kaj kvara vico de nia domaro troviĝis granda korto, kiun oni uzis kelkfoje por greno, kelkfoje por festeno, kaj krome ni infanoj kutimis ludi sur la korto. En la norda limo de la korto staris dometo, kie loĝis miaj geavoj. En la suda limo staris domo duĉambra. En unu ĉambro la patro kutimis dormi, kaj la duan la patro uzis kiel studĉambron. Ni infanoj malofte vizitis la loĝejon de la patro. Lia domo staris iom izole. En lia sidĉambro estis libroŝrankoj plenplenaj de libroj. Cetere staris tie bela seĝo kaj skribotablo. Ŝur la tablo staris granda horloĝo; sur muro troviĝis granda, bela haŭto de cervo. Ĉirkaŭ la domo de la patro estis aro da florpotoj. La patro estis granda amanto de floroj kaj plantaĵoj!

En la okcidenta parto de nia hejmo estis fruktoĝardeno, kie oni ankaŭ kulturis legomojn. En iu angulo de la ĝardeno staris granda provizejo de grenoj.

Mia patro

La personeco de mia patro estis tia, ke dum lia restado en la hejmo ĉiuj familianoj moviĝadis kaj parolis singarde kaj mallaŭte. Tion mi eĉ kiel infano povis kompreni. La kaŭzo eble estis tio, ke la patro postulis korektan konduton de ĉiu. La infanoj iom timis lin, sed mia amika rilato kun la avo estis mia granda forto, ĉar mi iel komprenis, ke la patro alte estimas mian avon.

Mi memoras, ke iam ni tri infanoj kune ludis proksime al la domo de nia patro. Okazis tiel, ke miaj kunludantoj rompis iun valoran objekton. La patro eksciis tion, kaj sen demando pri la okazintaĵo li riproĉis min. Mi ne estis la kulpulo, kaj tial mi ne emis digesti lian riproĉvorton. Mi raportis la tutan aferon al mia patrino. Mi neniel aprobis la agon de la patro. La patrino raportis mian opinion al la patro. Ŝajne la patro amuziĝis pro mia kuraĝo.

La haŭto de cervo en la ĉambro de la patro multe interesis min kaj same ankaŭ la granda horloĝo. El patrino mi eksciis, ke la patro regule sidas sur la cervohaŭto dum medito kaj preĝo. La vivmaniero de la patro ŝajnis al mi neordinara, ĉar neniu en la hejmo aŭ en la vilaĝo tiel meditis aŭ preĝis. Dum la tuta tago de mateno ĝis vesperiĝo, la patro manĝis nenion, eĉ ne trinkis guton da akvo. Dum la tuta tago li laboregis. Li legis kaj skribis kaj iam kaj tiam inspektis nian grandan ĝardenon kaj bovinejon. Multaj homoj ankaŭ vizitis lin preskaŭ ĉiutage. Li kuracis malriĉulojn senpage per homeopatia medicino. Tial inter la vizitantoj la plimulto estis malsanuloj. Laŭprofesie la patro estis fabrikisto de brikoj kaj tegmentaĵoj.

Do li devis viziti sian fabrikejon, kiu kuŝis du aŭ tri kilometrojn malproksime de nia hejmo apud rivero. Li veturadis surĉevale dum la seka periodo kaj dum la pluvsezono per boato.

Ankaŭ la progresemaj terkulturistoj de proksimaj kaj malproksimaj vilaĝoj kutimis viziti mian patron, ĉar la patro ĉiam eksperimentis pri kulturado de diversaj grenoj kaj ankaŭ legomoj, ofte kun bona rezulto. Sed la plej rimarkindaj vizitantoj al la patro estis kleruloj kaj ankaŭ tiel nomataj sanktaj viroj. La varia interesiĝo de mia patro ŝajnis eksterordinara. Vere, malofta persono li estis.

Kun la kleruloj la patro plej ofte diskutis pri instruo de Gita, Bhagavatam, Upaniŝadoj kaj pri advaitismo, dvaitismo kaj dvaitadvaitismo. Mi estis tiom alkutimiĝinta aŭdi pri tiaj seriozaj temoj jam en junaĝo, ke mi jam pensis pri tio, kial homoj tiom okupiĝas pri tiaj aferoj. Aliflanke ŝajnis al mi, ke la vivhistorioj de grandaj malnovaj pensuloj kaj saĝuloj kiel Ŝankara, Ramanuĝa, Sridhar Svami, Ĉaitanja, Tulsidas, fratoj Rup kaj Sanatan k. t. p. estis ege interesaj. Ankoraŭ pli interesa estis la kunestado kun la sanktaj viroj, kiuj ofte ŝajnis esti nenaturaj superhomoj. Laŭ la familia tradicio la avo kaj ankaŭ la patro kaj kompreneble la hejmanoj gastigis ilin kaj montris altan estimon al ili. Mi memoras pri unu *sadhu*, kiu preskaŭ ĉiujare dum vintro vizitis mian patron kaj nian hejmon. Lia nomo estis Ramŝjam Baba. Li estis ege belaspekta kaj klera! Li ŝajnis scii parkere la tekstojn de grandaj verkoj religiaj kaj klasikaj. Li ankaŭ estis tre bonhumora. Ni infanoj amis lin. Dum lia restado en nia hejmo li kelkfoje diskutis kun la patro pri ia filozofia temo ĝis malfrua nokto.

Dum interparolo mia patro kaj Ramŝjam Baba ambaŭ tiel ridegis, ke tio kelkfoje vekis nin. Ramŝjam Baba apartenis al hindua religia sekto — Ramajat, do li estis adoranto de Sita-Ram. Poste mi komprenis, ke li estas Mohanto, t. e. estro de iu fama templo en norda Hindujo. Estis ia neklarigebla ĉarmo en lia personeco kaj tio profunde altiris min al li.

Iam, laŭ peto de mia patro, Ramŝjam Baba alkondukis en nian hejmon sep aliajn sanktulojn, kiuj estis grandaj muzikistoj. Ili uzis *setar* — fama hinda kordinstrumento. Tiu vizito okazis dum vintro. La sep sanktuloj kunportis krom muzikinstrumentoj ankaŭ orajn idolojn de Ram, Sita kaj Hanuman. Per muziko sorĉa, preĝkanto emocia, ili kreis tian atmosferon en nia hejmo, ke eĉ hodiaŭ mi tion ne povas forgesi.

Post mia reveno al Hindujo kaj dum la dua mondmilito mi deziris denove renkonti Ramŝjam Baba. Tial mi veturis al tiu templo, kiun li estris en norda Hindujo. Tie mi eksciis, ke Ramŝjam Baba malaperis en Himalaja.

Kiel jam dirite mia patro posedis fabrikejon. Tiutempe maŝino, fabrikado per maŝino — alivorte moderna ideo pri industrio — ne estis penetrinta la distrikton. Ĉiuvintre preskaŭ cent laboristoj laboris en lia fabrikejo. La longa kamentubo aspektis de nia hejmo kvazaŭ tiu de ŝipo. La fabrikejo kuŝis izole sur bordo de rivero, kaj sur alia bordo estis kvieta biendomo de la patro.



Mahatma Gandhi en Santiniketan.

Raĝa Rammohan Raj.

La onkloj kaj la patro

Mi havis tri onklojn. Du el ili estis pli aĝaj kaj la tria pli juna ol mia patro. Patro kaj onkloj — ĉiuj estis tre sendependemaj. Ĉiu estis influita de grandaj reformistoj de Brahma-samaĝ. Mia patro fakte pasigis sian junaĝon ĉe fama reformisto, Sibnath Ŝastri. La patro alte estimis ankaŭ Devendranath Tagore. La patro igis nin, la filojn, tralegi aŭtobiografion de Devendranath Tagore kaj la verkojn de Sibnath Ŝastri. Ni devis legi ankaŭ pri vivo kaj verko de Iŝvar Ĉandra Vidjasagar.

La plej aĝa onklo Sasindra Ĉandra Sinha redaktis sendependan semajnan gazeton en angla lingvo. Li jam en sia junaĝo aliĝis al la Hinda nacia kongreso, politika partio fondita en 1885, kiu celis *svaraĝ*, t. e. memregon en Hindujo, kaj estis multe influita de Lal, Bal kaj Pal. La onklo redaktis sian gazeton kiel vera patrioto kaj akiris famon kiel ĵurnalisto. La popolo de la provinco Aŝam nomis lin "la leono de Aŝam". Li iam laboris kiel agento de Brita-Hinda Ŝipkompanio. Li gajnis sufiĉe multe, sed li elspezis pli multe por sia patriota laboro kaj por la bono de la popolo. Lia edzino — do mia onklino — nome Kumudini Sinha estis klera kaj rimarkinda sinjorino. Lia filo D-ro Sasadhar Sinha — mia kuzo — estas konata aŭtoro. Li nuntempe loĝas en Anglujo. Inter liaj verkoj estas menciindaj la jenaj en angla lingvo: 1. Social Thinking of Rabindranath Tagore, 2. Indian Independance in Perspective, eldonitaj de Asia Publishing House.

Mia duo onklo, Harendranath Sinha, estis advokato. Li estis unu el la plej lertaj juristoj en Sylhet. Li estas konata kiel verkisto de jurverkoj.

La juna onklo fariĝis komercisto kaj kiel agento de teoĝardenistoj komercis kun varoj necesaj por teoĝardenposedantoj. Li ankaŭ bone vivtenis sin.

Dum Durga-Puĝa — la adorado de Durga — la familianoj de la onkloj kolektiĝis en gepatra hejmo. La hejmo funkciis kiel renkontejo de la tuta unuiĝinta familio kaj parencaro.

Jam en la fino de la vivo de mia avo, nia zamindario estis likvidita pro diversaj kaŭzoj. Tamen mia patro preferis ne forlasi la vilaĝon. Li jam en junaĝo sub influo de moderna ideo planis rekonstrui la ekonomian vivon de si mem kaj ankaŭ tiun de la socio. Tiutempe agrikulturo estis la sola okupo de vilaĝanoj, sed oni praktikis ĝin laŭ antikva metodo. Mia patro penadis modernigi la terkulturon en la propra bieno kaj ankaŭ plibonigi la laktodonan kapablon de la lokaj bovinoj. Tiutempe la vilaĝa popolo sin vivtenanta per agrikulturo havis nenian okupon dum kvin aŭ ses monatoj dum la jaro. Kiam la agrikulturo malsukcesis en iu jaro pro inundo kaj aliaj kaŭzoj, tiam kutime regis malsato. Pro tio mia patro deziris enkonduki modestan industrion en la vilaĝan ekonomian vivon, kaj samtempe li okupis sin pri plibonigo de la agrikultura produktaĵo. Kun tiaj ideoj kaj planoj li starigis sufiĉe grandan industrion — maŝinfabrikadon de brikoj kaj tegmentaĵoj. La fabriko staris izole ĉe la riverbordo kiel jam menciite. Sur la alia flanko de la rivero li posedis sufiĉe grandan bienon. En la bieno staris belaj domoj kaj li tie konstante eksperimentis pri produkto de altkvalitaj grenoj — someraj kaj vintraj. Li ankaŭ flegis bonajn laktodonajn bovinojn.

Dum tiu tempo la agrikulturistoj en nia regiono

kulturis nur rizon en somero kaj pluvperiodo, sed neniu kulturis vintrajn grenojn. Mia patro regule kulturis ankaŭ vintrajn grenojn. Li ofte skribis pri rezulto de sia eksperimentado kaj eldonis broŝurojn sub titolo "Kiel eviti malsaton". Li ankaŭ distribuis la broŝurojn al la agrikulturistoj en la tuta regiono. Fakte li sukcesis pleje en tiu entrepreno. Kiel plenkreskulo mi hodiaŭ pensas, ke la ago de mia patro estis eksterordinara en sia tempo, kiam la vilaĝanoj kutimis okupi sin pli multe pri bagatelaĵoj kaj vilaĝpolitikaj malsaĝoj.

La bieno de la patro situis bele sur orienta bordo de la rivero Ŝutang. Ĉirkaŭ la bieno estis vasta kampo — herblando por paŝtado de bovinoj de la ĉirkaŭaj vilaĝoj. En la seka periodo la verda koloro de herboj, kiuj kreskis abunde, estis videbla ĝis la horizonto. Dum la pluvperiodo, kiam la akvonivelo de la riveroj altiĝis kaj inundis la tutan kampon, la regiono aspektis kiel maro kaj la patra bienhejmo kiel insulo. El ĉiuj vidpunktoj la bienhejmo de mia patro malsimilis al tiuj de la vilaĝaj hejmoj. Bela florĝardeno, kokosplantoj kaj aliaj fruktarboj abundis tie. Ĉe la bordo de la bieno staris grandaj *kodombo*-arboj (Anthocephalus Codamba). Por mi kaj aliaj etuloj tiu bienhejmo estis kvazaŭ paradizo. Tie ĉiam blovis pura aero. Kristalsimila pura akvo en ĝia akvujo — entute la tuta atmosfero — aldonis al la bieno karakteron de *tapaban* — arbara hejmo de antikvaj hindaj saĝuloj, pri kiuj oni legas en malnova hinda literaturaĵo.

Mi aŭdis de mia patrino, ke mia patro iam regule kaj sole pasigis tempon en sia bienhejmo kaj meditis. Poste, kiel plenkreskulo, mi trovis en lia librejo la verkon Raĝajoga de Patanĝali. Plej verŝajne la patro

dum jaroj antaŭ mia naskiĝo regule praktikis jogon. La patro mem neniam parolis pri sia medita vivo al mi dum infanjaroj. Tio, ke la patro manĝis nur unufoje dum la tago, kaj ke li posedis grandan laborkapablon, klare montris, ke li regule jam praktikis jogon. Dum infanjaroj mi vidis la patron festi specialan tagon en tiu bienhejmo ĉiujare. Tiam li invitis la vilaĝanojn al *kirtan* — preĝkanto. Ankaŭ ni infanoj partoprenis tiun solenan feston. La patro mem estis altranga kantisto, kaj tiun tagon en frua mateno oni fervore kantadis la gloron de la Lordo laŭ maniero trovebla en Brahma-samaĝ. Post la fino de *kirtan* en la tagmezo, li kutimis regali la partoprenantojn per tagmanĝo.

Dum la pluvperiodo, kiam la bienhejmo aspektis kiel insulo, kaj kiam la kreskantaj rizplantaĵoj kaj akvoherboj ĉirkaŭis la bienon, tiam ni infanoj sub zorgo de plenkreskuloj kutimis viziti la bienon per hejma boato. Tiam la spektaklo estis tute alia. De la bienhejmo ni tiam ĝuis la ŝanĝiĝeman perspektivon de la ĉirkaŭaĵo. Grandaj kaj malgrandaj boatoj diversformaj kun veloj kaj sen veloj moviĝis ĉiudirekten. La fiŝistoj en siaj tipaj boatoj kaptis fiŝojn per retoj. La kamparanoj en sia boatoj kolektis akvoherbojn — manĝaĵon por siaj bovinoj. Ni, iom pli grandaj junuloj, ŝtele eliris el la bieno per malgranda boato por memstare ekskursi kaj kolekti akvoliliojn — blankajn, bluajn kaj ruĝajn, kiuj ofte floris ie kaj tie. Dum ege trankvila vetero la kamparanoj en siaj boatoj moviĝis sur la vasta akvosurfaco por kapti fiŝojn kaj speciale testudojn.

Preskaŭ ĉiujare dum la pluvperiodo aperis karavano de strangaj boatoj kun pli strangaj homoj. Oni

nomis ilin *vedda*. Ĉe iu oportuna altaĵo la karavano boata haltis. Alivorte, la gvidantoj de tiuj boatoj uzis teraltaĵon kiel havenon. De tiu haveno oni per malgrandaj boatoj moviĝis al vilaĝoj kaj kaptis serpentojn. Ili parolis fremdan lingvon inter si, sed kun ni oni parolis bengale en alia dialekto. Ili kunportis rimedon kontraŭ serpentveneno kaj ofte vendis tion al kredemaj vilaĝanoj. La lokaj vilaĝaninoj kaŝe akiris herban medikamenton de tiuj strangaj viroj. La *vedda*-homoj kutime estis bonkondutaj kaj parolis afable, tamen ni infanoj ĉiam kun timo kaj suspekto alproksimiĝis al ili. En kansakoj ili portis diversajn serpentojn. Ili restis kelkajn tagojn en iu loko kaj poste malaperis.

La ĉarmo de tiu sezono en mia hejma regiono estis granda, ĉar nur tiam oni per boato vizitis parencojn en malproksimaj lokoj. Ĉiuj komercistoj moviĝis kun siaj varoj per boatoj. Tia estis tiam la kutimo. Tiuj, kiuj devis veturi plurajn tagojn per boatoj, devis foje halti ĉe vilaĝa haveno aŭ tiu de merkato aŭ bazarplaco por aĉeti manĝovarojn aŭ por pasigi nokton. En haltejoj oni kuiris manĝaĵon kaj pasigis nokton. Dum tiu sezono oni povis aŭdi belajn popolkantojn de boatistoj. Kutime oni kantis en plena voĉo, kaj la melodio naĝis longan distancon kaj kelkfoje karese vekis la dormantojn. Kelkfoje la enhavo de popolkanto estis ĉarma kaj la melodio estis eĉ kortuŝa. Kelkajn tiajn popolkantojn, kiujn mi tiam aŭdis, mi ankoraŭ retenas en mia memoro. Jen specimenoj:

"Memoru la Ĉiopovulon! Ho boatisto!
Ĉiam estu preta kun remil' kaj velo.
Ne perdu okazon de favora tajdo,

ne perdu okazon de favora vento,
se vi nepre deziras atingi la celon
kaj pensas renkonti vian karulon."

Jen estas alia specimeno aŭdinta dum noktofino:

"Vekiĝu! Ho vi dormanto!
Lumiĝas orienta horizonto.
Kial vi ankoraŭ dormas?
Kiu dum tagiĝo dormas,
tiu dum sia vivo pentas,
tiu neniam komprenas
gloron de l'Kreinto
kaj de l'universo."

En tiaj popolkantoj ni aŭdis tion, kio kuŝas profunde en la vivo de simpla vilaĝa popolo. Plej verŝajne tiu tempo estas for. Sed la impresoj ankoraŭ restas freŝaj en mia memoro. Popolkanto ĉiam plaĉis al mi.

Memoro de boatkonkurso

Unu el la plej memorindaj okazintaĵoj dum miaj infanjaroj en la gepatra hejmo estas boatkonkursoj, kiuj okazis ĉiujare en la fino de la pluvperiodo en nia riverplena regiono. Kutime tia konkurso okazis post la tago de Biŝoripuĝa — la preĝado al la serpentdiino. Tiu ceremonio okazis en ĉiu hindua hejmo en nia regiono. Monaton antaŭ tiu tago la vilaĝanoj ĉiuves-

pere kolektiĝis en ies hejmo, kaj iu maljunulo melodie laŭtlegis la tragedian rakonton de Lakŝmindhar, trovebla en Padma-purana. Alia nomo de la sama diino estas Manaŝa. La kutimo preĝi al la serpentdiino laŭdire troviĝis nur en nia hejma regiono kaj en certaj lokoj de orienta Bengalujo, kiu nuntempe nomiĝas Orienta Pakistano.

La aranĝintoj de la boatkonkursoj anoncis en ĉiu bazarplaco per tamburbatado pri dato kaj loko de okazonta konkurso. Tiu estis tiutempe la kutima maniero de anoncado publika. Cetere la novaĵo atingis al ĉiu domo pere de la popola buŝo. Sendube la anonco pri boatkonkurso estis plej ekscita por ĉiu kaj speciale por la etuloj. La vilaĝanoj — viroj, virinoj — junaj kaj maljunaj — kune kun infanoj per plene ŝarĝitaj boatoj ekveturis al la konkursplaco. Tiutempe la vasta kampo en ambaŭ flankoj de la riverfluo restis sub akvo. Per longaj bambuaj stangoj oni gvidis boaton al konkursloko, kiu kutime estis la rivervojo. Multmiloj da hejmaj boatoj kun pasaĝeroj el ĉiuj direktoj kolektiĝis en ambaŭ flankoj de la konkursloko, kiun oni montris per starigo de longaj bambuaj stangoj. La longaj konkursboatoj, bele koloritaj kaj pentritaj, aperis sur la sceno. La rapidmovaj kutimaj konkursboatoj nomiĝis *saranga*. En ambaŭ flankoj sur tia boato sidis remistoj are. En la mezo staris ĉefkantisto, kaj apud li sidis tamburisto, kaj fine en la malantaŭa parto firme staris direktkontrolisto kun longa remilo. La remiloj estis arte pentritaj, kaj laŭ akompano de muziko oni ritme remis. Kutime konkurso okazis inter du elektitaj boatoj, sed povis ankaŭ partopreni dek ĝis dudek boatoj. Posttagmeze komenciĝis la konkurso kaj finiĝis je vesperiĝo.

La momentoj de konkurso estis ege ekscitaj. Antaŭ konkurso ĉiu boato estis remata tra la tuta akvokampo kun bela muziko. La vizitantoj multe ĝuis la muzikon. La vilaĝpoetoj estis ankaŭ komponistoj de tiaj kantoj. Ni infanoj estis parkere lernintaj multajn kantojn. La muziko kaj enhavo de kanto estis bela — kelkfoje amuza, kelkfoje kortuŝa. En tiu okazo oni ĉiam kantis plenvoĉe. Post pli ol kvindek jaroj eĉ hodiaŭ mi memoras kelkajn kantojn. Jen estas specimeno:

"Ho frato Balai, ordonon de l'patrino
vi forgesis, ordonon de l'patrino
vi forgesis.
Patrino ordonis reveni hejmen
antaŭ mallumiĝo.
Taglumo forflugas,
suno malleviĝas,
tamen vi ne revenas.
Subala krie respondas:
Bovineto ne troveblas.
Ho frato Balai, ordonon de l'patrino
vi forgesis."

La supra kanto temas pri vivokazo de la superhomo Krišna, kiu kun la fratoj Balai kaj Subala paŝtis en Vrindavana. Tia estis tipa popolkanto! Ĝia enhavo montras, kiel vivokazintaĵoj de Krišna penetris la vivon de la popolo en la lando. Laŭdire Krišna vivludis, kiel faras ĉiu homo sur la tero[1]. Krišna tion

[1]) Esenca trajto de la vaišnava koncepto pri Dio estas la Dia ludo (*lila*). La ludo estas drameca, spontana kaj ne limigita de tempo kaj spaco. Sed kiam Dio mem volas, lia ludo fariĝas videbla, kaj tio estas, kio okazas, kiam avataro aperas sur la tero. (Noto de la eld.)

faris kiel paŝtista knabo kaj ĉiutage matene gvidis la bovinojn kune kun la fratoj Balai, Subala kaj aliaj al la arbara monto Govardhana, kiu ankoraŭ estas trovebla. La vaiŝnavoj konsideras tiun monton kiel sanktan lokon. Ĉiujare oni are vizitas la monton. Nu, la patrino de Kriŝna kaj Balai ĉiutage memorigis la filojn reveni hejmen antaŭ mallumiĝo! Jen estas temo de la kanto! Ĉiu fazo de vivo de Kriŝna interesas la hinduojn. La enhavo de simpla kanto montras maltrankvilon pro mallumiĝo kaj perdo de bovineto!

Kiam ni aŭskultis tiun senesperigan enhavon de iu kanto, ni tuj konkludis, ke la konkursboato malsukcesis! Tial estis tia enhavo kaj melankolia muziko!

La vilaĝpoetoj plej ofte elektis temojn el la vivo de Kriŝna aŭ Rama. Kriŝna de Vrindavana kaj Rama de Ramajano estis la kutimaj fontoj de tiaj popolkantoj. Jen alia kanto:

"Lakŝman morte vundiĝis,
Rama ploris kaj parolis: —
Ho Lakŝman, mia kara frato!
Lakŝman ne montris signon de l'vivo!
Senespere Rama diris al Hanuman:
Mi ne plu revenos al hejmo!
Vi, Hanuman, diru al patrino,
ke en batalo mortis Lakŝman
kaj ke tigro formanĝis Rama."

La vilaĝpoeto pro la mortvundo de Lakŝman estis tiom malfeliĉa, ke li ne volis, ke Rama portu la novaĵon al la patrino de Lakŝman. Tial la malfeliĉa poeto alportis en la scenon tigron, kiu ne estas trovebla en Ramajano. Tio estis fantazio de malfeliĉa vilaĝpoeto.

Post la boatkonkurso ĉiu boato — venkinto kaj venkito — ricevis medalojn en formo de vivantaj ŝafoj kaj anasoj, tiel ke oni post reveno al la hejmo povis festi kaj bone manĝi.



Konkurso de "Palhar" kaj "Majur-panki"

Jam dum la infanjaroj, kiam mia avo vivis, mi aŭdis rakontojn pri pasinta tempo, kiam la riĉuloj konstruis "*palhar*" kaj "*majurpanki*" — tute aliajn tipojn de konkursboatoj. Laŭdire *palhar* aspektis kiel grandioza marserpento — pratempa besto kun alta kolo. *Majurpanki* similis laŭforme al pavo — nacia hinda birdo. Mia avo kelkfoje rakontis al ni pri pasintaj epizodoj en la vilaĝa vivo kaj pri konkurso de *palhar,* kaj tial la vilaĝanoj kune petis al mia avo okazigi konkurson de *palhar* kaj ankaŭ de *majurpanki.* Mia avo kontaktis kaj konsultis la riĉulojn en nia regiono. Finfine, post unu aŭ du jaroj, tri *palhar* kaj unu *majurpanki* estis pretaj. La loĝantoj (fiŝistoj) de kelkaj vilaĝoj estis tiam famaj pro sia kapablo remi tiajn boatojn. La avo proponis al la remistoj bone pretigi sin. La specialaĵo de tia konkurso konsistis en tio, ke muziko, danco kaj remado moviĝadis samtempe kiel en simfonio.

En plenluna tago en la monato aŭgusto okazis la granda spektaklo de *palhar*-konkurso. Mi ĝin vidis, partoprenis kaj plenĝuis la unuan fojon kaj ankaŭ

la lastan fojon en mia vivo. Plej eble tia afero neniam ripetiĝos en la estonteco. Tiu tempo forpasis.

Nu, unu el tiuj *palhar* du tagojn antaŭ la konkurso antingis ŝtuparon de nia vilaĝo. Ĝia bela, granda kaj ĉarma apero ŝajnis mirinda. Alta, longa estis ĝia antaŭa parto kvazaŭ giganta kaj ridanta kaj nekutima serpento. Ĝiaj okuloj ŝajnis ege vivaj. Ĉirkaŭ ĝia kolo estis girlando ellaborita el bele kolorita ligno. La tuta boato estis bele kolorita kaj ornamita. En la mezo sur planko staris templosimila konstruaĵo. Ankaŭ la multnombraj remiloj estis pentritaj per ruĝa kaj verda koloroj. En la frua mateno de la konkurstago oni gvidis la boaton al la vilaĝo de la remistoj.

Antaŭ tagmezo post rapida lunĉo mia avo kaj ni gefratoj per hejma boato veturis al la konkurskampo. Multmiloj da hejmaj boatoj plene ŝarĝitaj de scivolemuloj kolektiĝis tie.

La ĉefa vidindaĵo tie estis tri *palhar* en plenplena kaj belega kostumo — gracie moviĝantaj sur la vasta akvosurfaco. Kia nekredebla spektaklo estis! La remistaro portis specialan kostumon; *gungur* — aro da sonoriloj el metalo — ĉirkaŭis ĉiun remilon. La muzikgvidanto staris en la mezo kaj apud li dancis urso (persono, kiu portis ursosimilan kostumon). La urso dancis laŭ la muziko kaj kantado de la remistaro. Sonorado de *gungur* fariĝis parto de la simfonio. La spektaklo estis nekredebla. Al mi ŝajnis, ke mardiinoj aperis antaŭ mi.

Oni gvidis mian avon kaj min al unu el tiuj tri *palhar!* Nia *puĝari* kun hejma diidolo estis kun ni. La aliaj fratoj kaj parencoj estis en dua kaj tria *palhar*. Ĉiuj tri moviĝis jen malrapide, jen rapide, sed ĉiam gracie laŭ ritmo de la danco kaj muziko.

Kaj kia muziko estis! Oni kantadis en belega melodio pri eterna amo de Radha kaj Krišna. Jen estas specimeno:

"Kiu kantas per fluto gloron de l'Radha?
Ĉu estas li, kies amo inundis vivon de l'Radha?
Kiel mi alportu akvon el Jamuna;
sur ĉiu stuparo de Jamuna troviĝas Krišna."

Mi estis iom tro juna por kompreni kaj ĝui la enhavon de tia kanto pri altruisma amo eterna inter Radha kaj Krišna. Sed ĉiuokaze ĉarma estis la melodio en tiu nekredebla, sorĉa atmosfero. Dum mia posta vivo mi neniam plu vidis konkurson de *palhar* kaj ankaŭ ne aŭdis tian muzikon kaj melodion. Dum longa tempo daŭris la spektaklo de la gracie moviĝanta *palhar* sur marosimila vasta akvosurfaco. Ĉirkaŭ kvindek mil homoj en hejmaj boatoj ĝuis tion. Fine la suno alproksimiĝis al la okcidenta horizonto. La sundisko respeguliĝis en la akvo. Ĝuste tiam okazis la vera konkurso inter tiuj tri *palhar*. Tio estis streĉa kaj ege ekscita! Fine tiu *palhar*, sur kio mi troviĝis, venkis, kaj ĉiuj kriis pro ĝojo kaj feliĉo. La ĉefremisto petis de mi mian *caddar* — longan koltukon el silko. Mi devis fordoni ĝin al li. Li metis ĝin, kiel signon de venko, ĉirkaŭ la alta kolo de *palhar*.

Dume la suno malleviĝis kaj malaperis sub la horizonto, sed plenplena luno fariĝis videbla en la tropika ĉielo kaj kreis misteran atmosferon. Tri *palhar* kun remistoj kantantaj en akompano de muziko moviĝis kaj ĉirkaŭis en la proksimaj vilaĝoj, tiel ke tiuj — speciale la virinoj — kiuj ne povis ĉeesti en la konkursplaco, ankaŭ povis vidi kaj ĝui la spektaklon. Finfine en la nokto ĉirkaŭ la naŭa, tri *palhar* gracie moviĝis al nia vilaĝo. La remistoj kolektiĝis en nia

hejmo. La avo oferis abundan manĝon al la remistoj kaj gastoj.

En la sekvanta jaro mi ankaŭ spertis la spektaklon de *majurpanki*. La aspekto kaj koloro de *majurpanki* similis, kiel jam dirite, al tiu de hinda birdo — pavo. Oni ne uzis ĝin por konkurso, sed nur por ĝui la spektaklon — nome muzikon kaj dancon; kaj tio ne okazis en taglumo, sed en plenplena lunlumo en ege trankvila atmosfero. La birdosimila boato kvazaŭ laŭdezire moviĝis sur la akvosurfaco. La remistara muziko en luna nokto estis vere ensorĉiga. La enhavo de kantoj temis pri eterna amo de Radha kaj Krišna.

Post multaj jaroj — post mia reveno al mia hejmo el Eŭropo — mi vizitis la vilaĝon de tiuj remistoj kaj akiris la enhavon de kelkaj boatkantoj. Jen estas specimeno:

Unu

Ho karulo, mia koro preskaŭ haltas,
se vi daŭre kaj longe forestas,
se vin longe mi ne vidas.
Ho amiko, kiam en kuirejo kuiras mi,
se tiam per fluto muzikas vi,
por renkonti vin mia koro sopiras.
La kruelaj parencoj scivolas,
kaj demandas, kial mi ploras.
Mi respondas,
ke fumo de lignofajro
okulojn miajn larmigas.

Du

De mia naskiĝo mi lin vidis,
tamen okuloj miaj neniam satiĝis.
Dum vivoj lin en mia koro portis
tamen mia koro neniel trankviliĝis.

La nekonataj vilaĝpoetoj verkis tian lirikon kaj aldonis melodion al ĝi. En la supra poemo oni trovas uzon de la vorto vivo*j*! Tio kredeble montras al la hindua filozofio de renaskiĝo! Ĉiu ja deziras feliĉon en sia vivo! Por akiri feliĉon oni faras ĉion, sed vera feliĉo ja dependas de memrealiĝo kaj eterna amo al la Kreinto. Sed kio estas memrealiĝo? Nu, mi ne estas filozofo kaj tial devas fini la temon!

Ŝanĝo en socia vivo

La unua infano de miaj gepatroj estis mia fratino. Mi apenaŭ atingis la sepan jaron, kiam ŝi edziniĝis kun sinjoro, kiu estis studinta en la universitato de Ohio en Usono. Pro diversaj kaŭzoj gravaj, tiu festeno por ĉiam restas memorinda al mi. Mia fratino tiam estis ĉirkaŭ dekokjara junulino.

Antaŭ la solena festeno kaj ceremonio, nia hejmo aspektis kiel granda laborejo. Oni renovigis ĉiun domon. La granda *natmandir* — la halo — estis bele reordigita. La lokaj artistoj kiel eble plej bele ornamis la halon. Pluraj vitraj kandelujoj estis pendigitaj. Oni alportis el urbo belajn persajn tapiŝojn kaj kovris ĝian plankon. La proksimaj kaj malproksimaj parencoj — sinjoroj kaj sinjorinoj, junuloj kaj junulinoj kaj infanoj — kolektiĝis en nia hejmo. La tuta hejmo vibris pro vivenergio. La okazo estis por ni infanoj

granda evento. Feliĉe, dum tiu monato ni ne plu bezonis regule studi matene kaj vespere. Cetere ni infanoj memvole kaj laŭ kapablo helpis al la laboro de la plenaĝuloj. La plej interesa loko en la hejmo tiam estis la kuirejo, kie la patrino, onklinoj kaj aliaj parencinoj preparis kaj frandis bongustan dolĉaĵon. Mi libervole helpis la patrinon. Ke mi tion faris ne pro altruismo, tion komprenis mia patrino eble plej bone. Kompreneble mi ĝuis dolĉaĵon iom pli ol la aliaj dum tiuj tagoj.

La ĉarpentisto preparis novajn kaj belajn palankenojn por alporti la edziĝonton kaj gastojn el la stacidomo, kiu kuŝis ses aŭ sep kilometrojn malproksime de nia hejmo. La laboro de la ĉarpentisto multe plaĉis al mi, kaj mi penadis esti helpema al li. Li ankaŭ riparis kaj renovigis malnovajn meblojn kaj ankaŭ pordojn kaj fenestrojn de ĉiu domo.

Sed dum tiu festeno okazis io, kio, kiel signo de ŝanĝo en la socia ordo hindua, multe influis mian postan pensvivon. Mi, kiel malgrandulo, subite konsciis pri fakto, ke la brahmanoj gvidas kaj regas la hinduan socian vivon. Estis evidente, ke la tiama brahmana socio en la distrikto de Sylhet estis ege ortodoksa kaj ankaŭ forta.

Iun tagon nia *purohit* alvenis kaj parolis al miaj parencoj: "La geedziĝo ne povas okazi, ĉar la brahmana socio ne volas aprobi la aferon kaŭze de tio, ke la edziĝonto transveturis maron kaj plej kredeble manĝis malpuran manĝon — nome bovoviandon."

La *purohit* ne kuraĝis transdoni la novaĵon rekte al mia patro. Sed la parenco tuj informis mian patron kaj ankaŭ la onklojn pri la afero.

La onkloj loĝis en urboj kaj estis elstaraj kaj kle-

raj viroj kaj cetere ili estis modernaj en vivkoncepto, Ili tute ignoris la aferon. Sed la patro parolis al la brahmanoj iom ekscite: — "Ni montras respekton al vi brahmanoj laŭ la tradicio, sed ŝajne vi nuntempe portas la sanktan ŝnuron pro nenio; vi ne plu posedas la klerecon kaj la saĝecon, kiun la brahmanoj en pasinta tempo havis. Ni firme decidis la geedzecon kaj nun neniu povas aliigi la decidon."

"Sed tiuokaze la brahmanoj nek akceptos vian inviton, nek manĝos en via hejmo", diris nia *purohit*.

"Ne gravas, se tiel okazos", respondis mia patro.

La interparolo kaj disputo finiĝis, sed komenciĝis maltrankviliga moviĝo en la hindua socio de Sylhet. La tuta hindua socio de la distrikto dividiĝis en du partioj, progresema kaj ortodoksa. La progresemuloj firme aprobis la geedzecon.

Ni malgranduloj havis la avantaĝon aŭdi la pensmondon de ambaŭ partioj. Jen estis la unua okazo en mia juna vivo, kiam mi ekhavis la ideon viziti malproksimajn fremdajn landojn trans la maro, kaj dediĉi mian vivon al socia justeco kaj bonfaro, kaj fakte mi vizitis la landojn de Eŭropo trifoje en mia vivo.

Nun, skribante pri la infanjaroj, mi kiel maljunulo, trovas grandan ŝanĝon en hinda socia vivo. Ŝajnas al mi, ke en tempo venonta la socia ordo multe ŝanĝiĝos. Ĉar la socia ordo laŭ Manu-samhita — malnova verko pri sociaj leĝoj kaj kondutoj — ne estas plu aplikebla en la moderna homa socio kaj ekonomio. Fakte, la socia evoluo de hindua socio stagnis antaŭ multaj jarcentoj. Favore al la malnova socia ordo mi nun povas diri, ke multrasaj popoloj kun diversaj religiaj kredoj kolektiĝis dum daŭro de multaj jarcentoj sur la tereno de Hindujo. La vivarto de variaj

rasoj kaj popoloj kun religiaj kredoj ege diversaj similis al paralelaj linioj, kiuj neniam plene renkontiĝis, sed tamen staris unu apud la alia. La kasta sistemo disfalas depost la tempo, kiam, dum la lasta jarcento, Brahma-samaĝ estiĝis sub gvidado de Raĝa Rammohan Raj. La vivago de Iŝvar Ĉandra Vidjasagar ankaŭ multe helpis la ŝanĝon en malnova socia ordo. Fakte la agado de Brahma-samaĝ estis ege racia, kaj tio vole-nevole, eĉ senkonscie, helpis la ŝanĝon en la socia strukturo de hindua socia vivo.

Post sendependeco de la lando la multjara kastsistemo estis nuligita laŭleĝe. La ŝtato ankaŭ multe planas kaj elspezas por la bonfaro en hinda socia vivo. Sed la influo de tradicia socia kutimo formortas malrapide. Laŭ mia opinio la ortodoksaj hinduoj elspezas ankoraŭ tro multe por tradiciaj religiaj festoj. Se oni nur elspezus tiun sumon por socia bonfaro, Hindujo aspektus tute alie. Konscio pri socia bonfaro estas tie, sed ankoraŭ la kompreno de socia bonfaro ne estas sufiĉe granda, kaj mi kredas, ke tia ŝanĝo povas okazi nur pere de eduko kaj kleriĝo de la popolamaso.

La unua mondmilito kaj la malsato

Mi estis naŭjara knabo, kiam la unua mondmilito komenciĝis en 1914. La novaĵo kreis grandan sensacion en la vivo de nia fora vilaĝo. Mia patro abonis

plurajn ĵurnalojn. Ĉiutage, kiam la poŝtisto alvenis kun la taga ĵurnalo, la vilaĝanoj kolektiĝis sur la korto de nia hejmo por aŭdi militnovaĵojn. Iom post iom ni vilaĝanoj longe for de militkampo ankaŭ eksentis la efikon de la milito. Alumetoj ne plu estis facile aĉeteblaj, la vestaĵoj fariĝis ege karaj, la prezoj de grenoj kaj aliaj manĝovaroj daŭre altiĝis.

Malfeliĉo ŝajne neniam venas sola. En 1916 okazis granda kaj terura inundo en nia distrikto. La rizplantaĵo en la distrikto estis subakvigita kaj tute detruita. Timo pri malsato evidentiĝis sur la vizaĝo de ĉiu homo. Granda manĝoprovizo en nia hejmo rapide malpleniĝis.

Dum tiu tempo mia avo, kiu ankoraŭ zorgis la tutan familian aferon, rapide maljuniĝis. Liaj nigraj haroj kaj lipharoj dum mallonga tempo blankiĝis. Ofte li veturadis per boato al bazaroj, sed revenis hejmen kun longa kaj sekigita vizaĝo. La necesa manĝovaro nenie estis akirebla! La jaron 1916 mi neniam povas forgesi. Eĉ en nia sufiĉe riĉa hejmo ni devis vivi per nekutima kaj malofta manĝaĵo.

Dum tiu terura tempo mi tamen trovis mian patrinon ege trankvila. Ŝia konduto estis komfortodona al la hejmanoj. Ŝi neniel montris ĉagrenon malgraŭ la fakto, ke ŝi mastrumis nian grandan familion.

Iun tagon ŝi regalis nin — anstataŭ per rizo — per dolĉa terpomo, kiun oni nur okaze manĝas dum festenoj. Ni junuloj tamen ĝuis la maloftan manĝaĵon. Alian tagon ŝi igis nin manĝi bongustan kaĉon de rizpulvoro. Ankaŭ tio gustis bone kun buteroleo. Fakte ŝi neniel lasis nin senti, ke regas malsato en la lando. Dum tiu kriza tempo mi spertis, kiel anime forta estis mia patrino. Ĉiuokaze, dum monato la vila-

ĝanoj fakte malsatis kaj vivtenis sin per eksterordinara manĝaĵo de diversaj kreskaĵoj.

Fine iun tagon la distriktoficiro vizitis nian vilaĝon. Li alveturis per granda kaj bela boato. Li estis anglo. Tiujare la grandaj kaj vastaj rizplantejoj en nia regiono aspektis kiel maro. Eĉ ne eta verdaĵo aŭ akvoherbo estis videbla. Ankaŭ la bovinaro malsatis kaj rapide formortis. Kadavroj de bovinoj ofte troviĝis naĝantaj sur la akvosurfaco. Estis teruriga spektaklo. La vulturoj daŭre havis abundan festenon.

Pro malsato mortis homoj are; pro manko de vestaĵoj multaj virinoj mortigis sin mem. Kiam la situacio fariĝis terura, tiam aperis en la merkato Burma-rizo, kiu ŝanĝis la staton. La bonkora distriktoficiro distribuis rizon senpage al la malriĉuloj. La vilaĝanoj — terkulturistoj — petis de li rizosemojn. Estis klare, ke la oficiro estis simpatia kaj bonkora persono. Li promesis helpon al la vilaĝanoj kaj poste li plenumis sian promeson.

Mia patro dum sia tuta vivo penadis enkonduki kulturadon de diversaj grenoj dum diversaj sezonoj en nia regiono, ĉar li kredis, ke tie kuŝas la solvo de malsato, kiu regule post kelkaj jaroj okazas pro subita inundo. Do je la fino de la malsato li traveturis la tutan Hindujon kaj speciale tiujn regionojn, kie oni kulturis plurajn grenojn dum la jaro. Samtempe li studis bovinflegadon en diversaj partoj de la lando.

Reveninte hejmen post jaro, li pligrandigis sian bienon kaj komencis eksperimenti kulturadon de diversaj grenoj. Kun granda entuziasmo li flegadis bovinojn. Ĉiutage vespere li skribis sian observadon kaj pri terkulturaĵo kaj pri laktodona kapablo de

diversaj bovinoj. Dum tiu tempo granda kvanto da lakto estis havebla en nia hejmo. Ĉiu en la hejmo trinkis lakton abunde. Cetere oni preparis buteroleon. La hindoj tiutempe ne uzis buteron tiom, kiom oni uzis buteroleon.

Familia katastrofo kaj mia studado

Ni estis sep fratoj. Laŭorde mi estis la kvara. Kiam mi atingis la duan klason en la lernejo, tiam mia unua frato studadis en la universitato en Kalikato; la dua frato studis en Hindu-universitato en Banarasi kaj la tria tiam eniris gimnazion en la distrikturbo Sylhet. Kiam la tria forlasis la hejmon mi ege sentis lian foreston, ĉar ni estis ege intimaj. Li posedis belan kaj melodiriĉan voĉon, kaj ni estis kune kantintaj ĉiutage antaŭ nia hejma templo. Ni estis ludintaj kaj naĝintaj kune. Fakte li estis mia plej intima kunulo. Ĉiam kaj ĉie mi kiel ombro sekvis lin. Mi ankaŭ alte estimis lin, ĉar li estis brila en studado. La instruistoj kaj vilaĝanoj ege amis lin.

Post lia forveturo, iun tagon la patro preparis sin veturi al malproksima loko koncerne sian industrian entreprenon. Ĝuste kiam la patro estis preta veturi, alvenis la poŝtisto kun telegramo. Ĝi alportis la malbonan novaĵon, ke tiu mia frato kaj aminda kunulo

subite mortis. Nia hejmo kaj la tuta vilaĝo subite estis en firma premo de funebro. Ĉiu bedaŭris. Perdinte karan fraton, mia penso iris alidirekten. Ĉiu naskito ja devis morti frue aŭ malfrue, kaj mi memoris pri la vivo de Buddha.

Mia patro montris nenian emocion pro la subita morto de kara filo, sed penadis konsoli la patrinon kaj aliajn hejmanojn. Tiel daŭris kelkaj tagoj. Sed montriĝis granda ŝanĝo en la konduto de mia patro. Lia industria entrepreno ŝajne ne plu interesis lin. Lia ĉiutaga vivmaniero abrupte ŝanĝiĝis. Pli longe li sidis en la templo kaj meditis. Estis klare, ke li tute perdis la intereson pri sia industria entrepreno, kiun li sukcesplene gvidis dum pli ol dudekkvin jaroj. Kiel kutime li vizitis sian bienan hejmon ĉiutage kaj pli intense laboris por eksperimentado pri produktado de grenoj.

Lia industria entrepreno ekhaltis. Samtempe ankaŭ lia enspezo subite malaltiĝis. Kompreneble la produktoj de la terkulturo sufiĉis por nutri la hejmanojn, sed ili ne alfluigis monon tiom, kiom la industrio.

En 1917 mi finis la sesklasan ekzamenon de mezgrada angla lernejo. La patro proponis al mi resti hejme kaj eklerni de li la arton de terkulturo kaj bovinflegado. Li konsideris, ke la tiutempa eduksistemo estas netaŭga por la progreso de la popolo, ĉar la filoj de terkulturistoj post studado en lernejo ne plu volis kulturi teron, kaj — kio estis multe pli malbona — post vizito al lernejo neniu volis labori per mano. Nu tio ja estis fakto. Mia patro tamen deziris, ke mi daŭrigu la studadon en nia hejmo sub gvido de instruisto kaj samtempe laboru en lia bienhejmo.

diversaj bovinoj. Dum tiu tempo granda kvanto da lakto estis havebla en nia hejmo. Ĉiu en la hejmo trinkis lakton abunde. Cetere oni preparis buteroleon. La hindoj tiutempe ne uzis buteron tiom, kiom oni uzis buteroleon.

Familia katastrofo kaj mia studado

Ni estis sep fratoj. Laŭorde mi estis la kvara. Kiam mi atingis la duan klason en la lernejo, tiam mia unua frato studadis en la universitato en Kalikato; la dua frato studis en Hindu-universitato en Banarasi kaj la tria tiam eniris gimnazion en la distrikturbo Sylhet. Kiam la tria forlasis la hejmon mi ege sentis lian foreston, ĉar ni estis ege intimaj. Li posedis belan kaj melodiriĉan voĉon, kaj ni estis kune kantintaj ĉiutage antaŭ nia hejma templo. Ni estis ludintaj kaj naĝintaj kune. Fakte li estis mia plej intima kunulo. Ĉiam kaj ĉie mi kiel ombro sekvis lin. Mi ankaŭ alte estimis lin, ĉar li estis brila en studado. La instruistoj kaj vilaĝanoj ege amis lin.

Post lia forveturo, iun tagon la patro preparis sin veturi al malproksima loko koncerne sian industrian entreprenon. Ĝuste kiam la patro estis preta veturi, alvenis la poŝtisto kun telegramo. Ĝi alportis la malbonan novaĵon, ke tiu mia frato kaj aminda kunulo

subite mortis. Nia hejmo kaj la tuta vilaĝo subite estis en firma premo de funebro. Ĉiu bedaŭris. Perdinte karan fraton, mia penso iris alidirekten. Ĉiu naskito ja devis morti frue aŭ malfrue, kaj mi memoris pri la vivo de Buddha.

Mia patro montris nenian emocion pro la subita morto de kara filo, sed penadis konsoli la patrinon kaj aliajn hejmanojn. Tiel daŭris kelkaj tagoj. Sed montriĝis granda ŝanĝo en la konduto de mia patro. Lia industria entrepreno ŝajne ne plu interesis lin. Lia ĉiutaga vivmaniero abrupte ŝanĝiĝis. Pli longe li sidis en la templo kaj meditis. Estis klare, ke li tute perdis la intereson pri sia industria entrepreno, kiun li sukcesplene gvidis dum pli ol dudekkvin jaroj. Kiel kutime li vizitis sian bienan hejmon ĉiutage kaj pli intense laboris por eksperimentado pri produktado de grenoj.

Lia industria entrepreno ekhaltis. Samtempe ankaŭ lia enspezo subite malaltiĝis. Kompreneble la produktoj de la terkulturo sufiĉis por nutri la hejmanojn, sed ili ne alfluigis monon tiom, kiom la industrio.

En 1917 mi finis la sesklasan ekzamenon de mezgrada angla lernejo. La patro proponis al mi resti hejme kaj eklerni de li la arton de terkulturo kaj bovinflegado. Li konsideris, ke la tiutempa eduksistemo estas netaŭga por la progreso de la popolo, ĉar la filoj de terkulturistoj post studado en lernejo ne plu volis kulturi teron, kaj — kio estis multe pli malbona — post vizito al lernejo neniu volis labori per mano. Nu tio ja estis fakto. Mia patro tamen deziris, ke mi daŭrigu la studadon en nia hejmo sub gvido de instruisto kaj samtempe laboru en lia bienhejmo.

La progresema patro, kiu — kontraŭ la deziro de la socio — donis la manon de sia filino al sinjoro vizitinta Amerikon, neniel volis sekvi la tradician socian konvencion kaj ordon.

Al mi nova vivo komenciĝis! Mia tagordo estis fiksita. Frumatene mi devis ellitiĝi kaj kolekti florojn el la ĝardeno por la templo. Poste mi preĝis kaj lernis parkere almenaŭ dek liniojn de Gita ĉiutage. Ĉiuvespere la patro klarigis la tekston, kiun mi lernis en la mateno. Cetere mi studadis dum tiuj jaroj verkojn de famaj bengalaj verkistoj. Tamen, mi ankaŭ devis labori en la bieno.

Kiam alvenis gasto aŭ gastoj por tranokti en nia hejmo, mi devis prizorgi ilin. Kiam la nombro de la gastoj estis pli granda ol tiu de niaj litoj, mi kutimis oferi la mian kaj mem dormi sur papero sur la planko; tiuokaze mia brako funkciis kiel kapkuseno. Tiu servado al gastoj donis ankaŭ al mi mem ĝojon.

Dum tiuj jaroj la patro verkis siajn grandajn librojn pri terkulturo, florkulturo, fruktkulturo kaj bovinflegado. Mi devis kopii manuskripton. Patro eldonis unu el tiuj verkoj dum tiu tempo. Por mi tiu periodo de mia juna vivo estis instruoriĉa. Parte pro intima kontakto kun la patro ankaŭ mi sendepende komencis pensi pri la kaŭzoj de la mizero en la vilaĝoj. Ne malmulte da almozuloj ekzistis en la vilaĝoj.

Proksime al nia hejmo ekzistas malnova templo de la lordo Ĉaitanja. Miaj prapatroj fondis tiun templon antaŭ pli ol kvarcent jaroj. Dum mia restado en nia hejmo la preĝarto multe allogis min kaj mi ankaŭ legis famajn lirikverkojn de Ĉandidas, Vidjapati, Ĝajadeva kaj aliaj vaiŝnavaj aŭtoroj. Mi kutimis mul-

te ĝui vaiŝnavan muzikon, kaj tion mi eĉ hodiaŭ ĝuas.

Alvenis tempo, kiam ankaŭ mi deziris studi en gimnazio.

Krucvojo en la vivo

En 1919 mi kun permeso de la patro veturis al la urbo Karimgunj, kie mia juna onklo loĝis. La onklo posedis propran hejmon en la urbo. Tie mi eniris en la ŝtata gimnazio. En la hejmo de mia onklo mi loĝis kaj manĝis senpage, kaj samtempe mi funkciis kiel hejma instruisto de junaj kuzoj. Tiutempe la ideo esti memstara en la vivo preskaŭ ĉasis min. La vivo kaj vivago de Iŝvar Ĉandra Vidjasagar tiel inspiris min, ke mi ne povis alie pensi aŭ agi. Mi iom post iom aĉetis ilojn por lignolaboro, kaj fine unu tagon mi ankaŭ aĉetis lignon, kiu abunde kaj malkare estis akirebla en tiu loko. Dum liberaj tagoj mi komencis konstrui meblojn — seĝon, tablon k. t. p. Feliĉe mi ankaŭ povis vendi la meblojn, ĉar en tiu urbo troviĝis multaj oficejoj de agentoj de teoĝardenoj. Sed multaj personoj miris pro mia ago. Filo de alta klaso fine laboras kiel ĉarpentisto! Tamen mi daŭrigis la praktikon de lignolaboro.

En la urbo tiam loĝis familio de angla misiisto — nome d-ro W. William kaj lia edzino. D-ro William estis bona amiko de mia patro. Mia patro ankaŭ estimis d-ron William pro lia sindona servo al malriĉaj homoj. D-ro William estis misiista kuracisto

kaj ege simpatia persono. Mi vizitis la anglan familion de tempo al tempo. Kiam d-ro William ekaŭdis, ke mi studas en gimnazio kaj samtempe laboras per mano kaj konstruas meblojn, li gratulis min kaj kuraĝigis min. Li diris, ke estas lia espero, ke mi ankaŭ povu sekvi mian patron kaj pensi sendepende kaj agi en mia vivo por la bono de aliaj. D-ro William mortis antaŭ multaj jaroj, sed mi neniel povas forgesi lian bonkorecon kaj saĝan konsilon.

Iom post iom mi komencis gajni monsumeton per mia manlaboro, kaj ŝajnis al mi, ke mi estas trovinta la vojon, kiu povas gvidi min al memstareco. Nun estas malfacile por mi klare diri, kial mi elektis lignolaboron kaj ne alian laboron. Sed estas fakto, ke mi de infanjaroj ŝatis la laboron de ĉarpentistoj kaj mia patro neniam kontraŭstaris. Ĉiuokaze mi volis esplori novan vojon en la vivo kaj ne sekvi la kutiman.

Alvenis tempo, kiam mi povis gajni po dek ĝis dekkvin rupiojn en monato per libertempa lignolaboro. Per tiu sumo mi plej ofte aĉetis bonajn librojn. Mia vivo en la gimnazio iris glate. Mia antaŭa hejma studo estis ege fruktodona kaj kleriga — tiel ŝajnis al mi. Mi sentis min pli matura ol miaj klaskamaradoj.

Fine alvenis la jaro 1921. Okazis granda nacia movado en la lando sub gvidado de Mahatma Gandhi. La nacia movado daŭre kreskis kaj subite alportis grandan ŝanĝon en la vivon de tuta popolo.

La klera loĝantaro de Karimgunj ĉiam estis politike tre konscia. Ĉiutage okazis politikaj kunvenoj. En 1921 Mahatma Gandhi traveturis la tutan landon kaj ankaŭ vizitas apudan urbon Silĉar. Ankaŭ mi deziris vidi Mahatma kaj veturis al Silĉar. La popolamaso

kolektiĝinta en Silĉar estis nekredeble granda. Mi neniam antaŭe vidis tiom grandan popolamason kune, kaj ĉiuj deziris vidi lin. Por mi estis malfacile vidi kaj aŭdi lian paroladon.Mi devis grimpi arbon por vidi lin kaj aŭdi lin paroli. Li parolis pri la denaska rajto de ĉiu popolo esti memstara. Ankaŭ antaŭ la alveno de Gandhi la intelekta alta klaso agadis politike. Sed neniam antaŭe la popolamaso en la vilaĝoj tiel interesiĝis pri politiko. Mahatma Gandhi fariĝis vera reprezentanto de la muta popolamaso de la vasta lando. Simplaj vilaĝanoj ekkredis, ke post longa tempo aperis en Hindujo savanto en formo de Mahatma Gandhi, kiu konstante parolis pri *ahimsa* — neuzo de perforto kaj uzo de amo por atingi vivcelon.

En la urbeto Karimgunj estis du gimnazioj — unu ŝtata kaj la alia privata. Krom tio ekzistis aliaj mezgradaj lernejoj. Subite Mahatma Gandhi alvokis la lernantojn de la gimnazioj kaj studentojn de la universitatoj forlasi la studadon kaj labori kaj servi la popolamason kaj ne kunlabori kun la registaro fremda. Li ankaŭ promesis akiri sendependecon al la lando, se ĉiu agus laŭ lia instruo. Li fariĝis la gvidanto de la hinda popolo, kiu devis agi por sendependeco sen armiloj. Estis sendube nova tekniko de batalo!

Iun tagon la lernantoj de la gimnazioj strikis, forlasis la lernejojn kaj paradis sur la stratoj de la urbo. Multaj aliĝis al la nacia movado. Tio estis ege kriza tempo en mia vivo. Ĉar mi ja estis alveninta el vilaĝa hejmo por finstudi en la gimnazio. Do, mi nek forlasis la gimnazion kaj nek deziris tion fari.

En la urbo la riĉaj agentoj de teĝardenoj kolektis grandan monsumon kaj fine fondis tiel nomatan "nacian gimnazion" por tiuj, kiuj volis daŭrigi la stud-

vivon. Multaj eniris la nacian gimnazion. La gvidantoj de la studenta movado ofte vizitis min kaj petis min forlasi la ŝtatan lernejon. Sed mi hezitis. Dume mi observis la funkciadon de la nacia gimnacio. Samtempe okazis io, kio igis min cerbumi multe. La strikintoj, kiuj deziris ke mi forlasu la ŝtatlernejon, daŭre ree eniris la ŝtatlernejon. Mi konkludis el tiu ago de ili, ke la plej multaj ne havas konvinkon. Kompreneble la edukdepartemento de la ŝtato kaj ankaŭ multaj gepatroj estis hezitemaj kaj maltrankvilaj pri la estonteco de siaj filoj.

Kiel jam dirite, mi ne aliĝis al la nacia studenta movado. Sed mi ofte vizitis la nacian gimnazion. Al mi ŝajnis, ke la rilato inter instruistoj kaj lernantoj en nacia gimnazio estis multe pli intima ol en kutimaj gimnazioj. En la nacia gimnazio oni instruis terkulturon, ŝpinadon, teksadon kaj lignan laboron krom la studado de variaj lernejaj temoj. Tio multe plaĉis al mi. Do, iun tagon mi forlasis la ŝtatgimnazion kaj eniris la nacian. Tie mi sentis hejmecon. Dum jaro mi studis diligente kaj finis la gimnazian studadon. En la lernejo la instruistoj estis ege helpemaj.

Iam antaŭe en la gepatra hejmo mi estis pensinta studi sanskriton post la finstudo en gimnazio, kaj tiam mi deziris veturi al Banarasi — malnova centro de sanskrita studo. Sed nun ŝajnis al mi urĝe, ke mi devas prepari min tiel, ke estontece mi povu servi la popolon plej inde. Sed kiel? Tiu demando turmentis min. Mi petis konsilon de miaj instruistoj. Oni konsilis min veturi al Kalikato kaj studi en teknika altlernejo por fine fariĝi inĝeniero. La propono estis alloga. Do, mi veturis al la gepatra hejmo. Sed kion mi trovis en la vilaĝo? Ĉiu en la vilaĝo parolis pri Gandhi, pri

C. R. Das, Motilal Nehru kaj pri gvidantoj de nacia movado. Plue naciaj propagandistoj estis vizitintaj la vilaĝojn kaj oni paroladis pri Mahatma Gandhi, pri *ahimsa* kaj liberiga movado de la lando.

Je mia granda surprizo mia pli aĝa dua frato Kshitiswar Sinha, kiu estis studinta en la Hindu-universitato en Banarasi, revenis hejmen kun firma deziro labori por klerigo de la vilaĝanoj. Ŝajne li estis multe influita de Pandit Malavja — la fondinto de la Hindu-universitato.

Iun tagon mi demandis al mia frato pri lia estonta laborplano. Li diris al mi: "Antaŭ ĉio, ni laboru por alporti lumon de ĝusta eduko al la vilaĝa vivo. La vilaĝanoj devas liberiĝi el multjara ignoreco. Kleriĝo de la popolo estas urĝe bezonata en la lando."

Por ekonomie sin subteni la frato malfermis vendejon en la vilaĝo kaj vendis vestaĵojn. Samtempe li malfermis infanlernejon en nia hejmo. La infanoj apartenantaj al ĉiuj kastoj vizitis la lernejon. Fakte mia frato elspezis tiom, kiom li gajnis per sia butiko. Post mallonga tempo li fariĝis ĉefinstruisto de mezgrada angla vilaĝolernejo. Li alportis novan vivon kaj esperon al la vilaĝanoj. Li permesis knabinojn studi ankaŭ en mezgrada lernejo. Tio sendube estis signifplena okazintaĵo en tiu tempo, konsiderante la tiaman socian baron. Mia frato estis ege klera kaj kuraĝa kaj amis la vilaĝanojn. Li estis granda idealisto.

Mi tiam estis fine decidinta studi en la teknika altlernejo en Kalikato. La gepatroj estis hezitemaj pri mia decido, ĉar studado en teknika altlernejo en loko kiel Kalikato ja multe kostos! Sed mi nepre volis esti memstara, kaj mi certigis la hejmanojn, ke neniu bezonus helpi min per mono. Mi certe trovos mian

vivovojon. Do, iun tagon mi ekveturis unue per fervojo, poste per ŝipo kaj poste denove per trajno al la granda ĉefurbo de Bengalujo.

Ne indas detale priskribi mian mallongan restadon en Kalikato. Grandurba vivo neniel plaĉis al mi. Iu grandanimulo — amiko de mia patro — helpis min per mono eniri en teknika altlernejo. Mi ekloĝis ĉe iu parenco, kiu estis advokato kaj granda patrioto. La patrino de tiu parenco estis mia onklino. Kun helpo de la onklino mi sukcesis akiri malgrandan oficon kiel instruisto; mi instruis infanojn de najbara familio, kaj kiel honorarion mi monate gajnis po kvin rupiojn. Tiun sumeton mi kutimis transdoni al la onklino, tiel ke oni ne sentu min kiel ŝarĝon.

En Kalikato mi neniam uzis ŝuon, nek tramon, nek aŭtobuson. Mi piede iris al la alternejo. Mankis al mi mono. Tamen mi vidis preskaŭ ĉion, pro kio Kalikato estas fama. Ĉion mi vizitis piede. Mi ekkomprenis, ke la diferenco inter grandurba vivo kaj tiu de vilaĝo, estas tro granda. Pro manko de rimedo mi iom post iom perdis intereson pri mia studo en teknika altlernejo. Cetere la grandurba vivo neniel plaĉis al mi. Estas interese mencii, ke dum tiu tempo la sinjorinoj de la familio de mia parenco neniam estis videblaj ekstere dum tago. Neniu virino el edukitaj familioj promenis sur la stratoj. Kelkfoje la sinjorinoj vizitis najbarojn dum nokto, kaj ankaŭ tiam akompanis ilin la servisto kiel gardisto. Kaj hodiaŭ!

Nacia movado tiam ekfloris en la granda urbo. La politikistoj kaj naciaj gvidantoj ofte faris ekscitajn paroladojn en la grandaj parkoj; la ĉiutagaj ĵurnaloj bengalaj kaj anglaj estis plenplenaj de politikaj novaĵoj. Sed bone aŭ malbone, mi neniam estis allogata

de politiko. Tiutempe mi suferis pro manko de mono, kaj iam kaj tiam mi eĉ malsatis. Tamen la forta deziro venki la malfacilaĵon regis min. Fakte mi atingis la krucejon de mia vivovojo.

Iun tagon mi legis artikolon en monata ĵurnalo pri fondiĝo de Sriniketan — la instituto de vilaĝa rekonstruo — apud fama Santiniketan de Rabindranath Tagore. Estas menciinde, ke mi jam de infanjaroj ofte pensis pri Santiniketan, kie miaj kuzoj estis studintaj. Mia kuzo Sasadhar Sinha tiam estis instruisto en la fama lernejo en Santiniketan. Do, mi decidis viziti lin kaj ankaŭ Sriniketan. Mi forvendis tre malkare kelkajn librojn, kiujn mi posedis kaj tiel kolektis malgrandan sumon. Tiu sumo estis sufiĉa por veturi al Santiniketan kaj returne. Fine, iun tagon mi envagoniĝis por viziti Santiniketan kaj Sriniketan.



Santiniketan kaj Sriniketan

Santiniketan kuŝas preskaŭ cent anglajn mejlojn malproksime de Kalikato. La trajno, kiu portis min, atingis la stacion Bolpur — la plej proksiman stacidomon de Santiniketan — ĉirkaŭ la naŭa nokte. De la stacidomo mi devis veturi per bovoveturilo al San-

tiniketan. Nokte ĉirkaŭ la deka horo la bovoveturilo haltis antaŭ la gastejo de Santiniketan. La estro de la gastejo afable akceptis min kaj montris al mi ĉambron kie tranokti. Mi informis lin pri kuzo, kiu estas instruisto tie. Tuj li gvidis min al mia kuzo, kiu tiutempe estis malsana kaj kuŝis en malsanulejo. Mia kuzo estis ege surprizita trovi min tie en la nokto. Li petis al mia gvidanto zorgi pri mi per noktomanĝo, kaj la gvidanto gvidis min al la manĝejo. Mi, sola, kiel gasto, manĝis kaj reiris al la gastejo por tranokti. La tuta loĝantaro de Santiniketan tiam dormis. En la mallumo mi ne povis vidi la lokon. Sed granda trankvilo regis tie. Estis io neklarigebla en la atmosfero de Santiniketan, kio alportis trankvilon al mia streĉa vivo kaj animo. Post longa tempo mi dormis trankvile.

Postan tagon frumatene la granda sonorilo de Santiniketan vekis min. Tio estis signalo por vekiĝo. Mi tuj ellitiĝis, kaj kion mi vidis? Nordoriente de la gastejo staris izole bela vitra templo, kiun fondis Mahariŝi Devendranath Tagore, kaj la fama *ĉatim*-arbo (Alstonia Scholaris), sub kiu Mahariŝi meditis. Sude estis fruktoĝardeno kaj aro da *sal*-arboj (Shorea robusta); pli sude staris domaro — loĝejoj de lernantoj kaj instruistoj. La klaslokoj estis aranĝitaj sub arboj. En la tuta atmosfero estis io tute alia, ol kion mi spertis aliloke. Kaj kia nekredebla diferenco inter la vivmaniero de Santiniketan kaj Kalikato!

Mia kuzo venis al mi el la malsanulejo kaj gvidis min al iu ĉambro de instruistoj, kie kelkaj kolegoj de mia kuzo estis kuniĝintaj. Tie oni bonvenigis min kaj oferis teon kaj matenmanĝon. Poste, laŭ peto de mia kuzo, iu instruisto gvidis min kaj montris al mi

la grandan bibliotekon, artdepartementon kaj diversajn loĝejojn de la lernantoj.

Troviĝis en Santiniketan lernantoj el ĉiuj partoj de la vasta Hindujo kaj ankaŭ multaj eksterlandanoj. La rilato inter lernantoj kaj instruistoj ŝajnis esti tia, kvazaŭ ĉiu apartenus al sama familio. Tio estis nova sperto por mi. Oni montris al mi du anglajn profesorojn. Unu el ili estis profesoro Collins, kiu instruis anglan literaturon al la studentoj de Visvabharati universitato. La alia, kiu havis belan barbon, aspektis kiel Kristo-bildo. Lia vizaĝo montris esprimon de homa simpatio por ĉiu estaĵo. Tiu fama anglo estis s-ro C. F. Andrews, kiu estis granda admiranto kaj de Gurudeva Tagore kaj de Mahatma Gandhi. En Hindujo oni konis lin kiel bonan amikon de la hinda popolo, kaj oni ame nomis lin *Dinabandhu* — la amiko de malriĉuloj.

Mi petis al mia gvidanto montri al mi la vojon al Sriniketan. Per fingro li montris al mi la vojon, kiu sin movis tra vasta senhoma kampo. Mi rapidis al Sriniketan preskaŭ du anglajn mejlojn malproksime de Santiniketan. Atingante Sriniketan, mi renkontis je mia granda surprizo iaman klaskamaradon el la nacia gimnazio en Karimgunj. En lia akompano mi trarigardis la tutan instituton — ĝian terkulturkampon, birdejon (kokinejon), bovinejon, vilaĝindustrion, hospitalon kaj fine la bibliotekon. En la biblioteko li montris al mi broŝuron, kiu enhavis la celon kaj tiaman studprogramon de Sriniketan. Gurudeva Rabindranath Tagore fondis la instituton en la jaro 1922 por eltrovi rimedojn por altigi la vivnivelon — socian, kulturan kaj antaŭ ĉio ekonomian — de la popolo, precipe en vilaĝoj. Iu anglo, s-ro Leonard K. Elmhirst,

kiu estis studinta agro-ekonomion en universitato en Usono, estis la unua direktoro de Sriniketan. En akompano de mia amiko, mi renkontis lin kaj esprimis mian deziron esti lia lernanto, se li volus akcepti min kun la sola kondiĉo, ke li ankaŭ afable lasu min gajni viv- kaj studkostojn per manlaboro. Ekonomie mi volis esti absolute memstara. Je mia ĝojo kaj feliĉo li tuj akceptis min.

Mia nova vivo komenciĝis en Sriniketan. Tie mi sentis min kvazaŭ hejme. Mi povis pensi libere kaj diskuti kun la direktoro kaj aliaj instruistoj pri niaj vilaĝproblemoj. Cetere mi trovis en Sriniketan la saman spiritan atmosferon, kiun mi travivis ĉe mia patro en la hejmo. Jen, fine mi trovis la ĝustan medion, kie mi povus prepari min plej inde por povi servi la popolon. La instituto havis mesaĝon por mi.

Tiutempe la mizero de la popolo en vilaĝoj estis tro granda — hodiaŭ preskaŭ nekredebla. En la vilaĝoj ĉirkaŭ Sriniketan — fakte en tuta Bengalujo — oni suferis pro malario, malnutro ktp. Famaj vilaĝindustrioj komencis rapide formorti. La terkulturado estis primitiva. En la vilaĝoj vivĝojo kaj feliĉo estis preskaŭ adiaŭintaj. En Sriniketan oni elektis kelkajn vilaĝojn kaj ilin regule observadis, studis la vivon kaj kolektis statistikon pri diversaj metioj kaj enspezoj.

Studinte en Sriniketan al mi ŝajnis, ke la terkulturistoj havas nesufiĉan vivokupon. Nur dum la pluvsezono oni kulturis teron kaj semis kaj plantis rizon. Krome la terkulturistoj bezonis apenaŭ du monatojn por rikolto. La ceteraj monatoj en jaro oni havis preskaŭ nenion por fari. Morale, ekonomie tio ŝajnis esti senesperiga afero. Industria produkto en la vilaĝoj ankaŭ estis sensignifa.

Rabindranath Tagore meditanta sub ĉatim-arbo.

L. Sinha en Eŭropo.

De dekstre: R. Tagore, C. F. Andrews, R. Chatterji.

Tri jarojn mi studis en Sriniketan, kaj dum tiu tempo mi eĉ ne vizitis la hejmon. Mi partoprenis ĉiun studprogramon de Sriniketan, kaj por gajni vivrimedon mi ankaŭ laboris ĉe japana instruisto, kiu instruis al mi lignan laboron kaj laŭ kutima kalkulo la instituto pagis al mi. Mi povis gajni sufiĉe bone por mia vivtenado.

Mi devis admiri la vivarton de mia japana instruisto. Kun edzino kaj du filinoj li loĝis en Sriniketan. Li kaj lia edzino estis ege laboremaj kaj lertaj ĝardenistoj. Li abunde kulturis legomojn, fruktojn kaj ankaŭ florojn. Li parolis malmulte, sed lia aktiva naturo, orda labormetodo senvorte instruis la fakton al mi, ke ĉiu, kiu deziras, povas tiel bele vivi. Kaj ofte mi memoris la similan agon kaj laboron de mia patro.

Fine mi estis konvinkita, ke oni povas studi kaj samtempe vivgajni. Tio donis al mi forton kaj ankaŭ imagon. Ĉi tie mi devas mencii, ke la tiamaj paroladoj de Tagore pri rekonstruo de la vivo en la vilaĝoj estis ege inspiraj al mi. Tagore deziris eduki nin — la lernantojn — tiel, ke poste ni povu esti gvidantoj memstaraj en la vilaĝoj en iliaj rekonstruaj programoj. Li ja mem naskiĝis en riĉa familio, sed li ege sentis la mizeron de hindaj vilaĝoj. En liaj verkoj oni povas legi multe pri tiamaj vilaĝproblemoj. Fakte li fondis Sriniketan por eltrovi ĝustan rimedon kontraŭ tiu mizero. Lia sentemo pri mizero de homo bele esprimiĝis ankaŭ en liaj lirikoj. Ni lernantoj dum laboro sur kampo ofte kantis tiujn kantojn, kiujn li verkis por ni. Ekzemple:

Ni plugas kun plezuro,
nia tempo pasas sur kampo.

Suno foje brilas,
ankaŭ foje pluvas.
Bambufolio moviĝas,
aero pleniĝas je odoro
de plugita tero.

Ni lernantoj plenvoĉe kaj entuziasme kantadis tiun kanton.

En Sriniketan la libertempon mi pleje pasigis en biblioteko. Mi studis la vivojn de famaj verkistoj kaj precipe edukistoj kiel Rousseau, Pestalozzi, Fröbel kaj aliaj. Kun plezuro mi legis verkojn de Tolstoj kaj Ruskin. Ankaŭ mi mem meditis pri homaj suferoj kaj precipe pri la sufero de la vilaĝpopolo. Ĉar la plej granda nombro de la hinda popolo estis vilaĝanoj.

Estis evidente al mi, ke la kastsistemo ege malfortigis la hindojn. Sed tio ne ŝajnis esti la sola kaŭzo. Krom la kastsistemo la diferenco inter edukitaj kaj needukitaj homoj en Hindujo estis tro granda. La eduksistemo estis unuflanka — nome librocentrigita kaj ne vivocentrigita. Cetere nur tre malmultaj povis viziti lernejon. Oni studis kun sola celo akiri oficon. La edukitoj estis konsiderataj kiel *vadralok* — ĝentilhomoj, kiuj neniam volis labori per mano kaj ĉiel deziris vivi je laboro de aliaj. En la lando manlaboro tute perdis dignecon. Tia vivkoncepto en homa socio ŝajnis al mi ne nur malbona, sed eĉ invitas al ruino de nia kulturo. Dum la glora periodo pasinta, la manlaboro kaj arto floris en Hindujo.

Al mi ŝajnis, ke oni povas trovi solvon de tia granda problemo nur per nova eduksistemo konforma al la nova epoko, en kiu la homoj estas pli konsciaj pri la uzo de laborilo. Oni devas pedagogie instrui manlaboron al ĉiuj gelernantoj en lernejo. Tial mi pla-

nis verkon pri "Eduka ligno-laboro" kaj komencis verki ĝin en la lumo de mia propra vivsperto. Kiam la manuskripto kaj ilustraĵoj estis pretaj, mi montris la tuton al mia direktoro. Li montris la manuskripton al Gurudeva Tagore. Post kelkaj tagoj, je mia granda surprizo, la persona sekretario de Tagore vizitis mian loĝejon kaj transdonis al mi antaŭparolon skribitan de Tagore mem. Tion mi neniam esperis. Tio estis granda momento de mia vivo kaj kuraĝigis min plue pensi kaj labori. Tagore ordonis al la eldonejo de Visvabharati, ke oni eldonu mian libron. Samtempe li deziris, ke mi laboru kiel instruisto en la lernejo de Santiniketan. Tio okazis en la jaro 1926.

Sub inspiro de Tagore mi kun granda entuziasmo komencis mian vivon kiel instruisto. Post kelkaj monatoj ni instruistoj kaj lernantoj kune planis domon. Gurudeva aprobis nian ideon konstrui la domon per propra mano, kaj la domo estis konstruita. Ĝi ankoraŭ staras en Santiniketan. La lernantoj estis feliĉaj pro la sukceso. Tiu domo dum longa tempo estis centro de la pedagogia manlaboro. Tiutempe la fama usona edukisto Kilpatrick vizitis Santiniketan. Li alte taksis la edukeksperimenton de Tagore pro ĝia vivocentrigita edukprogramo. Kilpatrick montris grandan intereson al la domo konstruita de la lernantoj kaj ankaŭ al la pedagogiaj manlaboroj, kiujn mi instruis.

Alvenis tempo, kiam mi deziris skribi pri mia sperto kiel instruisto, kaj tion mi faris sub la titolo "Eduka valoro de manlaboro kaj homa kulturo". Sed pensis mi: "Ĉu iu legos mian skribaĵon?"

Nu, ĉiujare en Bengalujo okazas kongreso de literaturistoj sub aŭspicio de Bengala Literatura Akademio. Mi sendis mian longan artikolon al la prezidanto

de tiu kongreso okazonta. Li respondis kaj petis min partopreni la kongreson kaj tralegi mian skribaĵon antaŭ la eminenta aŭskultantaro. Sed mi ja neniam staris antaŭ publiko en granda kunveno, kaj tial mi hezitis. Tamen, kiam la tempo alvenis, mi partoprenis la kongreson. En iu kunsido la prezidanto anoncis pri mia verko. Kun granda hezito mi tamen tralegis mian artikolon.

Poste tiu artikolo aperis en pluraj ĵurnaloj, kaj eĉ ĝia angla traduko aperis en la monata revuo "Welfare", redaktita de A. Chatterji en 1926. Post multaj jaroj, dum mia dua vizito al Svedlando, resumo de mia artikolo aperis ankaŭ svede en la sveda edukĵurnalo "Folkskolans Tidning" en 1933 aŭ 1934.

Mi pensis, ke se mi devus estontece servi eduksistemon de la lando, mi nepre devas akiri sperton en eduke progresemaj landoj. Tia ideo konstante ĉasis min. Mi ege alte estimis mian japanan instruiston en Sriniketan. Mi pensis, ke la japana sistemo de eduko certe estas tre progresema, ĉar ĝi povas produkti personon de tia karaktero kaj laboremo. Tial mi komencis lerni la japanan lingvon de japana studento en Visvabharati.

Post kelka tempo, iun tagon mi vizitis Gurudeva Tagore. Mi deziris lian aprobon kaj benon al mia plano akiri pli grandan sperton pri vivocentrigita eduko kaj speciale pri la valoro de pedagogia manlaboro. Li tuj aprobis mian ideon kaj rekomendis lerni slojdon en Svedlando. Por akiri pli plenan informon pri pedagogia slojdo mi veturis al Kalikato kaj renkontis la svedan ĉefkonsulon, s-ron Silverhjelm. Li afable akceptis min kaj montris al mi du grandajn volumojn de verko "Sweden", redaktita de J. Guinchard

kaj eldonita en Svedlando. En tiu granda verko troviĝis ĉapitroj pri pedagogia slojdo kaj ankaŭ pri asocioj de hejmaj kaj metiaj slojdistoj en Svedlando. Reveninte al Santiniketan, mi trovis ĉapitron en edukenciklopedio pri la vivo kaj laboro de Otto Salomon, kiu prilaboris pedagogian slojdon en Nääs, Svedlando. Mi skribis rekte al la direktoro de la slojdseminario en Nääs. Respondo alvenis, kaj oni konsentis akcepti min kiel lernanton.

En mia hejma distrikto Sylhet tiam ekzistis asocio, kiu helpis tiujn, kiuj deziris studi en eksterlando. Mi petis helpon de tiu asocio. Oni promesis helpi min per mono por unu jaro.

Tiel, en monato marto 1928 per ŝipo "Orama" mi veturis al Londono. Mi devis enŝipiĝi en Kolombo en Cejlono. Neniam antaŭe mi estis ekster mia hejmprovinco Aŝam kaj Bengalujo. En Londono tiam studis mia kuzo Sasadhar Sinha, kiu multe helpis min aranĝi mian vojaĝon trans la Norda Maro per sveda ŝipo.

En Svedlando

En Tilbury apud Londono mi enŝipiĝis en sveda ŝipo "Balder". La maro estis maltrankvila, kaj tial mi devis kuŝi en mia kajuto. La servistinoj ne parolis

angle, kaj tial dum kvar tagoj sur la Norda Maro mi estis muta pasaĝero de la ŝipo. Kiam fine la ŝipo atingis Gotenburgon, mi tuj per aŭtomobilo veturis al stacidomo, sed la ŝoforo ne parolis angle. La inteligenta ŝoforo komprenis la situacion, kaj li per mano kaptis min kaj gvidis min al proksima telefonejo. Tie oni parolis angle kaj afable donis informon pri la tempo de trajno. Per trajno mi veturis al la stacio Floda, kie renkontis min fraŭlino Anna Taube, la sekretariino de la instruista seminario en Nääs. Ŝi flue parolis angle, kaj post kvartaga muteco estis al mi agrable denove povi interŝanĝi vortojn.

Mi atingis la seminarion de Nääs antaŭ la vespermanĝo. La direktoro, d-ro Rurik Holm, varme bonvenigis min, "partoprenanton el malproksima Hindujo el la instituto de Tagore". Li prezentis min al la lektoroj kaj instruistoj kaj ankaŭ al aliaj partoprenantoj. Mi sentis hejmecon inter amikaj vizaĝoj. Oni montris al mi mian loĝejon sur monteto. De mia loĝejo al la komuna sidĉambro kaj manĝosalono estis preskaŭ sepminuta piedvojo. Oni donis al mi la tagordon kaj klarigis ĉion alian.

Nääs situas tre bele apud la lago Sävelången. La ĉirkaŭaj vidindaĵoj estis ege belaj. La kampara atmosfero estis trankviliga. Sur insuleto staris mezepoka kastelo, kie vivis August Abrahamson — grandanima riĉulo kaj onklo de la pedagogo Otto Salomon.

La mastrino de la manĝosalono afable gvidis min al manĝotablo. Pli ol ducent gepartoprenantoj sidis tie por manĝi. Ĉirkaŭ mia tablo troviĝis nur fraŭlinoj, kiuj konstante penadis regali min kaj eltrovi mian manĝoguston. Tiam mi estis vegetarano, sed troviĝis sur la tablo buterpano, fromaĝo, lakto kaj

ankaŭ legomoj. Ĉe manĝotablo mi spertis ion neordinaran. En Hindujo mi neniam estis manĝinta kune kun inoj, ĉar la viroj en Hindujo ĉiam manĝas tute aparte de virinoj, kaj manĝi kun multaj junaj instruistinoj estis nova sperto por mi. Sed mi tuj komprenis, ke la socia ordo en Svedlando estas tute alia ol en Hindujo. Tie ĉi viroj kaj virinoj ĝuas veran egalecon.

Post la vespermanĝo ĉirkaŭ la deka mi promenis al mia loĝejo. Post kvartaga marvojaĝo mi estis iom laca. Mia horloĝo ankaŭ iel malfunkciis jam en la ŝipo, kaj mi ne ĝis tiam havis okazon riparigi ĝin. Tial mi frue enlitiĝis, por ke mi povu ĝustatempe en sekvanta mateno partopreni la programon de la nova kurso. Iel mi forgesis kovri la fenestrojn per kurteno, kaj mi ekdormis.

Subite mi vekiĝis kaj trovis, ke la sunradioj inundas mian ĉambron kaj liton. Laŭ hinda kutimo sub hinda ĉielo mi tuj ellitiĝis kaj timis, ke eble mi malfruiĝos al la matena preĝo kaj matenmanĝo. Mi rapide vestis min kaj promenis al la komuna halo. La suno forte radiis el alta ĉielo, sed, strange, ĉie ĉiu ankoraŭ dormis. Pordoj kaj fenestroj de ĉiu domo estis fermitaj. Tio ŝajnis al mi ege stranga afero. Sur la strato mi aŭdis nur mian piedpaŝon kaj renkontis neniun. Nenie estis signo de vivo! Subite malfermiĝis fenestro de iu ĉambro kaj en nokta kostumo la estrino de la manĝejo diris al mi: "Bona junulo, kion vi deziras?" Mi respondis la kialon de mia alveno. Tiam ŝi informis, ke estas nur la dua horo en la nokto! Kompreneble mi hontis kaj reiris al mia loĝejo. Mi komprenis, ke mi denove devas lerni pozicion de la suno en la norda ĉielo en diversaj sezonoj. Jes, mi

estis forgesinta, ke mi nun estas en la lando de la noktomeza suno!

En la seminario de Nääs mi vigle partoprenis la somerajn kursojn. Dum la tuta tago mi kiel la aliaj laboris. Vespere post la manĝo ĉiutage estis popoldanco en la granda gimnastika halo. La partoprenantinoj en regionaj, belaj kostumoj kolektiĝis kaj dancis popoldancon kaj samtempe kantadis. La melodioj de popolkantoj ege allogis min. La somera naturo estis ensorĉiga. La tagoj en aktiva laboro flugis feliĉe. Alvenis la somermeza nokto. Oni grandskale festis la meznokton. Ĉiuj partoprenantoj — sinjoroj kaj fraŭlinoj — en popolkostumoj dancis popoldancojn preskaŭ dum la tuta nokto. Ĉiuj estis afablaj al mi. En mia vivo mi neniam antaŭe spertis tian homecan interrilaton, kaj mi ofte pensis, ke Tagore donis al mi la plej bonan konsilon. Estas inde, en la vivo sperti tian ĝentilecon kaj afablecon — kremon de homkulturo.

En Nääs mi ricevis la unuan leteron de mia frato Kshitiswar Sinha el hejmo. Eĉ hodiaŭ mi retenas tiun leteron kiel trezoron kaj memoraĵon de mia nobla frato. Li interalie skribis al mi: "Vi studas pedagogian slojdon en la lando de ĝia origino. La kultura historio de Svedlando estas ne nur interesa, sed ankaŭ bela. Mi estas certa, ke vi en via vivo multe profitos de via studado kaj restado en Svedlando. Vi lernu slojdon tiom, kiom estas eble por vi, sed samtempe vi ankaŭ studu tie la historion de la sveda popolo. Svedujo estas lando, kie la popolo en paco sukcesis atingi altan nivelon en ĉiu sfero de homa kulturo. Se eble, vi ankaŭ studu tie la metodon de popolklereco. Svedlando estas unu el la plej demokratiaj landoj sur la

tero." Mia frato neniam estis en fremda lando sed li estis multe studinta la historion de la homaro. Skribis el la hejmo ankaŭ mia patro. Li deziris, ke mi ankaŭ bone trarigardu la progreson de terkulturo, bovinflegado kaj industrio en Svedlando.

Pluraj instruistoj el diversaj landoj de Eŭropo — eĉ el Ameriko — partoprenis la kursojn en Nääs. Sed tiam mi estis la sola el Hindujo — eĉ el Azio. Do, la vivo en la seminario en Nääs estis same internacia kiel nacia. La sekretariino kaj ankaŭ la mastrino de la manĝejo traktis min kun amo kaj zorgo de patrino.

Mi penadis lerni slojdon kaj kompreni kiom eble plej bone pri la vivo, verko kaj laboro de Otto Salomon kaj pri la edukprincipoj de pedagogia manlaboro. Mi denove tralegis pri Comenius, Franke, Rousseau, Pestalozzi, Fröbel kaj aliaj. Al mi ŝajnis, ke Otto Salomon sendube staras en la sama vico de geniaj antaŭaj edukistoj. Li estis ellaborinta praktikan sistemon, kiu konkrete reprezentas la edukprincipon de nia epoko kaj kiu postulas, ke homidoj harmonie estu edukitaj por fariĝi bonaj kaj laboremaj civitanoj. Otto Salomon, ŝajnis al mi, estis persono, kiu posedis la plej altan kvaliton de idealisto kaj samtempe estis ege praktika homo. La kurso kaj vivo en la seminario de Nääs klare montris al mi, kiel fidele kaj zorge li prilaboris la sistemon de pedagogia slojdo.

Ĉiu somera kurso en Nääs daŭris ses semajnojn, kaj ĉiujare estis du kursoj — frue kaj malfrue en la somero. Mi partoprenis ambaŭ kursojn kaj fine estis decidite, ke mi ankaŭ partoprenu kursojn en la venonta somero en 1929, kaj ke dum la vintraj monatoj mi studu kaj observu slojdklasojn en aliaj instruistaj

seminarioj kaj lernejoj en Stockholm kaj ĉirkaŭaj lokoj sub gvidado de slojdinspektoro Gunnar Nilsson, kiu ankaŭ estis la ĉeflektoro en Nääs.

En Nääs la plej multaj de la partoprenantoj ne parolis angle, sed mi kontaktis tiujn, kiuj parolis tiun lingvon. Cetere mi ankaŭ komencis eklerni la svedan lingvon.



En Stockholm

En Nääs mi intimiĝis kun Stockholma instruisto, s-ro Erik Thunqvist, kiu afable invitis min al sia loĝejo en la ĉefurbo. Li estis vera idealisto kaj ege afabla persono, kiu ofte parolis al mi pri vivo kaj verko de Leo Tolstoj. Li havis grandan intereson ankaŭ pri la vivo de Mahatma Gandhi.

Post la fino de la somerkursoj en Nääs mi veturis al la bela ĉefurbo de Svedlando kaj estis gasto de gesinoroj Thunqvist. En Stockholm mi regule vizitadis muzeojn kaj aliajn vidindaĵojn kaj samtempe sub gvidado de s-ro Nilsson vizitis seminariojn instruistajn kaj ankaŭ popollernejojn kaj observadis la slojdklasojn.

Erik Thunqvist ne malofte gvidis min al personoj konataj al li. Sed plej ofte mi ne rekte povis inter-

paroli kun liaj konatuloj. Li mem funkciis kiel interpretisto. Kelkloke oni alparolis min per kelkaj anglaj frazoj, sed poste ne povis diri pli. En nia hejmlando miaj amikoj ofte asertis min, ke la lingvo angla estas parolata kaj uzata preskaŭ ĉie en la mondo, sed je mia bedaŭro mi spertis alie.

Foje s-ro Thunqvist min gvidis al internacia klubo en Stockholm. Tie mi renkontis kelkiujn, kiuj pli malpli parolis angle. Sed dum tiu tempo mi preskaŭ ĉiun sabaton vespere vizitis "Birkagården" kaj partoprenis la kunvenojn de la kvakeroj. Oni tie silente preĝis, kaj tio kompreneble plaĉis al mi, ĉar mi jam havis la kutimon silente preĝi en Santiniketan. Tiutempe mi multe interesiĝis pri la kristanismo. Mi legis la Biblion kaj ankaŭ la vivon de Kristo. Kaj ne malofte mi memoris la grandan anglon C. F. Andrews. Lia verko "What I owe to Christ" estas ege interesa.

Tiam okazis iu interesa afero. Iun tagon la sekretariino de "Birkagården" demandis al mi, ĉu mi volas helpi iun blindulinon. "Jes, certe mi tion volas, se mi nur povas" estis mia respondo. Tiamaniere mi konatiĝis kun blindulino, fraŭlino Elin Hök. Ŝi estis verkistino kaj laboris en Blindula Instituto en Stockholm. Ĉiutage en la frua mateno, kompreneble krom dimanĉe, mi akompanis ŝin el ŝia loĝejo al ŝia laborloko. Jen kia estis mia tasko, sed mi multe profitis de la kontakto kun ŝi. Dank' al Elin Hök mi multe eklernis pri vivoj kaj verkoj de svedaj kaj norvegaj aŭtoroj. Tiujare, antaŭ la Nobelpremia ceremonio, ŝi deziris en mia akompano viziti la faman aŭtoron Erik Axel Karlfeldt, kiu — se mi memoras korekte — estis tiam la sekretario de la Nobel-instituto. S-ro Karlfeldt parolis pri Gurudeva Rabindranath Tagore res-

pektplene, kaj mi estis feliĉa pro tio. La aŭtoro donacis al ni du invitkartojn por partopreno en la Nobelpremia festo en la Koncerthalo. Tion ni faris. Dum tiu jaro (1928) la norvega aŭtorino Sigrid Undsedt ricevis premion pri literaturo. Mi estis tiam leginta ŝiajn verkojn en angla lingvo.

Antaŭ Kristnasko mi en akompano de la tuta familio de s-ro Thunqvist veturis norden — unue al Söderhamn kaj poste al Åre en Jämtland. La vintra neĝo, la glaciiĝo de lago, ekskurso al la monto Åreskutan kaj la akvofalo Tännforsen estis ege interesaj. Tie mi penadis skii kaj grimpi monton.

Intereso pri Esperanto

Mi ne memoras la daton, sed dum la vintro en 1928 tute hazarde mi eksciis pri esperanto kaj vizitis kurson de pastro Andreo Ĉe en Stockholm. La ideo de universala lingvo kaptis mian imagon. Mi pensis, ke en nia tempo, kiam la geografia baro de landlimoj komencis daŭre malaperi, kaj internacia interrilato en kampoj de kulturo kaj komerco pliiĝas ĉiutage, tiam oni ankaŭ bezonas universalan lingvon. Multlingveco estas ja granda baro inter homoj de diversaj landoj de la mondo. Mi jam havis sufiĉan sperton pri lingva baro. Dum la lernado mi spertis, ke esperanto estas ege logika, kaj ke oni facile povas lerni la ling-

von. Mi deziris profunde lerni ĝin. Tiam mi konatiĝis kun pluraj spertuloj, kiujn mi neniam povas forgesi. S-ro E. Malmgren preskaŭ ĉiuvespere invitis min al sia hejmo, tiel ke mi povu ekzerci la lingvon. Rektoro Sam Jansson patrece akiris al mi aliajn instruistojn. Inter ili estis fraŭlino Elli Ahlström, kiun mi regule renkontis du- aŭ trifoje semajne en malgranda kafejo en Engelbrektsgatan. Ŝi instruis al mi la lingvon kaj ĝian gramatikon. Estis alia germandevena svedino, kies nomon mi ne plu memoras, sed kiu helpis min studi la historion de esperanto verkitan de Edmond Privat. Mi tiutempe ankaŭ vizitis la hejmon de veterana esperantisto, nome redaktoro Paul Nylén. Li parolis al mi pri sia kontakto kun d-ro Zamenhof, pri la interna ideo de esperanto kaj ankaŭ pri la humanismo de d-ro Zamenhof. Paul Nylén tiom impresis min, ke mi ne plu havis dubon pri la estonteco de esperanto en internacia rilato.

Mi volis libere skribi esperante kaj fakte verkis malgrandan drameton "Ŝivaĝi" kaj montris ĝin al s-ro Haldor, kiu tiutempe estris la svedan esperantoeldonejon. Je mia surprizo li ĝin presigis. Tio alportis al mi kuraĝon, kaj mi verkis kelkajn rakontojn. Dank' al s-ro Haldor ankaŭ "Bengalaj Fabeloj" aperis en libroformo. "Bengalaj Fabeloj" estis ankaŭ tradukitaj en la svedan lingvon. Tion faris mia amiko Gösta Ahlstrand. La sveda esperantoeldonejo eldonis la fabelojn ankaŭ en dulingva eldono — nome esperanta kaj sveda. Mi tiam intimiĝis kun s-ro B. Eriksson, kiu posedis presejon. La rektoro igis min prepari min por ekzamenoj. Tio kompreneble helpis min studi kaj skribi multe en esperanto. Dum tiu tempo mi konatiĝis kun la tiama urbestro de Stockholm, s-ro

Lindhagen. Li estis parlamentano kaj havis grandan intereson por disvastiĝo de esperanto. Mi vizitis lian hejmon kaj li montris al mi sian bibliotekon kaj grandnombrajn librojn pri Oriento. Samtempe mi konatiĝis, eĉ amikiĝis, kun sinjoro Julin — eksparlamentano. Mi ankaŭ havis okazon renkonti la fratinon de Lindhagen, kiu estis konata inspirulino de la socio-bonfara organizo kaj laboro. Mi danke rememoras tiujn personojn, kiu multe influis kaj riĉigis mian junan vivon. Tute kompreneble mia pensvivo estis tiam regata de internacia interkompreno, mondpaco kaj ankaŭ deziro efike servi mian popolon en popoleduka kampo. Mia tiutempa pensvivo respeguliĝas en mia libreto "Ĉio restas penso sed ne faro". Tiam mi vivis en la socio de esperantistoj. Efiko de tio estis, ke mia intereso lerni bone la svedan lingvon malgrandiĝis.

Iun tagon en januaro aŭ februaro 1929 rektoro Jansson alvokis min telefone. Mi renkontis lin en la lerneja oficejo, kiu kuŝis proksime al la reĝa biblioteko. Li tralegis al mi esperantan leteron. Skribis s-ro Engholm, kiu loĝis en izola loko — Nyberget en la provinco Dalekarlio. Li ankaŭ sendis bileton por veturo al lia hejmo kaj reen al Stockholm. Mi devis akcepti la inviton kaj iun tagon veturis tien. S-ro Engholm estis ege afabla kaj trankvila, kaj lia edzino s-ino Olga Engholm estis varme gastama. Je mia miro li parolis pri verkoj de Svami Vivekananda kaj d-ro Radhakriŝnan (nuntempe la prezidanto de Hindujo), kaj ankaŭ pri aliaj hindaj aŭtoroj. Li havis grandan intereson pri hindaj filozofiaj sistemoj. En daŭro de tempo gesinjoroj Engholm fariĝis miaj intimaj amikoj. Mi ofte, en posta vivo en nordaj landoj,

pasigis someran libertempon kaj kristnaskon tie. Al mi ege plaĉis la melodioj de la nordaj popolkantoj. Dank'al s-ino Olga Engholm mi sukcesis lerni multajn svedajn popolkantojn de ŝi, kaj dume mi ĝuis ŝian gastamecon. Al mi ĉiam ŝajnis, ke la enhavo de malnova popolkantaro kaj ĝia melodio ĉiam plej klare malfermas ion profundan, kio kuŝas en la vivo de iu popolo. Tiamaniere mia lernado de esperanto malfermis pordojn de multaj aliaj hejmoj kaj en Svedlando kaj en aliaj eŭropaj landoj, kiujn mi poste vizitis.

Je alproksimiĝo de la somero 1929, mi pripensis mian partoprenon de la someraj kursoj en Nääs, kaj mi informis mian decidon al la direktoro de la seminario. Mi ankaŭ planis reveturi hejmlanden post la kursfino en Nääs. Ĝuste tiam en iu vespero s-ro Malmgren faris al mi la jenan proponon: "Ĉu vi dezirus prelegvojaĝi tra la tuta Svedlando? Se vi konsentas, ni aranĝos tion kun popolklerigaj asocioj kaj lokaj esperantokluboj". La propono estis alloga pro du kaŭzoj — nome, tia vojaĝo tra la tuta lando povus helpi min ekkoni la popolon, ĝian kulturon, la disvastiĝon de slojdo en la vivo de la popolo kaj, cetere, mi ankaŭ povus ekscii, ĉu esperanto estas vaste uzata. Do, mi akceptis la inviton prelegvojaĝi tra Svedlando post la kursfino en Nääs.

Dum la someraj monatoj 1929 mi denove partoprenis kursojn en Nääs. En la instruista seminario mi ĉifoje deziris lerni virinajn slojdojn, por ke mi poste povu enkonduki tiajn en Hindujo. Sed nur fraŭlinoj kaj sinjorinoj partoprenis tiajn kursojn en Nääs, kaj por mi ne estis eble partopreni virinajn kursojn, kaj anstataŭe mi eklernis metalslojdon. Iun tagon la partoprenantinoj en Nääs en procesio marŝis al la hejmo

de la direktoro kaj petis al li, ke oni permesu la hindon partopreni la virinajn kursojn. Tio multe amuzis min. D-ro Holm poste diris al mi: "Nu, s-ro Sinha, vi ja fariĝis la heroo de la partoprenantinoj!"

Estas tamen necese klarigi, kial mi deziris lerni virinajn slojdojn. Al mi ŝajnis, ke la edukitaj virinoj en Hindujo kompare al virinoj en okcidentaj landoj fakte havis nenian okupon, krom prizorgado de hejmo kaj hejmanoj. Al mi ŝajnis necese enkonduki virinajn manlaborojn en Hindujo, tiel ke oni havu okazon utile uzi liberan tempon en krea kaj refreŝiga manlaboro kaj tiamaniero riĉigi hejmon, socion kaj propran vivon.



Prelegvojaĝo tra Svedlando, Estonio, Latvio kaj Pollando

Post la aŭtuno 1929 mi, kiel modesta prelegisto, komencis mian vojaĝon laŭ plano de s-ro Malmgren. La prelegvojaĝo mia daŭris ĝis printempo de 1930. Mi traveturis ĉiujn provincojn de Svedlando kaj faris ĉirkaŭ du cent prelegojn. Mi eĉ prelegis en Laplando kaj Gotlando. Kompreneble mi povis vidi multon da svedaj industrioj, sociaj kaj kulturaj institutoj kaj ankaŭ slojdcentroj. Antaŭ ĉio, mi pleje ĝuis la variecon de la naturo de la lando. Al mi ŝajnis, ke Svedlando estas unu el la plej feliĉaj landoj sur la tero.

L. Sinha kun edzino en 1939.

L. Sinha kun infanoj propraj kaj najbaraj en 1958.

La Esperantodomo apud Santiniketan en 1966.

En Svedlando oni konstante agis por klerigado de la tuta loĝantaro, bonfaraj organizoj zorgis ĉiun loĝanton — eĉ la vivon de novnaskito. Dum pli ol cent jaroj la popolo kaj ŝtato ĉiam evitis militon. Plej interese ŝajnis al mi, ke la ŝtato neniam posedis, nek deziris posedi kolonion, kaj tial la popolo alkutimiĝis pensi libere kaj objektive pri problemoj de la tuta homaro.[2] La agrikulturo de la lando fariĝis racia, la industria vivo ege progresema kaj eĉ bela, mi ja estis gasto en hejmo de svedaj laboristoj en multaj lokoj. La svedaj urboj estis belaj kaj regis ĉie trankvilo kaj pureco. La bonfarto de la tuta popolo simple mirigis min. Antaŭ ĉio, la tuta popolo ŝajne deziris pacon por si mem kaj ankaŭ por la homaro. Samtempe mi ankaŭ sentis doloron, pensante pri la mizero de la popolo hinda. Estis menciinde, ke dum la travojaĝo mi havis la honoron viziti la faman aŭtorinon Selma Lagerlöf kaj saluti ŝin en ŝia hejmo en Värmlando. Kun ŝia permeso mi poste tradukis ŝian noveleton "Junulino el Stormyrtorpet" en bengalan lingvon.

Alvenis invitoj el multaj aliaj eŭropaj landoj fari similan prelegvojaĝon. En aŭtuno 1930 mi veturis al Estonio, kie f-ino Helmi Dresen de Estona Esperanto Asocio aranĝis mian prelegvojaĝon. En Estonio la prelegvojaĝo daŭris ĝis la kristnasko de 1930. Same mi faris prelegojn en Latvio kaj Pollando. Estonio, Latvio kaj Pollando ne estis tiel riĉaj, kiel Svedlando tiam. Tamen korvarmeco kaj gastameco de esperantistoj igis min senti min hejme ĉie. La fakto fariĝis pli klara al mi ol antaŭe, ke esperanto estas

2) Por diri la veron, Svedujo tamen posedis malgrandajn kolonietojn, sed baldaŭ perdis ilin en militoj aŭ devis vendi ilin. (Noto de la eld.)

viva universala lingvo. Mia konvinko pri utilo de esperanto profundiĝis. En Pollando mi, kiel pilgrimanto, vizitis en Bjalistok la naskiĝdomon de la granda humanisto kaj geniulo d-ro Zamenhof. En Varsovio mi renkontis filinon de d-ro Zamenhof. Por neesperantistoj certe estas malfacile kompreni la rolon, kiun ludis la esperantistaro en la mondo por interhoma kompreno kaj vera amikeco inter diversaj popoloj.

Alvenis invito el Ĉe-instituto en Hago, Nederlando, ke mi fariĝu vera esperantoinstruisto por poste gvidi kursojn kaj fari prelegvojaĝojn. Mi ja jam gustumis la vivon en okcidento kaj deziris daŭrigi mian restadon en Eŭropo. Do, mi akceptis la proponon. Sed por pasigi la someron mi reveturis al Svedlando. Tiam okazis granda slojdekspozicio en Stockholm, kaj mi multe profitis de mia revizito.

Okazas en nia vivo kelkfoje io tia, ke oni ne povas klarigi tion laŭ logiko. Iun nokton mi sonĝis, ke miaj hejmanoj funebras. Ĉu iu en la familio mortis? Post kelkaj tagoj alvenis letero de mia patro kun la novaĵo, ke mia kara frato Kshitiswar Sinha, kiu sindone laboris por la klerigo de la vilaĝanoj, subite mortis. La novaĵo estis granda bato al mi, ĉar mi jam estis pensinta kaj planinta multe pri la laboro en la vilaĝoj kun mia frato. Do, anstataŭ veturi al Nederlando mi preparis min reveturi al mia hejmlando.

Mi enŝipiĝis en Liverpool kaj veturis rekte al Kalikato. Survoje en la Mediteraneo la ŝipo renkontis alian ŝipon, kiu portis Mahatma Gandhi al Londono. La maristoj en nia ŝipo estis hindoj, kaj ili plenvoĉe kriis "Venkon al Gandhi!" en hinda lingvo.

En la haveno de Madras, la ŝipo haltis plurajn tagojn. Dum tiu tempo mi vizitis la centron de la teozofoj en Adyar apud Madras. Dum mia rondvojaĝo tra la landoj de Europo, mi renkontis multajn teozofojn. Mi mem ne estis adepto, sed mi alte estimis sinjorinon Annie Besant — la gvidantinon de la teozofa movado. Cetere dum sia tuta vivo ŝi laboris por la bono de Hindujo. Ŝi tiam estis ege maljuna. En Adyar mi renkontis kaj salutis ŝin. Tie, je mia granda surprizo, mi renkontis profesoron Collins, kiu antaŭe estis profesoro de la angla lingvo en Visvabharati.

Reveninte al mia hejmlando mi verkis serion da artikoloj pri miaj spertoj en la landoj de Eŭropo. La artikoloj aperis en la fama bengala monata revuo "Prabaŝi". En angla lingvo mi verkis artikolon pri "Slojdo en sfero de eduko", kaj ĝi aperis en la internacie konata revuo "Modern Review" de Ramananda Chatterji.

Tiam la situacio en Hindujo estis tre paradoksa por realigo de mia vivcelo. La politika movado por sendependeco fariĝis pli akra ol antaŭe. Estis tiel, ke se mi estus akceptinta ŝtatoficon, mi ne povus gajni simpation de la popolo. Se mi estus aliĝinta al iu nacia organizo, mi ne povus gajni bone vivrimedon. La cirkonstanco en la gepatra familio fariĝis tiel malbona pro la morto de mia frato, ke mi multe devis

pensi ankaŭ pri tio. Kion fari? Dum tiu kriza periodo mi devis gajni vivrimedon el miaj skribajoj. Tiel pasis kelkaj monatoj.

Fine mi vizitis Santiniketan. Gurudeva Rabindranath Tagore postulis, ke mi reorganizu la edukan slojdon en Santiniketan laŭ mia eduko kaj sperto en Svedlando. Tiutempe la instruistoj en Santiniketan vivis simple kaj la salajroj estis malgrandaj. Fine mi decidis servi kaj vivi por realigo de mia ideal, kaj mi forlasis por ĉiam la ideon de bona mongajno. Mi devas konfesi, ke ne estis facile por mi atingi tiun konkludon. Sed, antaŭ ĉio, mi konsideris la malriĉecon de la popolo hinda.

Fine mi akceptis oficon en Santiniketan, al kiu institucio mi spirite multe ŝuldas. Laŭ la deziro de Tagore mi planis pedagogian manlaboron por la lernantoj kaj instruistoj. Al mi ŝajnis, ke unue oni devas reeduki la instruistojn en Santiniketan, kaj mi faris tiun proponon al Tagore. Li tuj konsentis. Mi aranĝis slojdkursojn por instruistoj kaj plenkreskuloj.

Dum tiu tempo (1931—33) la ekonomia cirkonstanco en la tuta mondo estis malbona. Eksporto kaj importo ĉie malaltiĝis. Regis fakte ekonomia krizo en Hindujo. Ankaŭ Visvabharati travivis ekonomian krizon.

Kun granda entuziasmo la gepartoprenantoj en mia kurso laboris, kaj mi bone sukcesis inspiri la geinstruistojn de Santiniketan. Inter la partoprenantoj en mia kurso estis eksterlandanoj. Tagore estis feliĉa. En la monata bulteno "Visvabharati News" (novembro 1932) oni fidele raportis pri la sukceso de mia kurso. Ankaŭ la redaktoro de "Modern Review" skri-

bis ege favore al mia kurso. Ĉiu progresema edukisto aprobis mian agon pri efektiva enkonduko de slojdo en nia eduksistemo. La morala gajno de mia sukceso estis granda, sed mi ne estis tute kontenta, ĉar la aŭtoritatoj en Visvabharati pro ekonomia krizo ne povis efektivigi mian tutan planon. Oni devas mencii tie ĉi, ke Tagore estis la unua edukisto en Hindujo, kiu efike eksperimentis pri nova eduksistemo jam de 1901, kaj ke li multe influis la progresemajn edukistojn en Hindujo. En Santiniketan li enkondukis edukon de geknaboj. Post mia kvarjara restado en nordaj landoj de Eŭropo ankaŭ mi estis konvinkita, ke la emancipado de hinda socio dependas multe de la eduko kaj progreso de hindaj virinoj. Brahmasamaĝ agis tute korekte en tiu kampo. Al mi ŝajnis ankaŭ, ke hinda socia vivo fariĝis ege malforta kaŭze de la malnova kastsistemo. Ekzemple en Hindujo tiam nur la filo de ĉarpentisto povis esti ĉarpentisto kaj neniu alia. Ĉarpentisto rajtis akiri edzinon nur el ĉarpentista familio. Cetere, la geedziĝon de gejuniloj aranĝis la gepatroj. Plue, pro vekiĝo de politika konscio la rilato inter diversaj religiaj sektoj daŭre akriĝis. Ankaŭ la hinduoj kaj hindaj mahometanoj kverelis inter si. La tensio daŭre pliiĝis.

Mi estis konvinkita, ke universala apliko de slojdo en la kampo eduka daŭre kaj racie povas anstataŭi la antikvan socian ordon. Tiutempe la edukitoj en Hindujo konsideris manlaboron kiel nedignan aferon. Ŝajne estis tiel ankaŭ en aliaj landoj antaŭe. Mi ĉerpis grandan inspiron el verkoj de Ruskin. Li prave diris: "Ni nuntempe diferencigas inter intelektuloj kaj laboristoj. Iu ĉiam pensas kaj la alia nur laboras. La unua fariĝas ĝentila persono kaj la dua restas ĉiam

laboristo. Sed tiel devas esti, ke laboristo ankaŭ pensu kaj intelektulo ankaŭ iom fizike laboru, kaj tiamaniere ambaŭ fariĝos veraj ĝentiluloj. Sed nuntempe ambaŭ fariĝis neĝentilaj homoj. Tiel la socio nuntempa konsistas el nesanaj pensuloj kaj mizeraj laboristoj."

Mi multe bedaŭris la fakton, ke mi ne efike povis labori por enkonduko de slojdo pro manko de mono. La cirkonstancoj en la lando ŝajnis senesperigaj. Tial mi proponis al Tagore, ke li permesu min denove viziti Svedlandon kaj por akiri monrimedon kaj por eventuale ankaŭ sendi slojdistinon el Svedlando por eduki niajn knabinojn. Li konsentis. Ankaŭ Visvabharati permesis min denove veturi al Svedlando, sed ne povis ekonomie subteni vojaĝkoston al Svedlando. Mi estis devigita forvendi mian novan skribmaŝinon kaj alian havaĵon malkare.

Gurudeva Tagore transdonis en mian manon kelkajn enkondukajn leterojn al eminentaj personoj en Svedlando. Unu el tiuj leteroj estis al d-ro Sven Hedin. La svedoj povas legi la enhavon de tiu letero en la verko "Med Stormän och Kungar" ("Kune kun granduloj kaj reĝoj"), eldonita 1950. Sube mi reproduktas la enhavon de alia letero, kies kopio estas videbla en la Tagore-muzeo de Santiniketan.

"Mi ĝoje atestas, ke s-ro L. Sinha sukcese enkondukis slojdon en nian instrufakon pri manlaboro ĉe Visvabharati, Santiniketan, post lia studo de slojdo en Svedlando dum pli ol du jaroj. Lia laboro ĉi tie ĉiutage gajnas terenon kaj jam pruvis sian efikecon kaj por junaj studantoj kaj por viraj kaj virinaj laboristoj ĉe nia Instituto. Estas nia intenco fondi ĉi tie tuthindan centron por studado de slojdo, sed pro

manko de monrimedoj ni ne povas daŭrigi tiun laboron laŭ niaj esperoj.

S-ro Sinha kredas, ke, konsiderante la sukcesojn jam atingitajn ĉi tie en la enkondukado de slojdo kaj ĝian grandan utilon por la lando, li povos trovi adekvatan resonon en Svedlando mem por daŭrigi tian laboron, kiu estos de daŭra valoro kaj interĉenos Svedlandon kaj Hindujon kun ligoj de pli intima kunlaboro. Nenio povus esti pli bonvena al mi, ol tia utila kunlaboro inter tiuj du landoj, kaj mi senpacience atendas geston de helpo de lando, kiun mi amas kaj estimas tiom multe.

S-ro Sinha veturas al Svedlando kun niaj bondeziroj, kaj estas mia sincera espero, ke li ricevos helpon akiri rimedojn kaj necesan ilaron por permanente firmigi tiun tre necesan laboron en Hindujo."

Kun tiuj leteroj mi rapidis aranĝi mian novan vojaĝon al Svedlando.

Sur la ŝipo el Hindujo mi trankvile pripensis, kiel mi devas agi en Svedlando. Mi antaŭvidis, ke mi devas resti tiom longan tempon en Svedlando, kiom estos necese por akiri helpon por slojdcentro en Santiniketan. Mi ankaŭ planis verkon pri Svedlando en mia gepatra lingvo bengala. Mi ja jam traveturis Svedlandon, sed mi sentis, ke estas nepre necese studi iom profunde la historion kaj literaturon de la nordaj landoj.

Revene al Svedlando

En frua printempo mi atingis la havenon de Gotenburgo kaj pasigis trankvile du semajnojn en fiŝista insulo apud Gotenburgo. Poste mi revizitis Nääs kaj montris la leterojn de Tagore al miaj amikoj. Poste mi rapidis al Stockholm kaj kontaktis rektoron Sam Jansson. Mi diris al li ĉiujn miajn planojn kaj petis lian konsilon. Mi ankaŭ volis studi en bibliotekoj. La patreca rektoro kontaktis amikon en la sveda ministrejo por eksterlandaj aferoj kaj gvidis min al li. Tiu eminenta sinjoro estis afabla kaj promesis subteni mian studadon en bibliotekoj dum du monatoj. Tion li faris.

Tiam mi ekloĝis en pensiono ne malproksime de la Reĝa Biblioteko kaj komencis studi literaturon kaj historion sub la direkto de lektoro en la lernejo de Beskow. Rektoro Jansson iun tagon igis min renkonti d-ron B. Brilioth. Tiu estis ege afabla. Mi rakontis al li pri mia misio en Svedlando kaj montris la leteron de Tagore. Mi deziris resti en Svedlando ĝis la plenumo de mia misio, kaj dum tiu tempo mi volis verki laŭ plano libron pri Svedlando en bengala lingvo. Li simpatiis kun mi kaj promesis trovi por mi loĝejon.

Dank' al klopodo de d-ro Brilioth mi baldaŭ trovis gastigantinon, nome s-inon Märta Lovén. Dum jaro mi ĝuis la grandan gastamecon de s-ino Lovén. Ŝi zorgis pri mi kiel pri sia filo. Tio faciligis mian daŭran studadon en la bibliotekoj en la ĉefurbo.

Rektoro Söderberg el Upsala afable aranĝis mian radioparoladon pri mia misio en Svedlando. Mi parolis esperante, kaj li tradukis sveden. La ĉefurbaj ĵurnaloj intervjuis min. Tiutempe mia sola preĝo estis akiri

sufiĉan helpon por starigi slojdcentron en tuthinda skalo en Santiniketan. Estas strange, sed vere, ke la saman tagon, kiam mi estis parolinta en la radio, mi legis en ĉefurbaj tagĵurnaloj ke Mahatma Gandhi fondis tuthindan asocion de vilaĝindustrioj sub direkto de la fama ekonomiisto d-ro J. C. Kumarappa. La novaĵo estis ege plaĉa al mi kaj mi pensis, ke mi ne estas solulo, kiu pensas pri revivigo de hejma industrio en Hindujo.

Post kelkaj tagoj okazis io preskaŭ nekredebla. Post lunĉo mi sola promenadis en parko en Stockholm. Subite iu nekonata sinjoro proksimiĝis al mi kaj demandis, ĉu mi estas hindo, kaj ĉu mia nomo estas Sinha. Plue li volas ekscii, ĉu mi faris paroladon en la radio pri enkonduko de slojdo en Santiniketan. Mi jesis. Li diris, ke li estas kuracisto kaj dano, sed li konas persone svedan grafinon, kiu havas grandan intereson pri la lingvo sanskrito kaj pri hinda filozofio. Li deziris, ke mi renkontu la grafinon kaj mem estis preta gvidi min al ŝi.

La saman tagon tiu nekonata noblanimulo — dana kuracisto — gvidis min al la loĝejo de grafino Kerstin Hamilton. Aŭdinte mian mision kaj traleginte la enkondukajn leterojn de Tagore, ŝi tuj promesis helpon por plenumi mian mision. Krome ŝi deziris lerni de mi la bengalan kaj sanskritan lingvojn.

Jam en la fino de 1933 ni elektis du slojdistinojn, nome fraŭlinon Jeanson kaj fraŭlinon Cederblom. Ni ankaŭ sukcesis aĉeti necesajn slojdilojn por teksado kaj lignolaboro. Sveda ŝipkompanio afable promesis transporti senpage la slojdilojn. Estis decidite, ke f-ino Jeanson la unua veturu al Hindujo por unu jaro kaj enkonduku svedan teksarton al la studantoj kaj

instruistinoj en Santiniketan kaj post ŝia reveno al Svedlando f-ino Aina Cederblom veturu al Santiniketan.

La supremenciitaj entreprenoj estis certe penaj, sed dank' al grafino Hamilton la plano fine sukcesis. La fama biografiisto de Tagore — nome s-ro Pravat Kumar Mukherji — detale priskribis la laboron de svedaj instruistinoj en Santiniketan en bengala lingvo. La historio de tiu entrepreno montras, kiel bona kaj efika povas esti tia internacia kunlaboro.

Post unujara laboro de f-ino Jeanson, Tagore skribis jene al grafino Hamilton:

"Fraŭlino Jeanson baldaŭ forlasos nin, kaj mi ne farus mian devon, se mi ne informus vin kiom multe ni estimis ŝian kvietan kaj senpretende bonan laboron. Ŝi jam tre bone metis la fundamenton de la faksekcio, kaj mi estas certa, ke ĝi daŭre floros sub la tre kompetenta gvido de fraŭlino Cederblom, kiun vi, laŭ informo en letero de s-ro L. Sinha, elsendos al ni. Nia dankemo estas neimagebla kaj certe donos al vi plezuron scii, ke via afableco kaj bonfarado estis tre estimata de miaj samlandanoj."

Poste f-ino Aina Cederblom veturis al Santiniketan. Grafino Hamilton skribis al Tagore pri f-ino Cederblom jene (mi trovis kopion de la leteroj en la Tagore-muzeo).

"Ĉi-foje ni havis la grandan bonŝancon sendi, laŭ mia supozo, la idealan laboranton por via lernejo. F-ino Cederblom estas bona amikino al mi, kaj mi estas certa, ke vi ĉiuj ŝatos ŝin, ĉar ŝi estas virino kun persona karaktero kaj idealisto plena de entuziasmo, bonaj ideoj kaj energio."

F-ino Cederblom veturis per ŝipo, sed kunportis

kun si motorboaton. Kiam ŝi atingis Kolombon en Cejlono, ŝi elŝipiĝis kaj ekveturis sola trans la Bengala Maro (la golfo de Bengalujo) per motorboato. Dufoje sur la marvojo ŝia motorboato dronis, sed ŝi estis savita de proksimaj ŝipoj. Fine ŝi atingis Santiniketan. En hindaj tagĵurnaloj oni multe raportis pri ŝia granda aventuro.

La aventurema kaj energia fraŭlino faris bonan laboron en Santiniketan, kaj dum la paso de la tempo la sveda teksarto multe disvastiĝis, ne nur en Santiniketan kaj Sriniketan, sed en la tuta distrikto kaj eĉ en la tuta lando. La tuta epizodo nun estas parto de la pasinta historio, kaj oni povas legi tion en la menciita biografio pri Tagore.

Ankaŭ grafino Hamilton vizitis Santiniketan kun sia filo Herbert Hamilton dum la tempo, kiam f-ino Cederblom laboris tie. La grafino studis sanskriton kaj filozofion de mezepokaj hindaj sanktuloj — nome Kabir, Dadu, Mirabai, Tukaram k.t.p. ĉe la fama profesoro Kshitimohan Sen en Santiniketan. S-ro Herbert Hamilton estis artisto, kaj li studis hindan arton ĉe fama hinda artisto, Nandalal Bose — la estro de altlernejo arta.

Mi restis en Svedlando de 1933 ĝis la aŭtuno 1936. En 1934 mi partoprenis la universalan esperantokongreson en Stockholm. Homoj de diversaj nacioj partoprenis tiun kongreson, sed ĉiu parolis la saman lingvon kaj interpretisto estis superflua kaj nenecesa. Tio estis granda sperto por mi. Esperanto aperis al mi kiel viva universala lingvo.

Dum mia restado mi pasigis du monatojn en Danlando kaj Norvegujo. Mallongan tempon mi restis ankaŭ en Nederlando kaj partoprenis Ĉe-metodan

kurson. Laŭ la aranĝo de la Norvega Esperanto Asocio mi rondiris la belan landon kaj faris prelegojn. La mirindaj pejzaĝoj de Norvegujo, la lando de miaj amataj aŭtoroj Ibsen, Hamsun, Bojer k.t.p. multe interesis min. Mi havis la honoron viziti Bojer kaj intervjui lin. En Oslo mi aĉetis grandan historian verkon, nome "Heimskringla" — la sagaoj pri pasintaj nordlandaj reĝoj de la fama malnova islanda verkisto Snorri Sturluson. Post la legado de tiu verko mi interesiĝis pri Islando. Laŭ konsilo de s-ro Holger Hansen en Danlando mi skribis leteron al la islanda verkisto kaj esperantisto Thorbergur Thortharsson. Laŭ lia invito mi veturis en aprilo 1935 al Islando kaj restis tie ĉirkaŭ unu kaj duonan monaton. Surĉevale mi vizitis diversajn vidindaĵojn en Islando. Plej eble mi estis la unua bengalo, kiu iam vizitis tiun mirindan landon ĉe la polusa cirklo.

En Danlando s-ro Holger Hansen aranĝis mian prelegvojaĝon. La danaj popolaltlernejoj, kooperativoj kaj agrikulturo ege impresis min. Mi vizitis la muzeon kaj hejmon de la mondfama fabelisto H. C. Andersen. Iam vizitante la danan urbeton Saeby, mi hazarde ekvidis la hotelon, kie iam Ibsen loĝis kaj verkis sian faman dramon "Pupodomo". Jes, Ibsen estis unu el tiuj, kiuj antaŭvidis la malfortajn kaj malbonajn trajtojn de homa naturo kaj homa kulturo. Li ankaŭ kondamnis perfortan agon de forta nacio kontraŭ malfortaj.

Tie en Danlando mi estis bonŝanca konatiĝi — eĉ amikiĝi — kun gesinjoroj Harald Grønborg. Dank' al li mi sukcesis iom penetri kaj kompreni la signifon de la laboro de la granda dana filozofo Grundtvig. Estas interese noti, ke Grundtvig estis samtempulo

de Raĝa Rammohan Raj, kiu alportis renesancon en Bengalujo. La aliaj popolaj instruistoj danaj ankaŭ interesis min. Speciale menciinde estas la nomo de fama dano — Kold. Dank' al esperanto mi tiel intime povis studi en ĉi tiuj landoj.

Dum la vojaĝo tra la nordaj landoj mi efektive trovis, ke la amikeco kaj simileco inter la popoloj de tiuj landoj estas tre rimarkindaj. Pro popolklerigado ankaŭ la simplaj homoj pensis pri la neceso de interhoma kompreno kaj paco inter diversaj nacioj. Al mi ŝajnis, ke la evoluo de la kulturo en la nordaj landoj estontece povos multe kontribui al la paco monda. La popolo akiris la kutimon pensi objektive pri mondproblemoj.

Dum mia restado en Svedlando la grafino Hamilton revenis al sia hejmo kaj rakontis al mi siajn spertojn en Santiniketan. Ŝia intima kontakto kun Tagore kaj profesoroj de Santiniketan igis min senti min feliĉa. Ĉar mi ĉiam kredis kaj kredas, ke tiaj intimaj kontaktoj povas pli vastigi la horizonton de la interkompreno inter diversaj popoloj kaj kulturoj ol oficialaj interkontaktoj.

Nu, mia misio en Svedlando estis plenumita. Mi tiutempe verkis en bengala lingvo pri mia vivsperto en la nordaj landoj. Sed antaŭ la forveturo, mi deziris verki esperante libron pri Svedlando. Tiamaniere "Hindo rigardas Svedlandon" estis skribita kaj fine eldonita de la sveda esperantoeldonejo. Profesoro Collinder skribis la antaŭparolon de mia verko.

Fine mi devis decidi pri mia reiro al la hejmlando. Mi ekkonis tiom intime — dank' al esperanto — la nordajn landojn kaj akiris ĉie tiom da bonaj amikoj, ke mi ne facile povis decidi daton de mia revojaĝo al

la hejmlando. Mi nur prokrastis kaj prokrastis la daton de mia reveturo. La fino de tutjara slojdlaboro de f-ino Cederblom en Santiniketan ankaŭ alproksimiĝis, kaj oni el Santiniketan skribis kaj postulis, ke mi reiru kiel eble plej baldaŭ por grandskale organizi slojdinstruadon. Sed kiam mi pensis pri mia venonta vivo en Hindujo, mi preskaŭ ektimis. En la lumo de mia vivsperto en la nordaj landoj la socioreligia kaj sociopolitika vivo de la malnova popolo hinda ŝajnis al mi tiam tro komplika, kaj mi demandis al mi mem: "Ĉu mi iam povos esti feliĉa en la hinda socio?" Al mi ŝajnis, ke neniu progresemulo povas esti feliĉa en la konservativa hindua socio. Mia koro ploris. Mi penadis klare pensi. Mi ekkomprenis, ke mi estas profunde enamiĝinta kun la norda kulturo kaj vivo kaj ne malpli kun la norda naturo.

Tiam mia interna konflikto kaj sufero estis tiom intensa, ke dufoje en 1936, preskaŭ sen kaŭzoj, mi vizitis Laplandon kaj vagadis tra ĝia senhoma regiono proksime de Abisko. Dum boatekskurso sur la izola lago Torneträsk norde de la polusa cirklo, kaj vidante la respeguliĝon de la ĉielo en la trankvila akvo de la lago, mia animo sentis trankvilon kaj estis, kvazaŭ iu alia voĉo el mia interno diris al mi: "Vi ne pensu pri via propra feliĉo en la vivo, vi penadu feliĉigi aliajn en via mizera lando." Povas esti, ke mia interna konflikto kaj konstanta pensado igis min alveni al tiu konkludo. Sed ĉiuokaze tio estis revelacio al mi. Fine mi devis aŭskulti kaj akcepti mian internan voĉon.

Iun tagon en griza aŭtuno 1936 mi silente, kun peza koro, forlasis Stockholm kaj veturis al Danlando. Tie mi renkontis interalie fraŭlinon Noll, kiu timeme

parolis pri venonta mondmilito. El Kopenhago mi transiris la limon kaj veturis al Hamburgo. La atmosfero tie ŝajnis al mi nenatura. La esperantistoj antaŭsentis malfacilaĵojn. De Hamburgo mi veturis al Nederlando kaj estis gasto de gesinjoroj Isbrücker en Hago. Tie mi restis kelkajn tagojn kaj poste transiris la maron per ŝipo al Londono.

En Londono mi devis resti kelkajn tagojn por aranĝi ŝipvojaĝon al Hindujo. La londonaj esperantistoj tiam multe helpis min ordigi la ŝipveturon. Dum antaŭa vizito en Londono, en 1931, mi renkontis s-ron F. B. Bourdelion — la tiaman bibliotekiston kaj antaŭan sekretarion de "Royal Institute of International Affairs". Li estis ege afabla, kaj eĉ hodiaŭ mi retenas liajn leterojn al mi. Mi tiam konatiĝis ankaŭ kun s-roj Gething, Goldsmith kaj multaj aliaj en la londona klubo kaj ili estas neforgeseblaj! Ĉi-foje en Londono s-ro H. W. Holmes kaj lia edzino gastigis min en sia hejmo, kaj mi pasigis kelkajn feliĉajn tagojn tie. Tiutempe interesis min spiritismo. Mi jam estis leginta kaj pri spiritismo kaj pri la konata spiritisto Sir Oliver Lodge. Laŭ mia peto gesinjoroj Holmes afable aranĝis mian viziton al la centro de la spiritismo. Tie mi renkontis tiaman faman spiritistinon, kies nomon mi tamen ne plu retenas en mia memoro, sed kiu sen demandi min diris pri mia pasinta bela tempo en la nordo kaj ankaŭ faris antaŭdirojn pri mia estonteco en Hindujo.

En Londono mi renkontis ankaŭ mian kuzon, d-ron Sasadhar Sinha kaj lian anglan edzinon. Mia kuzo tiam kaj tie posedis librovendejon. Li afable aĉetis amason da libroj, por ke mi havu legaĵon sur la ŝipo.

Mi enŝipiĝis en Liverpool kaj veturis al Kalikato.

En Port-said angla samideano vizitis min sur la ŝipo kaj deziris al mi bonvojaĝon. La marovojo de Liverpool ĝis Madras estis ege trankvila. La kapitano de la ŝipo diris al mi, ke li neniam spertis tian trankvilan maron dum sia kvardekjara marista vivo. Mi cerbumis: Ĉu la trankvileco de la maro estas nur hazardo, aŭ ĉu tio portas signon de la venonta katastrofo — la dua mondmilito! Mi ne scias la kialon, sed mi pensis tiel.

Ĝis tiam mi ne sciigis miajn gepatrojn kaj parencojn pri mia reveno al la hejmlando, sed ĉe halto en Madras mi skribis pri mia reveno al miaj gepatroj en Sylhet kaj al parencoj en Kalikato.

La rekomenco de la vivo en Hindujo

Je mia reveno al Kalikato mi ekvidis, ke la hinda popolvivo multe ŝanĝiĝis dum mia longa foresto. La virinoj libere promenis sur la stratoj kaj eĉ partoprenis publikan kunvenon en parkoj. Ŝanĝo, vera ŝanĝo! La tempo ŝanĝas ĉion en la mondo! Oni diris al mi, ke la tuta popolo sub gvidado de Mahatma Gandhi vekiĝis. La patriota sento de la popolo ŝajnis esti alta. La atmosfero politika estis ege varma. Mi restis kelkan tempon en Kalikato kaj penadis kontakti la famajn edukistojn por interesigi ilin pri enkonduko de slojdo en la lernejoj. Fine mi veturis al mia hejmo en la vilaĝo Rarhisal en la distrikto Sylhet

en la provinco Aŝam. Neniu parolis pri mia marvojaĝo! Ŝanĝo, vera ŝanĝo en la socia ordo, mi pensis. La Gandhi-movado atingis eĉ la vivon en la foraj vilaĝoj.

Post longa tempo mi renkontis miajn gepatrojn. La haroj de ili fariĝis blankaj dum mia longa foresto, kaj ili ankaŭ aspektis multe pli maljunaj. Mia longa foresto el la hejmo — tiam nekutima en hinda familio — certe kaŭzis internan suferon al ili. Sed kion fari! Ĉiuokaze ni ĉiuj multe ĝojis pro la renkontiĝo post tiom da jaroj.

Antaŭ Kristnasko mi reveturis al Kalikato sed survoje haltis ie kaj tie por renkonti la familiojn de miaj fratinoj kaj kuzinoj. Dum la infanjaroj en la gepatra hejmo ni elkreskis kune; dum mia foresto la junaj fratinoj edziniĝis. Do estis vera ĝojo renkonti ilin denove post tiom longa tempo.

El Kalikato mi veturis al Santiniketan kaj salutis Gurudeva Tagore. Li emocie kaj forte parolis pri la laboro de la svedaj slojdistinoj. Li menciis pri la energio kaj entuziasmo de f-ino Cederblom kaj diris, ke ŝi estas neordinarie viva instruistino. Mi sentis, ke mia penado ne estis vana. Kiam mi transdonis al Tagore salutojn de liaj amikoj en Svedlando, liaj okuloj preskaŭ larmiĝis kaj brilis. Li diris mallaŭte: "Jes, ili amas min." Klare, ke homa amo kaj spirito estis pli valora al li ol ĉio alia.

Ankaŭ Nandalal Bose — la fama artisto en Santiniketan — parolis pri la valora laboro de la svedaj instruistinoj. Fakte li igis siajn lernantojn lerni la svedan teksarton. Same parolis Santideva Ghose — la fama kantisto de Tagoremuziko — pri la bona laboro de la svedaj instruistinoj.

Tagore deziris, ke mi unue reordigu la lignan industrion en Sriniketan. Mi devis obei lin kaj vigle komencis mian laboron. Mi rememoris la feliĉajn jarojn de mia junaĝo en Sriniketan. Fakte estas, ke Sriniketan montris al mi la vojon de la vivlaboro. Nun mi preparis meblaron por Rabindranath Tagore kaj li dum monato loĝis en Sriniketan kaj uzis la meblaron. Pasis kelkaj monatoj. Dumtage mi laboregis. Multaj ĉarpentistoj laboris en la ligna industrio. Dum nokto mi preparis manuskripton pri mia sperto en la nordaj landoj kaj sendadis al famaj monataj ĵurnaloj. Silente mi tenis en mi la deziron pli plene eksperimenti kun la efiko de manlaboro en hinda lernejo.

Mi havis intiman amikon en Santiniketan. Lia nomo estas Narendranath Nandi, kaj li ĉiam sekvis mian vivagon kaj penson. Iun tagon li vizitis min kaj tralegis al mi novaĵon en la ĵurnalo de Mahatma Gandhi. Mahatma planis novan eduksistemon por la nova Hindujo. Aŭdinte la novaĵon, mi ekpensis, ke estas tempo matura por mi, skribi pri pedagogia slojdo. Do, mi verkis sufiĉe longan artikolon angle sub la titolo "Some Practical and Important Aspects of Mass Education and Vocational Training" kaj sendis ĝin al la redaktoro de "Modern Review". Dume Mahatma Gandhi alvokis kunvenon de hindaj naciaj edukistoj. Je mia surprizo oni ankaŭ invitis min partopreni la kunvenon.

La kunveno okazis en la hinda urbo Wardha en la centra provinco. Tiu kunveno estas unika en la historio de eduko en la moderna Hindujo. Mahatma proponis, ke oni devige, en la tuta lando, nepre eduku la infanojn de la sepa jaro ĝis la dekkvara jaro pere

de aktivaj manlaboroj. Okazis longa diskuto en la kunveno. Partoprenante, mi kun ĝojo aŭdis la diskutadon, sed mem diris nenion, ĉar mi sentis, ke la vento de la moderna eduko blovas favore al mia dumviva pensado kaj faro.

Atendante la kunvenon, mi ricevis telegramon kiu sciigis min, ke mia iama gastigantino s-ino Lovén kaj ŝia plej juna filo Peder jam atingis Bombay, kaj tie ili atendas min. Per trajno mi veturis rekte al Bombay. La distanco estis longa. Tamen, atinginte Bombay post tutnokta veturo, mi penadis trovi ilin en diversaj hoteloj kaj fine trovis ilin en la fama Tajmahal-hotelo. Ni kune veturis al la historia urbo Poona kaj restis tie kelkajn tagojn kaj vidis diversajn naciajn institutojn kaj historiajn vidindaĵojn. Poste miaj svedaj amikoj aĉetis aŭtomobilon kaj deziris traveturi Hindujon. Mi reiris al Santiniketan.

Mi parolis al Rathindranath Tagore — la filo de Gurudeva — kaj petis lin inviti miajn svedajn amikojn al Santiniketan. Li volonte tion faris.

S-ino Lovén kaj ŝia filo estis invititaj. Post monato ili vizitis Santiniketan kaj estis gastoj de Rathindranath Tagore. S-ino Lovén deziris pasigi kelkan tempon en Sriniketan, kaj tio ankaŭ estis aranĝita. Dum ĉirkaŭ unu monato miaj svedaj amikoj restis en Sriniketan. Mi estis ege feliĉa pro ilia vizito.

La unuan de decembro 1937 mia artikolo aperis en "Modern Review". Ĉirkaŭ la 20-an de decembro alvenis mia amiko Narendranath Nandi kun ekzemplero de "Harijan" — la ĵurnalo de Mahatma Gandhi. En tiu ĵurnalo la redaktoro tre favore recenzis mian artikolon aperintan en "Modern Review". Tio estis granda novaĵo por mi. Mia dumviva penso kaj ago,

mia sperto en Hindujo kaj en Svedlando fine ricevis aprobon de la plej grandaj hindoj, nome Rabindranath Tagore kaj Mahatma Gandhi! Prave mi havis kaŭzon senti min feliĉa!

Post edziĝo

Jam de junaĝo kaj ĝis nun mi tute sendependе de la familio vivadis kaj batalis por certa ideo. Nun mi sentis neceson de propra, natura kaj trankvila hejmvivo. Iam mi deziris vivkunulinon en norda lando, sed mia nestabila ekonomio ne permesis al mi tion, kaj kun ĉagreno mi devis forlasi tiun ideon, ĉar mi ja neniam esperis okupi altan postenon kaj gajni sufiĉan monon. Mi ĉiam rezonis, ke mi devas servi mian socioedukan idealon, kaj tial ankaŭ devas esti kontenta kun modesta vivrimedo.

En mia familio ĉiuj, kaj speciale miaj gepatroj, deziris, ke mi edziĝu laŭ mia elekto. Nu, fine mi tion faris kaj en februaro 1938 mi edziĝis. Mia edzino devenis el familio en la sama distrikto — nome Sylhet. Miaj gebopatroj estis teozofoj. S-ino Lovén kaj ŝia filo Peder Lovén partoprenis la geedziĝan ceremonion, kiu okazis en Kalikato. Poste mi kun la edzino veturis al mia gepatra hejmo. Gepatroj, pa-

rencoj estis ege feliĉaj, kaj oni refestis la okazon en mia hejmo preskaŭ pompe laŭ hindua maniero.

Post multaj jaroj mi pasigis monaton en mia hejmo. Dum longa tempo mi forestis el mia vilaĝo, kaj nun infanjaraj memoroj revenis al mi. Post la edziĝo mi komencis vidi nian socion en tute alia maniero. Jes, sen edziĝo oni ne fariĝas kompleta ano de socio — tiel ŝajnis al mi. Dum mia foresto grandaj ŝanĝoj okazis en la socia vivo ankaŭ de la vilaĝo. Mahatma Gandhi alportis politikan kaj socian konscion al la hindoj.

Post monato mia libertempo finiĝis, kaj mi devis reiri al mia laboro. Sed alvenis telegramo de la edukministro de la centra provinco. Laŭ nova edukplano — oni nomis ĝin "Basic education" — de Mahatma Gandhi, la registaro de la centra provinco decidis malfermi instruistan seminarion, kaj la edukministro petis min fariĝi estro de la edukaj manlaboroj en la nove fondita seminario. Mi rapidis al Kalikato kaj parolis pri la afero al miaj amikoj. Alvenis dua telegramo el la *aŝrama* (laŭlitere "memdisciplinigejo") de Mahatma Gandhi. La sekretario de la nova eduksocio (Hindusthani Talimi Sangh) deziris, ke mi akceptu la postenon en la nova seminario. Mi skribis al la aŭtoritato en Sriniketan kaj petis, ke oni permesu min labori aliloke dum kelka tempo kaj gajni pli da sperto pri la hindaj cirkonstancoj. Dume alvenis tria telegramo de la sekretario de Hindusthani Talimi Sangh. Tie staris, ke oni oficiale malfermos la novan seminarion en certa dato en aprilo 1938, kaj ke mi nepre ĉeestu la malferman ceremonion.

Mi do povis fari nenion alian ol veturi al Wardha, kaj kun mia edzino iun tagon mi iris tien por ko-

menci la novan vivon. Mi atingis la urbon Wardha vespere. Mi kaj mia edzino estis gastoj de la sekretario de Hindusthani Talimi Sangh. La postan tagon mi diskutis kun la sekretario pri la komenciĝonta seminario, kaj la saman tagon vespere, mi, kun mia edzino, per ĉevalveturilo veturis al Sevagram (laŭlitere "la vilaĝo de servado") — la *aŝrama* de Mahatma Gandhi. Ĝi situis ĉirkaŭ sep kilometrojn malproksime de Wardha.

La *aŝrama* de Gandhi tiam konsistis el tri modestaj domoj, loĝejoj de liaj disĉiploj, kaj aparte staris bovinejo. Mi kaj mia edzino salutis Mahatma en vespera lumo tuj post preĝkunveno. Mahatma varme bonvenigis nin kaj diris: "Ĉu estas necese por mi skribi al Gurudeva Tagore pri via alveno al ni?" Mi trankviligis lin, dirante, ke mi jam skribis al Sriniketan. Tiam li vokis Kasturbai — sian edzinon — kaj prezentis nin al ŝi. Ni salutis ŝin en hinda maniero. Ŝi ame kaptis la manon de mia edzino kaj gvidis ŝin aliloken.

Jen la unuan fojon en mia vivo mi staris antaŭ la persono, kies vivago kaŭzis sensacion kaj en Hindujo kaj en aliaj landoj, kaj kies vivago estas ankaŭ lia mesaĝo! Mi ree memoris, kiel en la junaĝo, kiel lernanto en gimnazio, mi nur deziris vidi lin kaj aŭdi lian vorton, en la urbo Silĉar! Parolis al mi Mira Ben — la anglino kaj disĉiplino de Mahatma Gandhi. Ŝi deziris ekscii pri la sanstato de Gurudeva Rabindranath Tagore. Jes, Gandhi kaj Tagore estis amikoj — unu estimis la alian.

Mi devis reiri al Wardha, kaj tial mi adiaŭis Mahatma kaj Mira Ben. Sed kie estas mia edzino? Mi ne trovis ŝin en la proksimeco. Fine mi vidis ŝin;

...legis Ramajanon de Tulsidas kaj mia ... — ambaŭ sidante ĉe lanterno en iu ...bro. Jes, la epopeo Ramajano ankoraŭ ...aturo en Hindujo — ankoraŭ la hindoj ...on el la vivoj de Rama kaj Sita! La ...ma kaj Sita estas historio de sufero ... kaj vero — tiel mi pensis tiam. Tiel ... renkonto kun Mahatma Gandhi kaj ...mia vivo en aprila tago 1938. Ni reiris

...ago la edukministro de la centra pro... la novan instruistan seminarion kaj ...ncigon de nova eduksistemo deviga

...jaj — konata industriisto — estis ... de Mahatma. Li logîs en Wardha kaj ... mi logejon. Mi kaj mia edzino trans... logejon.

... energie laboradis por starigi mian ... partoprenantoj en la seminario tro... instruistoj el preskaŭ ĉiuj provincoj de ... urbo troviĝis pluraj tuthindaj orga... de Mahatma Gandhi — nome tut... asocio, tuthinda asocio de ŝpinis... instituto por disvastigi la lingvon *hin*... Apud la urbeto Wardha staris alia ... Vinoba Bhave. Mi la unuan fojon ... kunveno en Wardha. Feliĉe mia ... al *aŝrama* de Vinoba Bhave, kiu ... originala persono. Lia personeco ..., kaj mi ofte vizitis lian *aŝrama*. ... la fino de majo 1938, iu nekonata ... al mi malgrandan leteron de

Mahatma Gandhi. Li skribis: "Lakŝmiswar, renkontu min je la kvara kaj dekses minutoj posttagmeze. — *Bapu.*" La vorte *bapu* signifas "patro". Jes, li estis patro al ĉiuj siaj kunlaborantoj kaj ankaŭ estis la patro de la nacio hinda!

La suno kruele brilis, varmega vento blovis, kaj mi sola per ĉevalveturilo veturis al Sevagram. Mi atingis la modestan loĝejeton de Mahatma ĉirkaŭ je la kvara. Ĉe la pordo staris, kiel gardisto, Mira Ben, kiu sciigis min, ke Mahatma parolas kun la ĉefministro de la centra provinco. Mi atendis ĉe la pordo, kaj precize je la kvara kaj dekkvin minutoj la ministro forlasis la ĉambron de Mahatma. Mi eniris precize je la kvara kaj dekses minutoj posttagmeze. Mahatma sidis sur simpla tapiŝo el palmfolioj. Nenia meblo estis trovebla en lia ĉambro. Mi salutis lin, kaj li rekte rigardis min tra siaj grandaj okulvitroj. Mi eksentis, ke li penetre trarigardas mian internon. Jen li parolis en ege mola voĉo: "Jam de frumateno mi pensis pri vi. Mi volas diri al vi, ke mi legis ĉiun vorton de via artikolo en "Modern Review". Mi konsentas plene kun ĉio, kion vi skribis. Nun vi laboru laŭ via plano."

Mi fakte ne sciis kion diri. Do, mi petis lian benon kaj adiaŭis lin.

Pasis kelkaj monatoj. Laŭ mia plano novaj domoj por manlaboro estis konstruitaj. Oni nomis la seminarion angle: "Vidyamandir Training Institute". En diversaj provincoj en la elementaj lernejoj oni komencis enkonduki la novan eduksistemon. Ĉiu provinca administracio sendis instruistojn por lerni la novan eduksistemon. Sed al mi ŝajnis, ke ĉio funkcias tro

malrapide en la lando, sed mi konsolis min per penso, ke la hinda popolo sub la tropika klimato pensas kaj agas malrapide.

En oktobro 1939 la unua nacia edukkonferenco (Basic National Education) okazis en Poona.[3]) Mi havis okazon fari paroladon pri mia propra sperto en la kampo de la nova eduksistemo. Mi ankaŭ partoprenis en la diskuto.

En la sama jaro mia unua verko, skribita laŭ lumo de la laboro en la instruista seminario pri pedagogia manlaboro, aperis sub la titolo "Teachers Handbook of Educational Crafts. Part I". Mahatma Gandhi mem recenzis la libron en Harijan la 18-an de decembro 1939. De 1938 ĝis 1942 mi trifoje korespondis kun Mahatma Gandhi. Kiam mi havis ian malfacilaĵon, mi kutimis skribi al li, kaj tiel petis lian konsilon. Li ĉiufoje respondis per propra mano. Du el tiuj leteroj de Mahatma nun estas troveblaj en la Gandhi-muzeo en Delhi. La tria kaj plej longa perdiĝis dum kaoso en 1947.

3) La interesuloj povas tralegi la raporton de tiu konferenco. Gi aperis angle sub la titolo: "One step forward — The report of the first conference of Basic National Education." Published by Hindusthani Talimi Sangh, C. P.

(Noto de L. Sinha.)

Dua mondmilito

Kiam la milito komenciĝis en septembro 1939 kaj la novaĵo atingis nin en Hindujo, mi, kiel multaj aliaj, sentis profundan malĝojon. La milito estis, estas kaj estos signo de krizo de homa spirito kaj civilizo. Mi antaŭsentis, ke la nova edukmovado en Hindujo ne povas nature evolui. En 1940 mi devis forlasi Wardha laŭ ordono de Mahatma Gandhi. Fakte la laboro de la instruista seminario pro milito ekhaltis. De tiu tempo ĝis marto mi parte vagadis tra la vasta lando. Mi deziris elekti lokon, kie mi mem povus starigi instituton por prilabori mian propran planon de la eduko kaj rekonstruo de la vivo. Mi ĉiam deziris vivi en tia vilaĝo, kie troviĝas ĉiuj kastoj kun diversaj religiaj kredoj. La interna ideo estis, ke ĉiu eklernu sian devon al si mem en la vivo, devon al socio, al lando kaj al homaro. Grundtvig kaj Kold multe inspiris min. Al mi ŝajnis, ke mia patro korekte agis en sia vivo. Li ja dum tuta vivo laboris por plibonigo de terkulturo, bovinflegado kaj ankaŭ por industrio. La granda entrepreno de industrio ankoraŭ ne estis ebla en Hindujo. Do, li laboris laŭ tiama situacio de vilaĝkomonumo. Kun sufiĉe granda risko, mi dum tiuj jaroj eldonis liajn verkojn pri terkulturo, bovinflegado kaj vilaĝa higieno. Oni ege favore recenzis liajn verkojn, kaj je mia granda surprizo la libroj rapide vendiĝis. Mi certe kredis kaj kredas, ke estontece la hindoj ekkomprenos la valoron de lia vivago kaj sperto. Al mi ŝajnis ankaŭ, ke mia mortinta frato Kshitiswar Sinha agis saĝe kaj formortis por bona kaŭzo. Jes, li ja volis lumigi la vivon de la vilaĝanoj per disvastigo de senpaga eduko inter viroj kaj virinoj.

En la komenco de 1942 Mahatma Gandhi fondis novan instruistan seminarion en sia *aŝrama* en Sevagram, kaj li denove alvokis min. Li skribis longan leteron parte per skribmaŝino kaj parte per mano. Estas malĝojige al mi, ke mi perdis tiun leteron. Ĉiuokaze mi kredis, ke ĉifoje mi povos trankvile labori en Sevagram. Sed verŝajne estis mia vivsorto, ke mi neniam havu trankvilan vivon. La demando pri la sendependeco de Hindujo fariĝis akra, kaj la situacio estis ege kriza. Nun mi ne volas rememori tiun tempon en Hindujo.

En la sama jaro (1942) Mahatma Gandhi estis malliberigita kune kun aliaj naciaj gvidantoj. La membroj de Sevagram unu post la alia estis arestitaj. Tamen mi daŭrigis mian instruadon al la malmultaj lernantoj ĝis 1943. Regis min mallumo, kaj mi ne plu povis elteni la situacion. Politiko ja neniam allogis min. Do, en la mezo de 1943 mi silente forlasis Sevagram. Mi ne povis alie agi.

Jam en 1941 dum la milito, Rabindranath Tagore — mia Gurudeva kaj vivinspiranto — forpasis. Mallonga tempo antaŭ sia forpaso li parolis pri krizo de la homa civilizo. Dum la milito milionoj formortis en Bengalujo pro malsato. Mia tiama vivsperto estis terura.

La ideo starigi propran instituton preskaŭ ĉasis min. La malfacilaĵoj realigi tian planon ŝajnis esti multaj kaj tro grandaj. Parencoj, amikoj ne apogis mian planon. La sola persono, kiu parolis favore al mia plano, estis mia amiko Narendranath Nandi. Li aprobis mian ideon labori modeste por rekonstruo de la vivo en la vilaĝoj el la interno. Li mem estis farinta tian laboron en sia propra vilaĝo kun bonega rezulto.

En la sekvanta jaro (1944), mi kolektis mian tutan forton, kaj komencis laboron en loko ne malproksime de mia hejmo, kie iam mia patro posedis bienon. Tute nature, la laboro en la komenco ŝajnis tro malfacila. Mi ne havis monon, sed kelkaj amikoj, kaj inter ili s-ro Nandi kaj lia frato, komencis kontribui monon al mia entrepreno. Bonŝance mi ankaŭ sukcesis kolekti spertajn kolegojn, kiuj iam studis en la vilaĝ-industria asocio tuthinda de d-ro Kumarappa. Mia patro, tiam maljuna, estis ege feliĉa, kaj dank' al liaj bonaj konsiloj alvenis tempo, kiam mi komencis ekvidi frukton de mia laboro. Cetere mi penadis stari ekonomie sur propraj piedoj. Mi akiris la bienon de la patro kaj kulturis preskaŭ ĉiujn grenojn, flegis bovinojn kaj samtempe komencis fabriki brikojn kaj tegmentaĵojn. Per propraj manoj sub gvido de mia patro ni konstruis loĝejon kaj laborejon. La kostumoj dum la milittempo estis multekostaj. Tial ni kulturis kotonon kaj ŝpinis, kaj la vilaĝa teksisto teksis. Ankaŭ la vilaĝanoj volis ŝpini, kaj fakte multaj komencis fari tion. Estis signo de nova vivo en la vilaĝoj ĉirkaŭaj. La vilaĝanoj kolektiĝis kaj decidis starigi hospitalon. Oni petis al la registaro de Aŝam pri kuracisto kaj medikamentoj.

La ĉefoj de la ĉirkaŭaj vilaĝoj deziris altigi la mezgradan anglan lernejon al gimnazio, sed kiel akiri monon? La ĉefoj mem fine trovis la rimedon. Oni laŭ decido kolektis rizon de ĉiu hejmo, vendis la rizon kaj akiris ĉirkaŭ tridek mil rupiojn. Oni starigis grandan domon por la gimnazio, kaj dungis plurajn instruistojn.

Mi persone kontaktis la ĉefojn — hinduojn kaj mahometanojn — en la tuta regiono kaj klarigis la

celon de nia entrepreno. Ĉiu havis la plej grandan simpation por nia rekonstrua entrepreno por la bono de la ĉirkaŭaj vilaĝoj.

La ĉefministro de Aŝam, s-ro Bardoloi, invitis min esti membro de la komitato, kiu konsideras rekonstruan programon de vilaĝoj. Mi veturis al Shillong — la ĉefurbo de Aŝam — kaj partoprenis la unuan konferencon. S-ro Bardoloi promesis morale kaj ekonomie subteni mian instituton.

Sendependiĝo de Hindujo kaj poste

Tiam ni eklernis, ke Hindujo sendependiĝos en 1947, sed la kontinento estos dividita en du partoj, nome Hindujo kaj Pakistano, kaj ke la popolo de la distrikto Sylhet per voĉdono devos decidi, ĉu ili volos aparteni al Pakistano aŭ al Hindujo.

Subite la rilato inter hinduoj kaj mahometanoj fariĝis ege malamika, kaj mi ne volas rememori la terurajn tagojn. Ne valoras memori tion. Oni decidis aparteni al Pakistano.

La 15-an de aŭgusto 1947 la nova flago flirtis en nia vilaĝo. Ni ĉiuj estis feliĉaj.

La 16-an de aŭgusto 1947 komenciĝis terura tumulto. Ŝajne la kontraŭsociaj malbonuloj — ŝtelistoj kaj rabistoj — ankaŭ sendependiĝis, kaj oni komencis bruligi vilaĝon post vilaĝo kaj rabis ĉion. Dum preskaŭ monato ni ne dormis dum nokto. Ni devis

gardi nian vilaĝon kaj savi niajn vivojn. Post monato la nova ŝtato sendis policon al nia regiono. Oni arestis malbonulojn kaj iom post iom paco revenis. Sed la popolamaso vivis netrankvilan vivon. Mia instituto estis komplete detruita.

Alvenis telegramo de Rathindranath Tagore — la ĉefo de Visvabharati. Li invitis min reveni kaj labori en komenciĝonta instruista seminario en Vinaja-Bhavana. Mi cerbumis. La historiaj fortoj politikaj terure batis min kaj mian entreprenon. Ĝis nun mi pensis kaj agis en mia vivo laŭ hinda diro. "Oni laboru por realigo de bona kaj nobla penso kaj ĉiam prokrastu agon laŭ malbona penso." Mi staris denove sur krucvojo en la vivo. Mi ne antaŭvidis eblecon restarigi la instituton. Do, fine mi decidis veturi al Hindujo.

En decembro 1947 mi kun la familianoj — mia edzino, juna fratino kaj du filinoj malgrandaj — migris al Hindujo. Atinginte Kalikaton, mi sentis min terure laca kaj eĉ ne volis pensi pri la estonteco. Sed oni ne tiel povas fari longe. Mi penadis kontakti Mahatma Gandhi, sed vane.

Dum tiu tempo oni legis terurajn novaĵojn en la tagĵurnaloj; la malamo inter hinduoj kaj mahometanoj estis tiom granda, ke ili mortigis unu la alian en plej kruela maniero. Mahatma penadis pacigi ĉiujn.

Iun tagon en la hejmo de mia amiko Narendranath Nandi, mi renkontis sinjoron. Verŝajne li jam aŭdis pri mia sorto de s-ro Nandi. La sinjoro interalie proponis al mi denove starigi instituton en lia vilaĝregiono, kaj li invitis min viziti lian lokon. Li posedis grandan senfruktan terenon, kiu kuŝis en la distrikto Nadia, kie antaŭ ĉ. kvincent jaroj naskiĝis la gran-

dulo Caitanja, kiu enkondukis la vaiŝnavismon en Bengalujo. Ni decidis veturi tien la 30-an de januaro 1948. Estis decidite, ke mi veturu per vespera trajno el Kalikato. Posttagmeze mi estis preta veturi al la stacidomo, sed subite mi fariĝis ege pesimisma. Granda melankolio regis min. Alvenis neatendite iu malnova amiko por viziti min, kaj li diris: "Ĵus antaŭ kelkaj minutoj oni mortpafis Mahatma Gandhi." Regis morta silento. Poste li diris, ke oni ne anoncis la nomon de la pafinto ĝis nun. Ĉiu timis, ke civila milito aŭ kaoso komenciĝos en la lando kaj ankaŭ en Kalikato.

Mi ne plu volis paroli kaj eliris el mia loĝejo. Mi deziris atingi la stacidomon. Sur strato mi vidis nur [illegible]masason kurantan en ĉiu direkto. Mi sukcesis eniri [illegible]buson kaj fine atingis la stacidomon. La granda [illegible]cidomo Howrah estis preskaŭ senhoma. Mi aĉetis [illegible]on kaj envagoniĝis. En la tuta trajno estis nur [illegible] kvar pasaĝeroj. En la fino de nokto ege mal[illegible], mi atingis mian destinon, kie la bienulo aten[illegible]. En kamparo ni du vagadis ĝis tagmezo, sed [illegible] povis akiri manĝon. Ĉiu en Hindujo fastis tiun [illegible]. Ĉiu kantadis la preĝkanton, kiu estis kara al [illegible]tma Gandhi. Ŝajnis al mi, ke la tuta lando fari[illegible] templo! Gandhi oferis sian vivon por vero, por [illegible]ama amikeco kaj boneco kaj por venko de homa [illegible].

[illegible] ne plu deziris riski novan entreprenon. Mi ren[illegible] Rathindranath Tagore. Li arde deziris, ke mi [illegible] al la nova seminario. La 1-an de septembro 1948 [illegible]ezino, filinoj kaj juna fratino mi atingis la [illegible] loĝejon en Vinaja-Bhavana.

[illegible] longa, tumulta vivo mi sentis en Santiniketan

pacon kaj trankvilon. Vere, Santiniketan estas vera hejmo de paco. Vinaja-Bhavana kuŝas inter Santiniketan kaj Sriniketan en loko, kiu aspektis kiel dezerto. Kvankam mi estis terure laca, tamen mia aktiva naturo denove igis min plani kaj labori por la nova seminario. La vasta, senherba tereno de Vinaja-Bhavana ŝajnis al mi netolerebla. Kun permeso de la superuloj, ni, la instruistoj kaj lernantoj, plantis arbojn kaj ankaŭ kulturis sufiĉe grandan fruktĝardenon. Mi mem instruis manlaborojn kaj ankaŭ instrumetodon. Denove, kun granda entuziasmo, mi laboris ĝis 1951. La libertempon mi kutimis pasigi en tiel nomataj sanktaj lokoj. Iel paco de animo mankis al mi. Dufoje en la somermonatoj mi vizitis la nordajn sanktajn lokojn, nome Hardwar, Banarasi, Puri k.t.p. Dum tiuj jaroj mi ankaŭ legis multe pri vivoj de pasintaj hindaj sanktuloj. Mi legis ankaŭ la vivon de fama Mahariŝi Ramana en suda Hindujo. Multaj eksterlandanoj kaj pli multaj hindoj akiris internan pacon ĉe Mahariŝi Ramana. Sed mi ne havis okazon vidi lin, antaŭ ol li forpasis. Fakto estis, ke mi deziris akiri internan trankvilon en la mondo, kie mankis amo. Ĉu la homaro ĉiam militos? Ĉu la potenco de malamo estas pli forta ol amo? Tiuj demandoj turmentis min.

La nova edukministro de sendependa Hindujo vizitis Santiniketan. La saman jaron Vivsvabharati farigis centra oficiala universitato. Oni alte taksis nian laboron en Vinaja-Bhavana. La postan jaron (1952) mi deziris viziti la landojn de Eŭropo postmilita. Pere de la ĉefo de Visvabharati kaj la ministro de eduko mi petskribis al UNO, ke oni permesu min studi sociobonfarajn organizojn en Svislando, Anglujo, Sved-

lando, Danlando kaj Norvegujo. UNO respondis kaj postulis ĉiujn detalojn de mia vivlaboro kaj studo. Oni ankaŭ postulis, ke mi verku artikolon en lingvo, kiun mi plej ŝatas. Tion mi faris en esperanto. Post kelkaj monatoj UNO informis la edukministron, ke oni konsideras min kiel plej taŭgan kandidaton el Hindujo.

En januaro 1953 UNO el sia oficejo en Ĝenevo informis ke mi preparu min por la sesmonata studvojaĝo. La 4-an de februaro 1953 mi flugis al Ĝenevo kaj partoprenis seminarion en la granda domo de la antaŭa Ligo de Nacioj. De Svislando mi flugis al Svedlando. La studprogramo estis intensa, sed interesa. Dum kvin monatoj mi rondiris Svedlandon, Danlandon, Norvegujon kaj vizitis bonfarajn instituciojn. La lastan monaton mi pasigis en Anglujo. La studprogramo multe interesis min. Al mi ŝajnis, ke dum postmilita periodo la logantaro de la landoj de Eŭropo fariĝis pli kaj pli konscia pri bonfaro de homo ol iam antaŭe, kaj ke UNO kaj UNESCO komencis ludi gravan rolon pri bonfarto de la tuta homaro. En Anglujo mi interalie vizitis Dartington Hall en Devonshire. Mi estis feliĉa tie povi ree renkonti d-ron L. K. Elmhirst, la fondinto de Dartington Hall. D-ro Elmhirst iam estis la unua direktoro de Sriniketan, kaj mi estis lia ekslernanto. D-ro Elmhirst kaj lia edzino subtenis kaj apogis ekonomie la eksperimentan laboron en Sriniketan dum multaj jaroj. En Dartington Hall mi finverkis mian pli ol centpaĝan raporton pri mia studo kaj sperto kiel ano de UNO. Ĉiuokaze mi estis feliĉa pro la vizito. La lastan tagon de mia *fellowship* (stipendio) mi transdonis ses kopiojn de mia raporto al mia ĉefgvidanto en British Council. La postan tagon

mi ree flugis al Kalikato kaj per trajno reiris al Vinaja-Bhavana.

Dum mia foresto de Visvabharati la ŝtato fondis specialan edukcentron por la organizantoj de socia eduko en nova Hindujo. Oni oferis al mi la postenon de ĝia direktoro. La laboro estis certe interesa, kaj ĉiutage mi devis per aŭto viziti la ĉirkaŭajn vilaĝojn kune kun kursanoj. Sed post kelkaj monatoj mia sanstato subite malboniĝis. La kuracisto deziris, ke mi vivu pli trankvilan vivon kaj ne laboru multe. Do, mi devis forlasi la laboron en la nova edukcentro kaj denove labori en la seminario.

Dume la edukkomisiono laŭ direkto de la edukministro planis reorganizi mezgradan lernejan eduksistemon. Oni enkondukis slojdon en ĝia studprogramo. Necesis eduki taŭgajn instruistojn per ĝia enkonduko en lernejoj. La aŭtoritato de Visvabharati deziris malfermi novan trijaran kurson por la instruistoj en Sriniketan. En 1954 oni malfermis novan diploman kurson. Mi ankaŭ konsentis gvidi ĝin. Kun ege malbona sano mi ordigis la kursojn kaj ankoraŭ laboras tie. Estas interese noti, ke dum 1931 mi intencis starigi la saman kurson. Estas klare, ke tiam la tempo ne estis matura por ĝi. Hindujo dume ŝanĝiĝis en maniero preskaŭ nekredebla. Mi antaŭvidas, ke la proceso de ŝanĝo estontece estos multe pli granda, ĉar industrio kaj agrikulturo kreskas malgraŭ la pasintaj malbonaj heredaĵoj, kaj eduko ankaŭ komencis disvastiĝi. La influo de moderna okcidento kaj speciale ĝia socio-bonfara tekniko ankaŭ estas granda. Se la hindaro sukcesos harmoniigi la materialan progreson kun tiu de la homa spirito — la vera heredaĵo de malnova kulturo ĝia — tiam ĝi povos

multe kontribui ankaŭ al mondpaco — tiel mi kredas.

La laboro komencita de mi daŭre ricevadas aprobon de la popolo, ŝtato kaj kompreneble ankaŭ de la Visvabharati-universitato. Pandit Javaharlal Nehru, kiu gvidis la nacion ĝis la tempo de sia forpaso, estis granda amanto kaj de Visvabharati kaj de Rabindranath Tagore. Fakte Javaharlal estis la oficiala ĉefo de Visvabharati ĝis la tempo de lia forpaso. En 1963 en jarkunveno, kiun prezidis Pandit Nehru, la rektoro de la universitato — nome s-ro S. R. Das — oficiale aprobis kaj alte taksis mian servon al Visvabharati. Dum la lastaj dek jaroj multaj spertuloj el Usono kaj el landoj de Eŭropo vizitis Visvabharati-universitaton kaj, vizitinte miajn kursojn, ĉiu asertis, ke tia laboro estas ege utila kaj urĝe bezonata por la nova Hindujo. Kompreneble mi profunde sentas dankemon al al ĉefo de Sriniketan, Dhirananda Raj, kaj al aliaj aŭtoritatoj de Visvabharati-universitato kaj same ankaŭ al la svedoj, kiuj inspiris min kaj riĉigis mian vivon. La sveda slojdmovado pedagogia kaj hejma havis mesaĝon al mia vivo kaj por Hindujo.

En mia batalanta vivo mi ne sukcesis fari multon por esperanto. En 1961, malgraŭ mia malbona sano, mi tradukis rakontojn de Tagore en esperanton, la sveda esperanto-eldonejo eldonis ilin sub la titolo "Malsata ŝtono". De tiam mi pensadis fari ion utilan por disvastigo de esperanto sur la tereno de Bengalujo. Pasintjare mi kun mia ekslernanto kaj nuntempa kolego s-ro Abani Abusan Haldor fondis Bengalan Esperanto-Instituton. Mi verkis libreton en bengala lingvo pri esperanta movado kaj mem eldonis ĝin. S-ro Haldor komencis gvidi esperantokursojn.

Estas mia espero, ke la instituto regule funkcios kaj kreskos post mia forpaso. Miaj pasintaj vivagoj kaj sperto instruis al mi, ke por realigo de nobla ideo oni nur devas agi ĝuste kaj nepensante pri gajno kaj estonteco. La interlingva problemo de Hindujo estas granda, kaj tio postulas tempon por esti solvata. Dume ni esperantistoj devas semi kaj semi la ideon de universala lingvo.

Dum la lastaj jaroj, mi — nekapabla promeni — sidante verkis du volumojn en bengala lingvo pri "Eduko kaj manlaboro" por miaj posteuloj. Mi ankaŭ verkis pri mia sperto pri "Eduko kaj socia bonfaro" en la nordeŭropaj landoj.

Jen estas la fino de memoroj de modesta persono, kiu naskiĝis en Hindujo, kiu deziris servi sian popolon en plej praktika maniero, kiu havis bonŝancon ricevi benon de du grandaj hindoj — nome Rabindranath Tagore kaj Gandhi — kiu havis la feliĉon ĝui amikecon de multmiloj da homoj en diversaj landoj kaj, super ĉio, kiu amis la homaron kaj deziris apogi la movadon de internacia interkompreno pere de la universala lingvo — Esperanto.

Oni povas konkludi de miaj memoroj, ke mi nur agis laŭ mia konscienco kaj tial ankaŭ devis suferi pro la historiaj ŝanĝoj, kiuj okazis dum mia vivo. Tamen oni prave asertas en Gita, ke oni nur rajtas agi ĝuste en sia vivo kaj ne esperi gajnon por si mem. Jen estas tio, kio okazis vole-nevole en mia vivo, kaj mi ne pentas pro la jaroj pasigitaj sur la tero.

ellaboritaj de Bertil Nilsson surbaze de manuskripto de L. Sinha. Bonvolu konsulti ankaŭ la notojn en "Nepalo malfermas la pordon" kaj "Malsata Ŝtono".

Aĉarja — Instruisto, speciale pri spiritaj aferoj.

advaitismo — Ne-dualismo. Filozofia sistemo bazita sur monisma interpreto de la upanišadoj kaj aliaj religiaj dokumentoj. La plej fama reprezentanto de tiu filozofio estas Šankara.

ahimsa — Nelezado (rifuzo kaŭzi difekton aŭ ĝenon al alia vivanta estaĵo). La politika metodo de Gandhi.

Andrews, Charles Freer (1871—1941). Angla misiisto, kiu post universitata eduko en Anglujo fariĝis instruisto en misiista altlernejo en Hindujo. Li konsideris Hindujon kiel sian propran landon kaj estis unu el la malmultaj okcidentanoj kiuj vere alproksimiĝis al la hinda menso. Li estis admiranto kaj kunlaboranto de Tagore kaj Gandhi kaj servis la hindan popolon ĝis sia lasta tago.

aprezi — Kompreni kaj ĝui la valoron de io.

asura — Malica spirito aŭ demono. Plurale *asuras*.

aŝrama — Ermitejo. Laŭlitere memdisciplinigejo. El la radiko *šram* — esti laca, peni, disciplinigi sin.

avataro — Malsupreniĝo (speciale de Dio sur la teron).

Banarasi — Angle Benares. Urbo apud la rivero Ganga. Laŭ hindua kredo estas tiel, ke tiu, kiu pasigas siajn lastajn jarojn en Banarasi kaj mortas tie, pli facile atingas liberiĝon de renaskiĝo.

Besant, Annie (1847—1933). Angla teozofino, kaj fondinto de Teozofa Socio en Adjar. Ŝi ankaŭ interesiĝis pri hinda politiko, kaj en 1917 ŝi fariĝis prezidanto de Hinda Nacia Kongreso.

Bhagavad-Gita — Vidu sub Mahabharato.

Bhagavatam — Ankaŭ nomata Śrimad-Bhagavatam aŭ Bhagavatapurana. Ĝi estas la plej populara el la *puranas* kaj temas pri avataroj de Viŝnu, precipe pri Krišna. La verko estas dividita en dekdu librojn kaj konsistas el 18.000 strofoj. La plej grava eŭroplingva traduko estas tiu de M. E. Burnouf, Paris 1840—1898, kun paralelaj tekstoj en sanskrita kaj franca lingvoj.

Bhave, Vinoba — Hinda socia reformatoro. Vidu ankaŭ la artikolon de Tibor Sekelj en Revuo Internacia Esperanto, marto 1960.

Birkagården — Sociala institucio en Stockholm, kiu per studrondoj kaj diversspeca agado inter infanoj laboras por socia kaj persona evoluo laŭ kristana spirito.

Bojer, Johan — Norvega verkisto, naskita en 1872. Liaj fruaj libroj ĉerpas siajn temojn el la rilatoj inter homo kaj socio. Ekde sia romano "Den store hunger" (La granda malsato) li montras religian vivkoncepton. Lia realisma libro "Den siste viking" (La lasta vikingo) fariĝis internacie konata.

Brahma — La eterna animo de universo, kiu penetras ĉion. En sanskrito ĝi havas neŭtran genron.

Brahma — Nomo de la Kreinto de la materiala mondo. En sanskrito ĝi havas viran genron.

brahmano — Membro de unu el la kvar ĉefkastoj en Hindujo, nome la pastra.

Brahma-samaĝ — Societo fondita en 1828 kaj celanta reformiĝon de la hinduismo.

Brahmasutra — Aforismoj de Badarajana pri la Vedanta-filozofio, verkitaj probable inter 200 kaj 450 p. K. Tradukita kaj komentita en la angla de d-ro Radhakrišnan.

Comenius (aŭ Komenski), Johan Amos (1592—1670). Ĉeĥa pedagogo kaj episkopo.

Ĉaitanja, Krišna (1486—1533). Post mallonga, sed laŭdire brila kariero kiel erudiciulo, li forlasis siajn hejmon kaj familion kaj fariĝis *sannjasi*. Farante misiajn piedvojaĝojn tra Hindujo, li dum senĉesaj ekstazoj predikis kaj ekzemplis pri intensa amo al la persona Dio, Krišna, la avataro de Višnu. Lia agado kaŭzis grandan suprensvingon de la bengala kulturo, kaj la nuna vaišnavismo originas grandparte de li. Li estas la plej amata mistikulo de Hindujo kaj nomiĝas kelkfoje "la kaŝita trezoro de Hindujo". En la nuntempo li trovis entuziasman eŭropan adepton en la aŭstra-sveda verkisto Walther Eidlitz, aŭtoro de interalie jenaj verkoj:
Bhakta, Hamburg 1951. (Ankaŭ sveda kaj angla eldonoj.) Die indische Gottesliebe, Olten und Freiburg im Breisgau, 1955 .(Ankaŭ sveda eldono). Der Glaube und die heiligen Schriften der Inder, Olten und Freiburg im Breisgau, 1957.

Ĉandi Poemo de 700 strofoj, kiu formas unu epizodon en Markandeja-purana. Ĝi estas ĉiutage legata en la temploj de Durga. Tradukita eŭroplingven de M. E. Burnouf.

Ĉandidas Bengala vaišnava aŭtoro de la dekkvina jarcento. Laŭ aliaj teorioj temas pri du aŭ eble kvin diversaj aŭtoroj kun sama nomo.

Das, C. R. (1870—1925). Advokato, verkisto kaj hinda nacia gvidanto, kiu agis ĉefe en Bengalujo.

deva Plurale *devas*. Ĉiela, dia; dio.

Durga Diino, edzino de la dio Šiva. Aliaj ŝiaj nomoj estas Kali, Ĉandi kaj Maha-maja (la granda iluzio).

dvaitadvaitismo Laŭlitere duec-neduecismo. Dualisma-monisma interpreto de la hindaj religiaj dokumentoj fare de inter aliaj la filozofo Nimbarka el la dektria jarcento.

dvaitismo — Dualisma interpreto de la hindaj religiaj dokumentoj fare de la filozofo Madhva el la dektria jarcento.

Francke, August Hermann (1663—1727). Germana pastro kaj pedagogo.

Fröbel, Friedrich (1782—1852). Germana pedagogo kaj lernanto de Pestalozzi. Li fondis la unuan *Kindergarten*, ludlernejo por malgrandaj infanoj.

Ganga — Angle Ganges. La plej sankta rivero de la hinduoj.

Ghose, Aŭrobindo (1872—1950). Li estis gvidanto de la hinda naciismo, sed, forlasinte la politikon, li ekloĝis en Pondiĉeri, kie li fondis *aŝrama* kaj fariĝis unu el la plej atentataj ekzegezistoj de la hinduismo.

Gita — Bhagavad-Gita.

grandfamilio — Familio, en kiu pluraj generacioj loĝas kune. L. Sinha nomas ĝin ankaŭ kuniĝinta familio.

Grundtvig, Nicolai Frederik Severin, (1783—1872). Dana pastro, verkisto kaj eklezia reformatoro, kiu serĉis sintezon de kristana kaj monda vivo. Li estas iniciatoro de la skandinava popolaltlernejo.

Gurudeva — *Guru* — instruisto, *deva* — dia, ĉiela. Honora titolo. Precipe Rabindranath Tagore nomiĝis tiel.

Ĝajadeva — (ĉ. 1200). Kortega poeto ĉe Lakŝman Sen, la lasta sendependa hindua reĝo de Bengalujo. Li estas fama pro sia poemo Gitagovinda, en kiu li prikantas la flaman amon inter Radha kaj Krišna.

Hamsun, Knut — (1859—1952). Norvega verkisto, nobelpremiito en 1920. En la internacia lingvo troviĝas lia romano Victoria.

Hanuman — La reĝo de simioj, alianca kun Rama, kiam tiu ekspediciis al Cejlono por rekonkeri sian rabitan edzinon Sita.

Hedin, Sven (1865—1962). Sveda geografo, konata pro siaj esplorvojaĝoj en la interno de Azio.

Jamuna Alrivero de Ganga.

Jogasutra Aforismoj pri jogo. La plej grava prezento de la metodo de *raĝajoga* aŭ reĝa jogo, kiu estas unu el la kvar aŭ kvin ĉefaj metodoj de jogo. Tradukita kaj komentita en la angla interalie de Svami Vivekananda.

Kabir (1398—1494). Verkisto kaj predikanto, naskita en malriĉa familio. Pro sia strikte spirita religio kaj malakcepto de bildoj kaj simboloj li fariĝis egale aprezata inter hinduoj kaj mahometanoj.

Kalikato Angle Calcutta. La ĉefurbo de Bengalujo.

karatal Hinda muzikinstrumento.

karmo (*karman*). 1. Ago. 2. Produkto de agoj, kiu efikos en la venontaj vivoj de la aganto.

khol Hinda muzikinstrumento.

Kold, K. M. (1816—1870). Dana pedagogo, pioniro de la ideo pri popolaltlernejoj.

Krišna Unu el la avataroj de Dio (Višnu). Laŭ multaj vaišnavaj teologoj li estas tiu avataro, kiu plej perfekte revelacias la internan vivon de Dio. Inter la plej gravaj literaturaj fontoj por kono de li estas Bhagavad-Gita kaj ankoraŭ pli Bhagavatam.

Kurukŝetra Ebenejo en norda Hindujo, kie, laŭ Mahabharato, okazis granda batalo inter du armeoj.

Lakŝman (aŭ Lakŝmana) Duonfrato kaj intima amiko de Rama.

Lakŝmi-narajan Lakŝmi kaj Narajana (Višnu). Lakŝmi estas la edzino de Višnu kaj la diino de feliĉo.

Lordo Angla nobela titolo. De L. Sinha laŭ angla maniero uzata pri Dio.

Mahabharato — *Maha-bharata* — La granda (milito de la) Bharatas. La plej granda epopeo de la sanskrita — eble de la monda — literaturo. Ĝi ampleksas proksimume 220.000 liniojn. Inter la bataloj kaj tronmilitoj troviĝas inkrustitaj poemoj instruantaj pri moralo kaj religio, inter ili la fama Bhagavad-Gita. Tiu lasta estas dialogo inter la soldato Arĝuna kaj lia ĉarkondukisto kaj amiko Krišna, la avataro de Dio.

Mahariŝi — *Maha* — granda, *riŝi* — viziulo. Honora titolo.

Mahatma — *Maha* — granda, *atma* — atmo, animo. Honora titolo. Precipe Gandhi nomiĝis tiel.

Mirabai — (1504—1573). Poetino, naskita en reĝa familio. Ŝiaj ĉarmaj kantoj pri Dio kaj lia gloro estas ankoraŭ amataj en Hindujo.

Mugal — Titolo de hindaj imperiestroj 1525—1857. El arabe-persa vorto por mongolo.

Narajana — 1. La filo de la unua homo.
2. Epiteto de la Kreinto Brahma.
3. Epiteto de Višnu.
La noto en "Nepalo malfermas la pordon" estas intermikso de tiuj tri signifoj.

Nehru, Motilal — Hinda politikisto, patro de ĉefministro Javaharlal Nehru.

Padma-purana — Unu el la ses vaišnavaj *puranas*.

Pandit — Erudiciulo. Honora titolo.

Patanĝali — La aŭtoro de Jogasutra.

permanenta — Malprovizora.

Pestalozzi, Johann Heinrich (1746—1827). — Svisa pionira pedagogo, nomata 'la patro de la popollernejo'.

prasada — Manĝaĵo oferita al Dio kaj grace redonita de li.

puĝa — Adorado.

puĝari Hindua pastro kun certaj taskoj.

purana Plurale *puranas*. 1. Malnova. 2. Nomo de dekok malnovaj literaturaj verkoj en sanskrito, el kiuj ses estas konsideritaj kiel speciale vaiŝnavaj.

purohit Hindua pastro.

Radha La plej amata kunulino de Kriŝna. W. Eidlitz skribas pri ŝi, ke ŝi estas "la ĝojo de Dio kiel formo *(Gestalt)* en la interna regno de Dio, sur la tero revelaciita kiel unu el la *gopis* (paŝtistinoj)."

Raĝajoga Vidu sub Jogasutra.

Raj, Rammohan (1772—1833). Socia kaj religia reformatoro kaj fondinto de Brahma-samaĝ. Li posedis nekutiman intelekton kaj talenton por lingvoj. Reĝino Victoria honoris lin per la titolo Raĝa (reĝo).

Ram (Rama, Rama-ĉandra) La ĉefpersono en Ramajano kaj unu el la avataroj de Dio.

Ramajano La rakonto pri Rama troviĝis jam en Mahabharato, sed ricevis poste plenan ellaboriĝon en Ramajano, kiu estas la dua el la grandaj sanskritaj epopeoj. La centra temo de Ramajano estas la amo inter Rama kaj Sita, ŝia forrabo fare de la demona reĝo de Cejlono, edzina fideleco kaj liberiĝo.

Ramana La instruoj de tiu spirita gvidanto estas konataj en okcidento pere de kelkaj libroj de la ĵurnalisto Paul Brunton.

Ramanuĝa (ĉ. 1000). Ramanuĝa komence studis sub instruisto de la skolo de Śankara, sed venis poste sub la influon de la vaiŝnavismo. Liaj komentaroj pri Brahmasutra kaj Bhagavad-Gita fariĝis bazo por la renoviĝo de la hinduismo en la dekunua jarcento.

Ramkriŝna Paramhamsa (1836—1886). Li frue fariĝis pastro en Kali-templo. Lia arda deziro vidi la Dion malantaŭ la idolbildo havis rezulton, kaj dum longaj periodoj li estis en ekstaza tranco. Post tiuj unuaj spertoj li renkontis religiulojn, kiuj instruis lin pri la jogometodoj, pri la teologio de diversaj hinduismaj skoloj, pri islamo, pri kristanismo kaj ĉion li prenis al si kaj praktikis. Disĉiploj komencis kolektiĝi ĉirkaŭ li, kaj inter ili estis Narendranath Datta, poste nomata Svami Vivekananda. Tiu lasta estis plene nekonata persono, kiam li per siaj paroladoj kaj nura apero faris sensacion ĉe la religikongreso en Ĉikago 1893, kien li estis vojaĝinta trafemaltrafe sen invito kaj referencoj. Dum la naŭ laborplenaj jaroj, kiuj restis al li, li fariĝis kreinto kaj gvidanto de Ramkriŝna Ordeno kaj Ramkriŝna Misio. Hodiaŭ tiuj organizoj posedas plurajn hospitalojn kaj lernejojn kaj laboras ne nur en Azio, sed ankaŭ en Eŭropo, Ameriko kaj Afriko. Ramkriŝna kaj Vivekananda estas konataj en okcidento interalie per granda verko de la fama franca verkisto Romain Rolland.

Ram-Sita Rama kaj Sita.

Raj, Lala Lajpat (1865—1928). Verkisto kaj eminenta gvidanto de la nacia movado. Li fondis *Arja-samaĝ* kaj laboris por nuligi la diferencon inter hinduoj kaj mahometanoj.

Rup kaj Sanatan Raj. Samtempuloj de Kriŝna Ĉaitanja. Fratoj. Ambaŭ estis diplomatoj kaj okupis altajn postenojn en tiama Bengalujo, sed altiriĝis al Ĉaitanja, forlasis la mondan vivon kaj ekloĝis en Vrindavana, kie ili diligente verkadis, teologie kaj beletre, por la gloro de Kriŝna.

Ruskin, John (1819—1900). Angla art- kaj kulturkritikisto. Li pledis por renovigo de la mezepokaj metiaj tradicioj.

sadhu El la radiko *sadh* — atingi la celon. 1. Gvidanta al la celo. 2. Bona, nobla, virta, honorinda, valora. 3. Sanktulo.

sannjasi (aŭ *sannjasin*). (Iu, kiu estas) rezignanta pri la mondo.

Sen, Kesab Ĉandra (1838—1884). Unu el la gvidantoj de Brahma-samaĝ. Per sia impulsa personeco kaj pro sia arda reformfervoro li kaŭzis certan splitiĝon en la societo. Dum la lastaj jaroj de sia vivo li pli kaj pli tiriĝis al mistikismo.

Sita Vidu sub Ramajano.

Sita-Ram Sita kaj Rama.

Sridhar-Svami Hinda poeto el la deksesa jarcento. Elstara komentisto de Gita.

Svami (aŭ Svamin) Mastro. Honora titolo de hinduaj monaĥoj.

Ŝankara Filozofo el la oka jarcento. Vidu ankaŭ sub advaitismo.

Ŝastri, Sibnath (1842—1919). Gvidanto de Brahma-samaĝ kaj pioniro por virina edukiĝo en Hindujo.

ŝudro Membro de unu el la kvar ĉefkastoj de Hindujo, nome la laborista.

Tagore, Devendranath (1817—1905). Gvidanto de Brahma-samaĝ post la morto de Rammohan Raj. Patro de Rabindranath Tagore.

Tilak, Bal Gangadhar (1856—1920). Nacia gvidanto kaj ĉefa antaŭulo de Gandhi. Intelekta eminentulo kies granda verko pri Gita estas tre studata.

Tukaram (1588—1649). *Sannjasi* kaj poeto. Li estas konata pro siaj humileco, pieco kaj amo al Dio kaj proksimuloj.

Tulsidas Verkisto el la deksesa jarcento. Li verkis en popola lingvo varianton de Ramajano, kiu estas senekzemple amata kaj admirata.

upanîŝadoj — Grupo de religiaj tekstoj en sanskrito, la plej malnova datiĝas de ĉ. 800 a. K.

vaîŝnavo — Adoranto de Viŝnu. La vorto estas derivaĵo de la nomo Viŝnu.

vaîŝnavismo — La religio de la vaîŝnavoj.

Vedanta — Laŭlitere la fino de Veda. 1. La upanîŝadoj. 2. La filozofio de Ŝankara.

Vidjapati — Poeto el la dekkvina jarcento, kiu verkis en la dialekto Maithili. Li estas konsiderata la plej granda poeto de orienta Hindujo post Ĝajadeva. Liaj versoj, kaj tiuj de Ĝajadeva kaj Ĉandidas, estis tre ŝatataj de Krîŝna Ĉaitanja.

Vidjasagar, Iŝvar — Ĉandra (1820—1891). Li naskiĝis en malriĉa familio, vivis en sia juneco sub malfacilaj cirkonstancoj, sed spite al tio li albatalis al si pozicion kiel unu el la plej grandaj humanistoj de Hindujo, granda kiel verkisto, erudiciulo, edukisto, socia reformatoro kaj filantropo.

Viŝnu — La nomo de Dio en la vaîŝnava religio.

Viŝvanath (aŭ Viŝvanatha). La Sinjoro de universo. Nomo de Dio.

Vivekananda (1863—1902). Vidu sub Ramkrîŝna.

Vrindavana (aŭ Vrindavan). La arbaro de Vrinda, t.e. Radha, la plejamatino de Krîŝna. Nomo de arbaro ĉe la maldekstra bordo de Jamuna proksime al la urbo Mathura. La loko, kie Krîŝna, laŭ Bhagavatam, vivis sian junecon.

zamindaro — Hinda grandbienulo. El la persa vorto *zamin* — lando, tero, kaj *dar* — posedanto.

zamindario — La grandbieno de la zamindaro.